

Karlo Markso

**La interna milito
en Francujo (1871)
(La Pariza Komunumo)**

**kun enkonduko de
Frederiko Engelso**

Karlo Markso

**La interna milito
en Francujo (1871
La Pariza Komunumo)**

**kun enkonduko de Frederiko
Engelso**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio¹ (laŭ la lasta de Frederiko Engelso prizorgita eldono de 1891, tradukita de *Der Bürgerkrieg in Frankreich, dritte deutsche Auflage, Berlin 1891, Karl Marx und Friedrich Engels: Werke, Bd 22*, Berlino (GDR) 1972, p. 188-199.

Esperantigita (el la germana lingvo), kun variantoj de la unua, londona, eldono de la 30-a de majo de 1871 el ties franclingva versio: *Un document produit en version numérique par Jean-Marie Tremblay, professeur de sociologie au Cégep de Chicoutimi* (<http://pages.infinit.net/sociojmt>)
Dans le cadre de la collection: «Les classiques des sciences sociales»
(http://www.uqac.quebec.ca/zone30/Classiques_des_sciences_sociales/index.html)

[1-a eldono:

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (1871)

(La Pariza Komunumo)

kun enkonduko de Frederiko Engelso

© 2005 Mondial, Novjorko (por tiu ĉi Esperanto-eldono)

Tradukis: Vilhelmo Lutermano

ISBN 1-59569-025-5]

**Karlo Markso: La interna milito en Francujo (1871,
La Pariza Komunumo)
kun enkonduko de Frederiko Engelso
Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
2-a, reviziita eldono, nur reta, Monda Asembleo Socia (MAS)
2015
ISBN 978-2-36960-007-7
Enretigita ĉe <http://marxists.org> en la jaro 2015**

1 Vd la finnoton n-ro 1, p.

Enhavo

Renato Corsetti: Antaŭparolo.....	7
Frederiko ENGELSO (1891) Enkonduko	8
Karlo MARKSO: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito.....	24
Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro.....	31
Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)	43
I	43
II	56
III	64
IV	80
Aldonoj al la 3-a germana eldono (1891), publikigitaj sub direktado de Engelso	94
1.....	94
2	95
Notoj.....	98
1.....	98
2.....	100
3.....	101

Frederiko Engelso (1891)
Enkonduko
en *La interna milito en Francujo*
1871
(*La Pariza Komunumo*)

La peto, denove eldoni la mesaĝon de la internacia Ĝenerala Konsilantaro pri «La interna milito en Francujo» kaj akompani ĝin per enkonduko, venis al mi neatendite. Pro tio mi povas ĉi tie nur mallonge tuŝi la plej gravajn punktojn.

Mi metas antaŭ la supre menciitan pli longan laboraĵon la du pli mallongajn mesaĝojn de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito¹. Unue, ĉar la «interna milito» referencas la duan, kiu mem ne estas tute komprenebla sen la unua. Sed krome, ĉar tiuj du de Markso verkitaj mesaĝoj ne malpli ol la «interna milito» estas elstaraj ekzemploj de la mirinda, unue en «*Der 18te Brumaire des Louis Bonaparte* [La 18-a brumero de Louis Bonaparte]»² elpruvita talento de la aŭtoro klare kompreni la gravecon kaj la neprajn sekvojn de grandaj historiaj eventoj, en tempo dum kiu tiuj eventoj ankoraŭ okazas antaŭ niaj okuloj aŭ nur ĵus finiĝis. Kaj fine, ĉar en Germanujo ni ankoraŭ nuntempe suferas la de Markso antaŭdiritajn sekvojn de tiuj eventoj.

Aŭ ĉu ne realiĝis, kion diras la unua mesaĝo, ke, se la defendmilito de Germanujo kontraŭ Louis Bonaparte degeneras en konkeran militon kontraŭ

1 Vd la finnoton n-ro 2, p.

2 En majo 1870 la registaro de Napoleono la 3-a [ankaŭ nomata *Louis Bonaparte*, -vl] organizis plebisciton por firmigi siajn ŝanceliĝantajn poziciojn. Sed la voĉdonotaj demandoj estis formulitaj tiel ke mallaŭdo de la politiko de Napoleono III signifus samtempe mallaŭdon de ĉiaj demokratiaj reformoj. Malgraŭ tiu demagogia manovro la plebiscito pruvis la kreskon de la opoziciaj fortoj: 1,5 milionoj da voĉoj kontraŭ la registaro, 1,9 milionoj da voĉdonrajtuloj ne partoprenis la voĉdonadon. Dum la preparoj de la plebiscito komencis ampleksa kampanjo de reprezalioj kontraŭ la laborista movado; grandskalaj kalumnioj pri la laboristaj organizaĵoj estis disvastigataj kaj ties celoj deformitaj por timigi la mezajn tavolojn per la «ruĝa danĝero».

La pariza federacio de la Internacio (*Les Sections parisiennes fédérées de l'Internationale*) kaj la federacia ĉambro de la laboristaj unuiĝoj (*Chambre fédérale des Sociétés ouvrières*) en Parizo eldonis la 24-an de aprilo 1870 manifeston en kiu ili senmaskigis tiun demagogian manovron kaj instigis la laboristojn deteni sin de la voĉdonado. Tagon antaŭ la plebiscito, la membroj de la pariza federacio estis arestitaj. La polico kulpigis ilin pro preparo de komploto celanta murdi Napoleonon la 3-an. La registaro uzis la kulpigon por denova persekuto kaj por kalumnia agitado kontraŭ la membroj de la Internacio en tuta Francujo. En tribunala proceso kontraŭ la membroj de la pariza federacio, kiu okazis de la 22-a de junio ĝis la 5-a de julio 1870, la akuzo fiaskiĝis. Malgraŭ tio, pluraj membroj de la Internacio en Francujo estis kondamnitaj de la bonapartisma tribunalo al malliberejo sole pro sia aparteneco al la Internacia Laborista Asocio.

La kalumnioj, al kiuj la Internacio estis elmetita en Francujo, provokis amasajn protestojn de la laborista klaso.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

la franca popolo, ĉia malfeliĉo, kiu falis sur Germanujon post la tiel nomataj liberigaj militoj, reviviĝos kun denova akreco? Ĉu ni ne havis pliajn dudek jarojn da bismarka³ regado, anstataŭ la demagog-persekutojn⁴ la leĝojn pri socialistoj⁵, kun la sama polic-arbitreco, kun precize la sama harstariga leĝinterpretado?

Kaj ĉu ne laŭlitere realiĝis la antaŭdiro, ke la aneksado de Alzaco-Loreno «pelos Francujon en la brakojn de Rusujo» kaj ke post tiu anekso Germanujo aŭ fariĝos la evidenta servisto de Rusujo aŭ post mallonga paŭzo devos nepre armi sin por nova milito, kaj tiufoje «por rasmilito kontraŭ la aliancitaj rasoj de slavo kaj romanoj»? Ĉu la anekso de la francaj provincoj ne pelis Francujon en la brakojn de Rusujo? Ĉu Bismarko ne amindumis

-
- 3 Bismarko, germane: *Otto von Bismarck*, princo de *Schönhausen* (1815-1898), prusa politikisto, ĉefministro (*Reichskanzler*) de la Germana Imperio de 1871 ĝis 1890.
 - 4 Demagog-persekutoj: Persekutado de la opozicia movado en la germana inteligentularo, kiu komenciĝis post la militoj kontraŭ la napoleonisma Francujo. Multaj membroj de germanaj studentaj asocioj, kiuj estiĝis ankoraŭ dum la bataloj kontraŭ Napoleono, post la Viena Kongreso ekagis kontraŭ la reakcia ordo en la germanaj ŝtatoj, organizis politikajn manifestaciojn, en kiuj ili postulis la unuiĝon de Germanujo. La mortigo de la adepto de la Sankta Alianco kaj carisma spiono *Kotzebue* fare de la studento *Sand* (1819) servis kiel preteksto por reprezalioj kontraŭ la «demagogoj», kiel la partoprenantoj de tiu opozicia movado estis nomataj en la decidoj de la Karlsbada Konferenco de la ministroj de la germanaj ŝtatoj en aŭgusto 1819.
 - 5 La leĝo pri socialistoj («Leĝo kontraŭ publike danĝeraj streboj de la socialdemokratio») estis trudita de Bismarko kun subteno de la plimulto de la regna parlamento (*Reichstag*) la 19-an de oktobro 1878 kaj promulgita la 21-an de oktobro. Per tio Bismarko atingis ke «la socialdemokratio estis metita ekster la leĝon. La gazetoj de la laboristoj, pli ol kvindek, estis subpremataj, iliaj asocioj malpermesataj, iliaj kluboj fermitaj, iliaj monrimedoj konfiskitaj, iliaj kunvenoj disolvataj de la polico, kaj kiel krono de ĉio estis ordonite ke super tutaj urboj kaj distriktoj povas deklariĝi la 'sieĝostato'». Komencis arestoj kaj amasaj ekziladoj. Spite al tiuj reprezalioj, la socialdemokratio eksterleĝe daŭrigis sian laboradon. Ĝi sukcesis, kun aktiva helpo de Markso kaj Engelso, superi la oportunistajn kaj la «ultramaldekstrajn» tendencojn en siaj vicoj, ligi la eksterleĝan laboron kun la laŭleĝaj eblecoj de la batalo kaj tiel ampleksigi sian influon en la amasoj. La kreskanta premo de la laborista klaso trudis fine, la 1-an de oktobro 1890, la abolon de tiu leĝo pri socialistoj.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

dudek jarojn vane por la favoro de la caro, amindumis per servoj eĉ pli malnoblaj ol kiajn la eta Prusujo, antaŭ ol fariĝi «unua grandpotenco de Eŭropo», kutimis meti antaŭ la piedoj de la sankta Ruslando?

Kaj ĉu ne daŭre ŝvebas super niaj kapoj la damokla glavo de milito, en kies unua tago ĉiuj dokumente garantiitaj princaj aliancoj dispolviĝos, milito, pri kiu nenio certas ol la absoluta necerteco de ĝia rezulto, de rasmilito, kiu submetas tutan Eŭropon al ruinigo fare de dek-kvin aŭ dudek milionoj da armitoj, kaj kiu nur pro tio ankoraŭ ne furiozas, ĉar eĉ la plej forta el inter la militaj regnoj timas la absolutan nekalkuleblon de la fina rezulto?

Des pli estas devo, ree alirebligi al la germanaj laboristoj tiujn duone forgesitajn brilajn pruvojn de antaŭvido de la internacia laborista politiko de 1870.

Kio validas pri tiuj mesaĝoj, validas ankaŭ pri la «interna milito en Francujo». La 28-an de majo, la lastaj batalantoj de la Komunumo subiĝis al la fortosupereco sur la deklivo de *Belleville*, kaj jam du tagojn poste, la 30-an, Markso antaŭlegis al la Ĝenerala Konsilantaro la laboraĵon, en kiu la historia graveco de la Pariza Komunumo prezentiĝas en mallongaj, fortaj, sed en tiom akraj kaj veraj trajtoj, kiom en la tuta amasa literaturo pri la temo neniam plu estis atingita.

Danke al la ekonomia kaj politika evoluo de Francujo ekde 1789, Parizo troviĝas jam de kvindek jaroj en la situacio, ke tie ne povis eksplodi revolucio kiu ne alprenis proletan karakteron, tiel ke la proletaro, kiu batalakiris la venkon per sia sango, prezentis proprajn postulojn post la venko. Tiuj postuloj estis pli aŭ malpli malklaraj kaj eĉ haosaj, laŭ la ĉiufoja evolustato de la parizaj laboristoj; sed fine ili ĉiuj esprimis forigon de la klasa kontraŭeco inter kapitalistoj kaj laboristoj. Kiel tio okazu, tion oni tamen ne sciis. Sed la postulo mem, kiom ajn malprecize ĝi estis esprimita, entenis danĝeron por la ekzistanta sociordo; la laboristoj, kiuj starigis ĝin, estis ankoraŭ arm-itaj; por la burĝoj en la ŝtatarato la unua nepreco estis do senarmigi la laboristojn. Pro tio, post ĉiu de la laboristoj batale akirita revolucio, denova batalo kiu finiĝas per la malvenko de la laboristoj.

Tio okazis unuafoje en 1848. La liberalaj burĝoj de la parlamenta opozicio⁶ faris reformbankedojn por trudi la elektoreformon kiu devis certigi la

6 Parlamenta opozicio: grupo en la franca ĉambro de deputitoj, gvidata de Odilon

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

regadon de ilia partio. En la batalo kun la registaro pli kaj pli devigataj alvoki la popolon, ili devis pli kaj pli lasi la prioritaton al la radikalaj kaj respublikanaj tavoloj de la burĝaro kaj etburĝaro. Sed malantaŭ tiuj staris la revoluciaj laboristoj, kaj tiuj akiris post 1830 pli da politika memstareco ol imagis la burĝoj kaj eĉ la respublikanoj. En la momento de la krizo inter registaro kaj opozicio la laboristoj komencis la stratbatalon; Louis-Philippe⁷ malaperis, kun li la elektoreformo, anstataŭ ili starigis la respubliko, kaj de la venkaj laboristoj mem nomata «sociala» respubliko. Sed kion tiu sociala respubliko signifis, tion sciis neniu, ankaŭ ne la laboristoj mem. Sed ili havis nun armilojn kaj estis potenco en la ŝtato. Do, ekde kiam la regantaj burĝaj respublikanoj sentis iom firman grundon sub siaj piedoj, ilia unua celo estis malarmi la laboristojn. Tio okazis per tio, ke ili per rekta perfido, malkaŝa moko kaj la provo ekzili la senlaborulojn en malproksiman provincon, pelis ilin en la ribelon de junio 1848⁸. La registaro zorgis pri giganta superforto. Post kvintaga heroa batalo la laboristoj malvenkis. Kaj nun sekvis masakro al la sendefendaj kaptitoj, kian oni ne vidis depost la tagoj de la interna milito kiu estis la ekdisfalo de la roma respubliko⁹. Estis la unua fojo, ke la

Barrot, dum la julia monarĥio (1830-1848). Ĝiaj membroj esprimis la politikajn konceptojn de liberalaj rondoj de la industria kaj komerca burĝaro kaj postulis moderan balotreformon; ili vidis en tio rimedon malhelpi la revolucion kaj teni la dinastion de Orleano ĉe la potenco.

7 Louis-Philippe,

8 Ribeleo de junio 1848: la heroa ribelo de la parizaj laboristoj de la 23-a ĝis la 26-a de junio 1848.

9 Ekdisfalo de la roma respubliko: la epoko de la teroro kaj de sangaj persekutoj kiuj okazis en Romo dum la akriĝo de la sociaj kaj politikaj bataloj en la diversaj stadioj de la roma sklavisma respubliko (1-a jarcento a.n.e.).

La diktatoreco de Sulao (82-79 a.n.e.), reprezentanto de la sklavista aristokrataro (nobelaro), estis akompanata de amasaj ekstermoj de la subtenantoj de Mario, grupo de sklavistoj malamika al li. Sub Sulao unuafoje enkondukiĝis la tiel nomataj proskriboj, t.e. listoj de suspektataj personoj. Ĉiu romiano rajtis mortigi tiujn proskribitojn sen juĝo.

La unua kaj la dua romia triumvirato (60-53 kaj 43-36 a.n.e.) estis la diktatoreco de la plej influhavaj romiaj militestroj, kiuj inter si interkonsentis pri la divido de la potenco; en la unua triumvirato estis Pompejo, Cezaro kaj Kraso, en la dua Oktaviano, Antonio kaj Lepido. la regado de la triumvirato esits etapo en la batalo por likvido de la roma respubliko, por starigo de absoluta monarĥio en Romo. La triumviroj uzis antaŭ ĉio la metodon de korpa ekstermo de siaj kontraŭuloj.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

burĝaro montris al kiom freneza kruleco de venĝo ĝi incitiĝas, kiam la proletaro kuraĝas prezenti sin fronte al ĝi kiel aparta klaso kun apartaj interesoj kaj postuloj. Kaj tamen 1848 estis nur infanludo kompare kun ĝia furiozado en 1871.

La puno sekvis tuj. Se la proletaro ankoraŭ ne povis regi Francujon, la burĝaro tion jam ne povis. Almenaŭ ne tiam, kiam ĝi estis en sia plimulto ankoraŭ monarĥisma kaj splitita en tri dinastiaj partioj¹⁰ kaj kvara respublikana. Iliaj internaj kvereloj permesis al la aventuristo Louis Bonaparte akapari ĉiujn potenc-postenojn – armeon, policon, administracion – kaj, la 2-an de decembro 1851, dispeli la lastan remparon de la burĝaro, la nacian asembleon. La dua imperio komencis la ekspluatadon de Francujo per bando de politikaj kaj financaj aventuristoj, sed samtempe ankaŭ industrian disvolvon tian kia neniam eblis sub la pedanta kaj timema sistemo de Louis Philippe, kun la ekskluziva regado de nur eta parto de la granda burĝaro. Louis Bonaparte forprenis la politikan potencon de la kapitalistoj pretekstante protekti ilin, la burĝojn, kontraŭ la laboristoj, kaj aliflanke la laboristojn kontraŭ ili; sed kompanse, lia regado favoris la spekuladon kaj la industrian agadon, mallonge, la prosperon kaj riĉiĝon de la tuta burĝaro en senprecedenca skalo. Sed en multe pli granda skalo evoluis la korupto kaj amasa ŝtelado kiuj grupiĝis ĉirkaŭ la imperia kortego kaj forte profitis de tiu riĉiĝo.

Sed la dua imperio, tio estis la alvoko al la franca ŝovinismo, tio estas la postulo rehavi la en 1814 perditajn limojn de la unua imperio, almenaŭ tiujn de la unua respubliko. Franca imperio en la limoj de la malnova monarĥio, eĉ de tiu de la ankoraŭ pli limigita de 1815, tio kun la daŭro ne eblis. Pro tio la neceso de kelktempaj militoj kaj teritoriaj akiroj. Sed pri neniuj teritoriaj akiroj la francaj ŝovinistoj revis pli ol pri tiu de la germana maldekstra Rejn bordo. Unu kvadratmeĵlo ĉe la Rejno valoris pli ol dek en la Alpoj aŭ aliloke. Kun la starigo de la dua imperio, la repostulo de la maldekstra Rejn bordo, samtempa aŭ per pecoj, estis nur tempa demando. Tiu tempo venis kun la prusa-aŭstra milito 1866; trompita de Bismarko kaj de sia propra superruza prokrasto-politiko, Bonaparte ne ricevis la atenditan «teritorian

Post la disfalo de la unua kaj de la dua triumvirato sekvis sangaj internaj militoj.

10 Tri dinastiaj partioj: la legitimistoj, la orleanistoj (anoj de la dinastio Orleano, kiu regis dum la julia monarĥio en Francujo kaj reprezentis la interesojn de la financa aristokratio kaj de la industria grandburĝaro) kaj la bonapartistoj.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

kompenso», kaj do restis al li plu nenio ol la milito, kiu eksplodis 1870 kaj kondukis lin al Sedano¹¹ kaj de tie al *Wilhelmshöhe*¹².

La nepra sekvo estis la pariza revolucio de la 4-a de septembro 1870. La imperio kolapsis kiel kartodomo, la respubliko estis denove proklamita. Sed la malamiko staris antaŭ la pordoj; la armeoj de la imperio estis aŭ senespe-re enŝlositaj en Messo aŭ kaptitaj en Germanujo. En tiu urĝo la popolo permesis al la parizaj deputitoj de la iama leĝdona institucio konduki kiel «registaro de la nacia defendo». Oni allasis tion des pli ĉar nun, cele al defendo, ĉiuj armilkapablaj parizanoj aliĝis al la nacia gvardio kaj estis armitaj, tiel ke nun la laboristoj estis en ĝi la plimulto. Sed jam baldaŭ eksplodis la kontraŭeco inter la registaro, kiu konsistis preskaŭ nur el burĝ-oj, kaj la armita proletaro. La 31-an de oktobro, laboristaj batalionoj sturmis la urbodomon kaj arestis parton de la registaro; perfido, rekta rompo de donita promeso de la registaro kaj la interveno de kelkaj batalionoj de filistraj batalionoj liberigis ilin, kaj por ne eksplodigi internan militon sine de urbo sieĝata de fremda militforto, oni lasis la ĝisnunan registaron ofici.

11 En la batalo ĉe Sedano la 1-an kaj 2-an de septembro 1870, la armeo *Châlons de Mac-Mahon*, post violentaj bataloj estis ĉirkaŭata de la prusaj trupoj de la tria kaj kvara armeo kaj devigata al kapitulaco, kiu estis subskribita la 2-an de septembro de la franca komando. Napoleono la 3-a kaj pli ol 80.000 soldatoj, oficiroj kaj generaloj estis kaptitaj.

La katastrofo de la francoj ĉe Sedano akcelis la disfalon de la dua imperio kaj kondukis la 4-an de septembro 1870 al proklamo de la respubliko en Francujo.

Kun la neniigo de la franca regula armeo kaj la proklamo de la respubliko en Parizo, la milito, flanke de Prusujo, perdis sian defendecon. La konkero-planoj de la prusa militismo, de la junkroj kaj de la burĝaro malkaŝe evidentiĝis. La internacia proletaro staris nun antaŭ la grava tasko subteni la francan popolon en sia defendmilito kontraŭ la prusaj konkerantoj.

La ŝanĝo de la karaktero de la milito kaj la novaj taskoj rezultantaj el ĝi estas traktitaj de Markso en la «Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito».

12 En *Wilhelmshöhe* ĉe Kaselo, plezurkastelo de la prusaj reĝoj, restadis la franca imperiestro Napoleono la 3-a kun sia akompanantaro, kaptitaj de la prusoj, de la 5-a de septembro 1870 ĝis la 19-a de marto 1871. Turnado de cigaredoj por la propra uzado estis unu el la ĉefaj okupiĝoj de la kaptitoj.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

Fine, la 28-an de januaro 1871, la malsatigita Parizo kapitulacis. Sed kun ĝis nun en la milithistorio senprecedencaj honoroj. La fortikaĵoj estis transdonitaj, la remparo malarmita, la armiloj de la linio kaj de la mobilizita gvardio transdonitaj, ili mem konsiderataj militkaptitoj. Sed la nacia gvardio konservis siajn armilojn kaj kanonojn kaj eniris nur batalhalton kontraŭ la venkintoj. Kaj tiuj mem ne kuraĝis triumfe enmarŝi Parizon. Nur etan anguleton, krome konsistantan plejparte el publikaj parkoj, ili kuraĝis okupi, kaj eĉ tion nur por kelkaj tagoj! Kaj dum tiu tempo, ili, kiuj estis sieĝintaj Parizon dum 131 tagoj, mem sieĝataj de la armitaj parizaj laboristoj, kiuj zorge atentis, ke neniu «pruso» transpaŝu la stretajn limojn de la anguleto lasita al la fremda konkerinto. Tian respekton la parizaj laboristoj vekis ĉe la armeo, antaŭ kiu ĉiuj armeoj de la imperio demetis la armilojn; kaj la prusaj junkroj, alvenintaj por venĝi ĉe la fokuso de la revolucio, devis respektople- ne halti kaj saluti antaŭ ĝuste tiu armita revolucio!

Dum la milito, la parizaj laboristoj limigis sin postuli la energian daŭrig- on de la batalo. Sed nun, kiam post la kapitulaco de Parizo estiĝis la paco, Thiers, la nova estro de la registaro, komprenis nun, ke la regado de la posedantaj klasoj – grandbienuloj kaj kapitalistoj – estas en konstanta danĝero se la parizaj laboristoj daŭre tenos la armilojn en siaj manoj. Lia unua ago estis la provo senarmigi ilin. La 18-an de marto li sendis linitrup- ojn kun la ordono rabi la artilerion, kiu apartenis al la nacia gvardio, estis fabrikita dum la sieĝado de Parizo kaj pagita per publika subskripcio. La provo fiaskis, Parizo preparis sin unuanime al defendo, kaj la milito inter Parizo kaj la franca registaro kun sidejo en Versajlo estis deklarita. La 26-an de marto, la pariza Komunumo estis elektita kaj la 28-an proklamita. La centra komitato de la nacia gvardio, kiu ĝis tiam funkciis registare, trans- donis siajn funkciojn al ĝi, post dekreti la abolon de la skandala pariza «morpolic». La 30-an, la Komunumo abolis la konskripcion kaj la kon- stantan armeon kaj deklaris sola armita povo la nacian gvardion, al kiu apartenis ĉiuj armilaŭgaj civitanoj; ĝi nuligis ĉiujn ŝuldojn de domluado de oktobro 1870 ĝis aprilo, kun enkalkulo de pagitaj sumoj por estonta lu- tempo, kaj ĉesigis ĉiajn vendojn de garantiaĵoj en la urba lombardejo. Samtage la eksterlandanoj elektitaj en la Komunumo estis konfirmataj en sia ofico, ĉar «la flago de la Komunumo estas tiu de la mondrespubliko»¹³. - La

13 El la raporto de la balotkomisiono pri la elektoj al la Komunumo; publikigita en la «*Journal Officiel de la République française*», Parizo, 31-a de marto 1871.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

1-an de aprilo estis decidite, ke la plej alta salajro de dungito ĉe la Komunumo, do ankaŭ de ĝiaj membroj mem, devas ne superi 6.000 frankojn (4.800 markojn). Sekvatage dekretiĝis la separo inter eklezio kaj ŝtato kaj la abolo de ĉiaj ŝtataj pagoj por religiaj celoj kaj la transformado de ĉiaj klerikalaj havaĵoj en nacian proprieton; sekve de tio, la 8-an de aprilo, estis decidite, kaj iom post iom realigite, la forigo el la lernejoj de ĉiaj religiaj simboloj, bildoj, dogmoj, preĝoj, mallonge, «de ĉio kio apartenas al la sfero de la konscienco de ĉiu unuopulo». La 5-an estis dekretite – fronte al la ĉiutaga mortpafado de kaptitaj komunumaj batalintoj fare de la versajlaj trupoj – preno de ostaĝoj, sed neniam realigite. – La 6-an, la 137-a bataliono de la nacia gvardio eltiris la gilotlinon kaj sub laŭta popoljubilo publike forbruligis ĝin. La 12-an, la Komunumo decidis renversi la venko-kolonon de la placo *Vendôme*¹⁴, kiu estis ĝisita post la milito de 1809 de Napoleono el konkeritaj kanonoj, kiel simbolon de ŝovinismo kaj incito al popolmalamo. Tio estis realigita la 16-an. La 16-an de aprilo, la Komunumo ordonis statistikan listigon de la fabrikoj fermitaj de siaj posedantoj kaj la ellaboradon de planoj por funkciigi tiujn fabrikojn de ĝis tiam tie dungitaj laboristoj kunigendaj en kooperativaj sindikatoj, kaj por organizado de tiuj sindikatoj en granda asocio. – La 20-an ĝi abolis la noktlaboron de la bakistoj kaj ankaŭ la laborateston, kiu estis ekde la dua imperio kiel monopolo prizorgata de individuoj nomumitaj de la polico – unuarangaj ekspluatistoj de laboristoj; pri laboratestado estis taskitaj la urbestroj de la dudek parizaj distriktoj. – La 30-an de aprilo ĝi ordonis la abolon de la lombardejoj, ĉar ili estas privatekspluatadoj de laboristoj kaj en kontraŭdiro kun la rajto de la laboristoj je siaj laboriloj kaj je kredito. – La 5-an de majo ĝi dekretis la malkonstruon de la pentkapelo konstruita kiel pentofaro pro la ekzekuto de Ludoviko la 16-a.

Tiel, ekde la 18-a de marto, la klaskaraktero de la pariza movado, kiu ĝis tiam estis vualita pro la batalo kontraŭ fremda invado, nun akre kaj pure aperis. Kiel en la Komunumo sidis nur laboristoj aŭ rekonitaj reprezentantoj

14 Venkokolono de la placo *Vendôme*: venkokolono ĝisita el konkeritaj kanonoj, starigita 1806 ĝis 1810 sur la placo *Vendôme* en Parizo, kaj samtempe monumento de Napoleono la 1-a memorigante liajn venkojn de 1805. La 12-an de aprilo 1871 la-Komunumo decidis renversi la kolonon de la placo *Vendôme* kiel simbolon de ŝovinismo kaj de instigo al popolmalamo. Tio estis realigita la 16-an de majo.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

de laboristoj, tiel ankaŭ ĝiaj decidoj portis decide proletan karakteron. Aŭ ili dekretis reformojn, kiujn la respublikana burĝaro perterlasis nur pro mal-kuraĝo, sed kiuj konsistigis nepran bazon por la libera agado de la laborista klaso, kiel la realigo de la frazo, ke fronte al la ŝtato, la religio estas nure privata afero; aŭ ĝi dekretis decidojn kiuj estis rekte en la intereso de la laborista klaso kaj kiuj parte profunde entranĉis en la malnovan sociordon. Sed ĉio ĉi povis, en sieĝata urbo, en plej bona kazo nur ekrealiĝi. Kaj ekde majo, la batalo kontraŭ la ĉiam pli multnombraj armeaj amasoj de la versaj-la registaro postulis ĉiujn fortojn.

La 7-an de aprilo, la versajlanoj ekokupis la transirejon trans la Sejno ĉe *Neuilly*, ĉe la okcidenta fronto de Parizo; aliflanke ili estis, la 11-an, dum atako al la suda fronto, kun sangaj kapoj rebatitaj de generalo Eudes. Parizo estis konstante bombata, de la samaj uloj kiuj estis stigmatizintaj la bombadon de la sama urbo fare de la prusoj kiel profanadon de sanktaĵo. La samaj uloj petegis nun la prusan registaron urĝe resendi la kaptitajn francajn soldatojn de Sedano kaj Messo, kiuj devis rekonkeri Parizon por ili. La iompost-ioma alveno de tiuj trupoj donis dekomence al la versajlanoj decidan superecon. Tio montriĝis jam, kiam la 23-an de aprilo Thiers ĉesigis la intertraktadon pri la interŝanĝo, proponitan de la Komunumo, de la ĉefepiskopo de Parizo¹⁵ kaj de aro da pliaj en Parizo arestitaj pastroj kontraŭ la sola Blankio¹⁶, kiu estis dufoje elektita en la Komunumon, sed kaptita en *Clairvau*. Kaj eĉ pli en la ŝanĝita lingvaĵo de Thiers; ĝis nun atendigante kaj ambigua, li fariĝis nun impertinenta kaj minaca, brutala. Ĉe la suda fronto, la versajlanoj prenis la 3-an de majo la reduton de *Moulin-Saquet*, la 9-an la komplete dispartitan fortikaĵon de *Issy*, la 14-an tiun de *Vanves*. Ĉe la okcidenta fronto ili iom post iom proksimiĝis, konkerante la multnombrajn vilaĝojn kaj konstruaĵojn ĝis la remparo kaj ĝis la ĉefremparo mem; la 21-an ili sukcesis, pro perfido kaj pro neglekto de la tie postenigita nacia gvardio, penetri en la urbon. La prusoj, kiuj tenis okupe la nordajn kaj orientajn fortikaĵojn, permesis al la versajlanoj penetri tra la tereno malpermesita al ili per la batalhalto en la nordo de la urbo kaj per tio antaŭeniri

15 *Darboy*.

16 Aŭgusto Blankio (france: Louis Auguste Blanqui [luí oĝíst blankí] 1805-1881), franca socialista teoriulo kaj revoluciulo, partoprenis en la laboristaj manifestacioj en 1848 kaj en la Pariza Komunumo. Inspirinto de la revolucia sindikatismo (blankiismo). -vl

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

atake sur longa fronto, kiun la parizanoj devis kredi kovrita de la armistico kaj pro tio nur tenis malforte okupata. Pro tio, la rezisto en la okcidenta duono de Parizo, en la vera lukso-urbo, estis nur malforta; ĝi fariĝis pli akra kaj tenaca, ju pli la penetrantaj trupoj prosimiĝis al la orienta duono, la vera laborista urbo. Nur post oktaga batalo la lastaj batalantoj de la Komunumo malvenkis sur la altaĵoj de *Belleville* kaj *Menilmontant*, kaj nun kulminis la murdado al sendefendaj viroj, virinoj kaj infanoj, kiu furiozis dum la tuta semajno. La fusilo ne mortigis sufiĉe rapide, centope la venkitoj estis mortpafitaj per mitraloj. La «muro de la federitoj»¹⁷, en la tombejo *Père-Lachaise*, kie okazis la lasta amasmurdado, staras ankoraŭ nun, muta-elo-kventa atesto pri tio, kian furiozadon la reganta klaso kapablas fari, kiam la proletaro kuraĝas elpaŝi por sia rajto. Poste venis la amasaj arestoj, kiam la forbuĉado de ĉiuj montriĝis neebila, la mortpafado de viktimoj arbitre selektitaj el la vicoj de la kaptitoj, la forkonduko de la resto en grandajn koncentrejojn, kie ili atendis la prezentadon antaŭ milittribunaloj. La prusaj trupoj, kiuj okupis limon de la nordorienta parto de Parizo, havis la ordonon ne tralasi fuĝantojn, sed la oficiroj ofte fermis okulon, kiam la soldatoj obeis pli la ordonon de la humaneco ol tiun de la ĉefkomando; sed nome glorendas la saksa armeokorpuso, ĉar ĝi kondukis tre humane kaj tralasis multajn, kies eco de komunumaj batalantoj estis evidenta.

Se ni hodiaŭ, dudek jarojn poste, reregardas al la agado kaj la historia graveco de la Pariza Komunumo de 1871, ni trovas, ke indas aldoni kelkajn notojn al la prezentado donita en la «Interna milito en Francujo».

La membroj de la Komunumo dividiĝis en plimulto, la blankiistoj, kiuj ankaŭ antaŭe majoritatis en la centra komitato de la nacia gvardio, kaj malplimulto: la membroj de la Internacia Laborista Asocio, kiuj konsistis plejparte el disĉiploj de la socialisma skolo de Prudono¹⁸. La blankiistoj estis tiam, en sia granda amaso, socialistoj nur el revolucia, proleta instink-

17 Muro de la federitoj: la muro de la pariza tombejo *Père-Lachaise*, ĉe kiu la 27-an de majo 1871 ducent komunumanoj (nomataj ankaŭ federitoj laŭ la «Respublikana Federacio de la Nacia Gvardio») heroe defendis sin, sed estis venkitaj de la versajlanoj kaj mortpafitaj laŭ decido de milita tribunalo.

18 Prudono (Pierre Joseph Proudhon [*piér jozéf prudón*] 1809-1865), etburĝa franca socialisto, unu el la teoriaj fondintoj de la anarĥiismo. Pri Prudono vd Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: «Filozofio de la mizero»; Pri J.B. Prudono (librofina librolisto n-ro 17). -v1

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

to; nur malmultaj estis, pere de *Vaillant*, kiu konis la germanan sciencan socialismon, atingintaj certan principan klarecon. Tiel kompreneblas, ke oni en ekonomia rilato multon preterlasis, kion laŭ nia nuntempa konsidero la Komunumo devintus fari. Plej malfacile kompreneblas tamen la sankta respekto per kiu oni haltis antaŭ la pordoj de la Banko de Francujo. Tio estis ankaŭ grava politika eraro. La banko en la manoj de la Komunumo – tio valorus pli ol dek mil ostaĝoj. Tio signifus la premon de la tuta franca burĝaro sur la versajla registaro favore al paco kun la Komunumo. Sed kio eĉ pli mirigas, estas la multaj ĝustaĵoj kiujn malgraŭ tio faris la Komunumo, ja konstituita el blankiistoj kaj prudonistoj. Kompreneble pri la ekonomiaj dekretoj, pri ties gloraj kiel pri la negloraj flankoj, respondecis unuavice la prudonistoj, kiel por la politikaj agoj kaj preterlasoj la blankiistoj. Kaj en ambaŭ kazoj la ironio de la historio volis – kiel kutime, kiam doktrinuloj ekregas –, ke la unuaj kiel la aliaj faris la malon de tio kion preskribis ilia skola doktrino.

Prudono, la socialisto de la etkampulo kaj de la metimajstro, malamamis la Asocion kun pozitiva malamo. Li diris pri ĝi, ke ĝi entenas pli da malbono ol da bono, ke ĝi estas de naturo senfrukta, eĉ malutila, ĉar kateno por la libereco de la laboristo; ke ĝi estas pura dogmo, senfrukta kaj ĝena, en kontraŭdiro kun la libereco de la laboristo kaj kun la ŝparado de laboro kaj ke ĝiaj malavantaĝoj kreskas pli rapide ol ĝiaj avantaĝoj; ke kontraste al ĝi, la konkurenco, la labordivido kaj privata proprieto estas ekonomiaj fortoj. Nur por esceptaj kazoj – kiel Prudono nomas ilin – de la granda industrio kaj de la grandaj entreprenoj, ekz-e fervojoj – taŭgas la asocio de la laboristoj. (Vd «*Idée générale de la révolution*», 3^e *étude*.)

Kaj 1871, la granda industrio, eĉ en Parizo, la centra sidejo de la artmetio, jam tiom ĉesis esti escepta kazo, ke la decide plej grava dekreto de la Komunumo ordonis organizadon de la granda industrio kaj eĉ de la manufakturo, kiuj baziĝu ne nur sur la asociado de la laboristoj en ĉiu fabriko, sed kiu krome centraligu ĉiujn tiajn sindikatojn en unu granda asocio; mallonge, organizaĵo kiu, kiel Markso ĝuste diras en la «*Interna milito*», fine kondukos al komunismo, do al la rekta kontraŭo de la prudona instruo. Kaj pro tio, la Komunumo estis ankaŭ la tombo de la prudona skolo de socialismo. Tiu skolo nuntempe malaperis el la francaj laborist-medioj; tie regas nun senkonteste, ĉe la posibilistoj¹⁹ ne malpli ol ĉe la «marksistoj», la

19 Posibilistoj: anoj de pseŭdosocialisma doktrino en Francujo kiu defendis la

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

marksa teorio. Nur en la «radikala» burĝaro ekzistas ankoraŭ prudonistoj.

Ne pli bone okazis al la blankiistoj. Kulturitaj en la skolo de la konspiro, kuntenataj per la disciplino nepra por ĝi, ili deiris de la opinio ke relative malgranda nombro da deciditaj, bone organizitaj viroj kapablas, en donita favora momento, ne nur kapti la ŝtatregadon, sed ankaŭ konservi ĝin per granda, rigora apliko de energio, ĝis kiam ĝi sukcesos entiri la amason de la popolo en la revolucion kaj arigi ĝin ĉirkaŭ la malgranda gvidanta grupo. Por tio necesis antaŭ ĉio plej rigora diktatoreca centrigo de ĉia potenco en la manoj de la nova revolucia registaro. Kaj kion faris la Komunumo, kiu konsistis plejparte el ĝuste tiuj blankiistoj? En ĉiuj siaj proklamoj al la francoj de la provinco ĝi instigis ilin al libera federacio de ĉiuj francaj komunumoj kun Parizo, al nacia organizaĵo, kiu por la unua fojo estu kreita de la nacio mem. Ĝuste la subprema potenco de la ĝisnuna centralizita regado, armeo, politika polico, burokratismo, kiun starigis Napoleono en 1798 kaj kiun de tiam ĉiu nova registaro transprenis kiel bonvenan instrumenton kaj uzis kontraŭ siaj kontraŭuloj, ĝuste tiu potenco devis ĉie fali, kiel ĝi jam estis falinta en Parizo.

La Komunumo devis tuj dekomence rekoni ke la laborista klaso, akirinte la potencon, ne povas daŭrigi kun la malnova ŝtatmaŝino; ke tiu laborista klaso, por ne perdi sian propran, ĵus akiritan potencon, devis forigi la tutan malnovan, ĝis nun kontraŭ ĝin mem uzitan subprem-aparaton, sed aliflanke devis protekti sin kontraŭ siaj propraj deputitoj kaj oficistoj, per tio ke ĝi deklaris tiujn, sen ajna escepto, ĉiumomente eksoficigeblaj. El kio konsistis la karakteriza trajto de la ĝisnuna ŝtato? La socio, por prizorgi siajn komunajn interesojn, komence per simpla divido de la laboro, kreis proprajn organojn. Sed tiuj organoj, kies pinto la ŝtata potenco, iom post iom, en la servo de siaj propraj apartaj interesoj, transformiĝis de servistoj de la socio en mastrojn super ĝi. Kiel videblas ekzemple ne nur en la hereda monarĥio,

ideon ke oni alstrebu nur tion «kio estas ebla» (*le possible*). Tiu oportunisma tendenco en la franca laborista movado fine de la 19-a jarcento estis direktita kontraŭ revolucia partio de la proletaro kaj predikis rezignon pri klasbatalo. Fine de la okdekaj jaroj la posibilistoj, kun subteno de oportunismaj elementoj en aliaj landoj, provis akapari la gvidadon de la internacia laborista movado. La plimulto de la socialistaj organizaĵoj de diversaj landoj tamen ne lasis sin direkti de la posibilistoj. Engelso senlace batalis kontraŭ la posibilistoj kaj senmaskigis ilian skisman agadon.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

sed same bone en la demokratia respubliko. Nenie la «politikistoj» formas pli apartan kaj pli potencon parton de la nacio ol ĝuste en Usono. Tie, ĉiu el la du grandaj partioj²⁰, kiu ricevas alterne la potencon, estas siavice mem regata de homoj kiuj faras el la politiko sian negocon, kiuj spekuladas je seĝoj en la leĝdonaj asembleoj de la federacio kiel en tiuj de la unuopaj ŝtatoj, aŭ kiuj vivas de la agitado por sia partio kaj post ties venko estas rekompencataj per postenoj. Estas konate, kiel la usonanoj provas de 30 jaroj deskui tiun neelteneblan jugon kaj kiel ili malgraŭ ĉio ĉiam pli profunde ensinkas en tiun marĉon de korupto. Ĝuste en Usono ni povas plej bone vidi kiel okazas tiu sendependiĝo de la ŝtata potenco fronte al la socio, por kies nura instrumento ĝi estis origine destinita. Tie ekzistas neniu dinastio, nenia nobelaro, nenia konstanta armeo, escepte de kelkaj viroj por gardi la indianojn, nenia burokrataro kun fiksa dungiteco aŭ rajto pri pensio. Kaj tamen ni havas tie du grandajn bandojn de politikaj spekulistoj, kiuj alterne akaparadas la ŝtatpotencon kaj ekspluatas ĝin per la plej koruptaj rimedoj kaj por la plej

20 La du grandaj partioj: en Usono estis la Demokrata Partio kaj la Respublikana Partio. La Demokrata Partio, fondita en 1828, konsistis komence el la plantejposedantoj, kelkaj grupoj de la burĝaro kaj konsiderinda parto de farmistoj kaj de la urba etburĝaro. En la tridekaj kaj kvardekaj jaroj de la 19-a jarcento, la partio fariĝis pli kaj pli la reprezentanto de la interesoj de la sklavistaj plantejposedantoj kaj de tiu grandburĝaro de la nordo, kiu estis ligita kun ili, kiuj agis por la konservado kaj disvastigo de la sklaveco. Post 1854, kiam per la akcepto de la *Kansas-Nebraska-Bill* minacis la etendo de la sklaveco tra la tuta teritorio de Usono, okazis skismo en la Demokrata Partio inter la defendantoj kaj kontraŭuloj de plia etendo de la sklaveco. Tio estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de la malvenko de tiu partio ĉe la prezidant-balotoj en 1860.

La Respublikana Partio estis fondita 1854 de kontraŭantoj al sklaveco, kiuj unuigis por refuto de kreskantaj pretendoj de la plantejposedantoj de la sudo. La Respublikana Partio defendis la interesojn de la industria burĝaro de la nordo kaj ĝuis la subtenon de la laboranta loĝantaro. Ĝi vidis sian taskon en la neniigo de la politika potenco de la sklavistoj, en la limigo kaj iom-post-ioma abolo de la sklaveco kaj en la senpaga disdonado de teroj en la okcidento por setligo de farmistoj. 1856 la Respublikana Partio unuafoje kandidatis ĉe prezidantaj balotoj, sed ricevis nur trionon de la voĉoj. 1860 la kandidato de la Respublikana Partio, Lincoln, estis elektita prezidanto. Post fino de la interna milito en Usono la Respublikana Partio ekagis kiel pioniro por la interesoj de la grandindustrio kaj de la financa burĝaro.

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

koruptaj celoj – kaj la nacio estas senpova kontraŭ tiuj laŭdire agantaj por ĝia servo, sed en realo du grandaj karteloj de politikistoj kiuj regas kaj prirabas ĝin.

Kontraŭ tiu en ĉiuj ĝisnunaj ŝtatoj nepra transformiĝo de la ŝtato kaj de la ŝtatorganoj el servantoj de la socio en mastrojn de la socio la Komunumo uzis du certegajn rimedojn. Unue ĝi okupis ĉiujn postenojn, administrajn, juĝajn, instruajn, per elekto laŭ ĝenerala voĉdonrajto de ĉiuj koncernatoj. Kaj due, ĝi pagis por ĉiuj servoj, altaj kiel malaltaj, nur la salajron kiun ricevis aliaj laboristoj. La plej alta salajro, kiun ĝi entute pagis, estis 6.000 frankoj. Per tio estis sekure baritaj la ĉasado kaj strebado al postenoj, eĉ sen la krome aldonita ligiteco de la mandatoj por delegitoj al reprezentaj institucioj.

Tiu disrompo de la ĝistiamata ŝtatpotenco kaj ĝia anstataŭigo per nova, vere demokratia, estas detale priskribita en la tria ĉapitro de la «interna milito». Sed necesis ĉi tie mallonge insisti pri kelkaj ĝiaj trajtoj, ĉar ĝuste en Germanujo la superstiĉo pri la ŝtato transiris de la filozofio en la ĝeneralan konscion de la burĝaro kaj eĉ de multaj laboristoj. Laŭ la filozofia ideo, la ŝtato estas la «realigo de la ideo» aŭ la en filozofion tradukita regno de Dio sur tero, la tereno en kiu realiĝas aŭ realiĝu la eternaj vero kaj justo. Kaj el tio sekvas tiam superstiĉa adorado de la ŝtato kaj de ĉio kio rilatas al la ŝtato, kio estiĝas des pli facile, ĉar ekde la infaneco oni kutimas imagi ke tiuj aferoj kaj intereso, kiuj estas komunaj al la tuta socio, ne povas esti mastrumataj alie ol kiel ili estas ĝis nun mastrumataj, nome per la ŝtato kaj ties bone pagataj oficistoj. Kaj oni kredas jam esti farinta gigante kuraĝan paŝon se oni liberiĝis el la kredo je la hereda monarĥio kaj estas tute konvinkita pri la demokratia respubliko. Sed en la realo la ŝtato estas nenio alia ol la maŝino por subpremi iun klason fare de alia, en la demokratia respubliko ne malpli ol en la monarĥio; kaj en la plej bona kazo ĝi estas malbono en la batalo por la klasregado heredita al la venka proletaro kaj kies plej malbonajn flankojn ĝi ne povos eviti kiom eble tuj pritranci, ne malpli ol la Komunumo, ĝis kiam en novaj, liberaj sociaj cirkonstancoj elkreskinta generacio kapablos forĵeti la tutan ŝtataĉaĵon.

La germana filistro²¹ ĵus denove troviĝas en bonfara timo ĉe la vorto:

21 La Enkonduko estis publikigita, antaŭ la apero de la unuopa eldono, kun konsento de Engelso, en la n-ro 28 de la «*Neue Zeit*», 9-a jarkolekto, 2-a volumo,

Frederiko Engelso (1891) Enkonduko

diktatoreco de la proletaro. Nu bone, sinjoroj, ĉu vi volas scii kiel aspektas tiu diktatoreco? Rigardu la Parizan Komunumon. Tio estis la diktatoreco de la proletaro.

Londono, je la dudeka datreveno
de la Pariza Komunumo,
la 18-an de marto 1891
F. Engelso

Laŭ: «La interna milito en Francujo»,
Tria germana eldono, Berlino 1891.
Traduko de: *Karl Marx und Friedrich Engels: Werke, Bd. 22*,
Berlino (GDR) 1972, p. 188-199 (inkluzive de la notoj)

1890/1891, sub la titolo «Pri la interna milito en Francujo». Ĉe tio la redaktejo ŝanĝis arbitre la tekston de la lasta alineo anstataŭigante «socialdemokrataj filistroj» de la manuskripto al «germanaj filistroj». Kiel montriĝas el letero de la redaktisto de la «*Vorwärts*», Richard Fischer, al Engelso de la 17-a de marto 1891, Engelso malaprobis tiun arbitrecan ŝanĝon. Sed ĉar li evidente ne volis allasi diversajn variantojn en la samtempaj eldonoj de sia laboraĵo, li konservis ankaŭ en la unuopa eldono la ŝanĝitan formulon.

**Karlo Markso: Unua mesaĝo de la
Ĝenerala
Konsilantaro pri la germana-
franca milito**

*Al la membroj
de la Internacia Laborista Asocio
en Eŭropo kaj Usono*

En la inaŭgura mesaĝo de nia asocio de novembro 1864 ni diris: «*Se la liberigo de la laborista klaso antaŭkondiĉas la fratecan unuiĝon kaj kunagadon, kiel ĝi povas plenumi tiun grandan mision, dum ekstera politiko, sekvanta krimajn planojn, kontraŭpelas naciajn antaŭjuĝojn de unu kontraŭ la alia kaj en rabo-militoj disipas sangon kaj havaĵon de la popolo?*» Kaj ni karakterizis la eksteran politikon alstrebatan de la Internacio per jenaj vortoj: «*La simplaj leĝoj de moralo kaj justeco, kiuj regu la rilatojn inter privatuloj, devas ankaŭ ekvalidi kiel plej superaj leĝoj en la rilatoj inter popoloj.*»

Ne mirige, ke Louis Bonaparte, kiu uzurpis sian regadon per ekspluatado de la klasbatalo en Francujo kaj plilongigas ĝin per ripetaj militoj al la esktero, dekomence traktis la Internacion kiel danĝeran malamikon. Ĵus antaŭ la plebiscito, li organizis patroladon kontraŭ la administraj komitatoj de la Internacia Laborista Asocio en Parizo, Liono, Rueno, Marsejlo, Bresto, mallonge, en la tuta Francujo, sub la preteksto ke la Internacio estas sekreta societo kaj planas komploton por murdi lin, preteksto kiu tuj poste per liaj propraj juĝistoj estis senmaskigita kiel komplete absurda. Kio estis la vera krimo de la franca sekcio de la Internacio? Ke ĝi laŭte klarigis al la franca popolo: Voĉdoni por la plebiscito signifas voĉdono por la despotismo enlande kaj por la milito ekstere. Kaj efektive estis pro ĝia aranĝo, ke en ĉiuj grandaj urboj, en ĉiuj industriaj centroj de Francujo la laborista klaso unuanime leviĝis por reĵeti tiun plebisciton. Malfeliĉe iliaj voĉoj estis superitaj de la inerta nesciado de la landaj distriktoj. La fondusaj borsoj, la kabinetoj, la regantaj klasoj kaj la gazetaro de preskaŭ tuta Eŭropo celebris la plebisciton kiel brilan venkon de la franca imperiestro super la franca laborista klaso; envere ĝi estis la signalo por murdo, ne de unuopulo, sed de tutaj popoloj.

La militkomploto de junio 1870 estas nur plibonigita eldono de la puĉo de decembro 1851.¹ Unuavide la afero ŝajnis tiel naive stulta, ke Francujo ne volis kredi je ties vera seriozeco. Prefere ĝi kredis la deputiton, kiu vidis en la militismaj paroladoj de la ministroj nuran borsmanovron. Kiam la 15-an de julio la milito fine estis oficiale anoncita al la leĝdona institucio, la tuta opozicio rifuzis la aprobon de la provizoraj monsumoj; eĉ Thiers stigmatizis la militon kiel «abomenan»; ĉiuj sendependaj gazetoj de Parizo kondamnis ĝin, kaj kurioze la provinca gazetaro preskaŭ senkonteste konsentis pri ili.

Intertempe la parizaj membroj de la Internacio ree laboris. En la «*Ré-*

1 La 3-an de decembro 1851 Louis Bonaparte faris kontraŭrevolucion ŝtatrenverson, kiu venigis al la potenco la bonapartistan reĝimon de la Dua Imperio.

Karlo Markso: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito

veil»² de la 12-a de julio ili publikigis sian manifeston «al la laboristoj de ĉiuj nacioj», en kiu tekstas:

«Ree politika ambicio minacas la pacon de la mondo sub preteksto de eŭropa ekvilibro kaj nacia honoro. Francaj, germanaj kaj hispanaj laboristoj! Ni unuigu niajn voĉojn por voko de abomeno kontraŭ la milito ... Milito pro demando de supereco aŭ pro dinastio povas en la okuloj de laboristoj esti nenio alia ol krima stulteco. Kontraŭ la militemaj alvokoj de tiuj, kiuj elaĉetas sin de la sangimposto kaj vidas en la publika malfeliĉo nur fonton de novaj spekuladoj, ni laŭte protestas, ni, kiuj bezonas pacon kaj laboron! ... Fratoj en Germanujo! Nia displitiĝo sekvigis nur la plenan triumfon de la despotismo ambaŭflanke de la Rejno ... Laboristoj de ĉiuj landoj! Kio ajn estu en la momento la rezulto de niaj klopodoj, ni, la membroj de la Internacia Laborista Asocio, por kiuj ne ekzistas landlimoj, ni sendas al vi, kiel garantiĝon de nia nedissolvebla solidareco, la bonajn dezirojn kaj la salut-ojn de la laboristoj de Francujo.»

Tiun manifeston de niaj parizaj sekcioj sekvis multnombraj francaj deklaroj, el kiuj ni ĉi tie povas citi nur unu: la deklaron de *Neuilly-sur-Seine*, publikigitan en la «*Marseillaise*»³ de la 22-a de julio:

«Ĉu la milito estas justa? Ne! Ĉu la milito estas nacia? Ne! Ĝi estas ekskluzive dinastia. Nome de la justeco, de la demokratio, de la veraj interesoj de Francujo, ni aliĝas plene kaj energie al la protestoj de la Internacio kontraŭ la milito.»

Tiuj protestoj esprimis la verajn sentojn de la francaj laboristoj, kion baldaŭ klare pruvis aparta okazaĵo. Kiam la *bando de la 10-a de decembro*, origine organizita sub la prezidanteco de Louis Bonaparte, en bluzoj maskitaj kiel laboristoj, surstratiĝis por tie per indianaj militdancoj inciti la milito-

2 *«Le Réveil»*: semajngazeto, ekde majo 1869 taggazeto de la maldekstraj respublikanoj; aperis de julio 1868 ĝis januaro 1871 en Parizo redaktata de *Delescluze*; ekde oktobro 1870 ĝi oponis la registaron de la nacia defendo. Ĝi publikigis dokumentojn de la Internacio kaj tekstojn pri la laborista movado.

3 *«La Marseillaise»*: taggazeto, organo de la maldekstraj respublikanoj, aperis en Parizo de decembro 1869 ĝis septembro 1870. La gazeto publikigis dokumentojn pri la agado de la Internacio kaj pri la laborista movado.

Karlo Markso: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito

febron⁴, tiam⁵ la veraj laboristoj el la antaŭurboj respondis per tiom grandiozaj pacmanifestacioj, ke la polica prefekto Piétri preferis subite ĉesigi ĉian ceteran stratpolitikon sub la preteksto, ke la fidela popolo de Parizo sufiĉe esprimis sian longe retenitan patriotismon kaj sian superbordiĝantan militentuziasmon.

Kia ajn estu la disvolviĝo de la milito de Louis Bonaparte kun Prusujo, la mortsonorilo de la dua imperio sonoris jam en Parizo. Ĝi finiĝos kiel ĝi komencis: per parodio. Sed ni ne forgesu, ke estis la registaroj kaj la regantaj klasoj de Eŭropo, kiuj ebligis al Louis Bonaparte ludi dum dek ok jaroj la kruelan farson de la *restarigo de la imperio*.

Flanke de Germanujo, la milito estas defendmilito. Sed kiu trudis al Germanujo la situacion, kiu devigas ĝin defendi sin? Kiu ebligis al Louis Bonaparte fari la militon kontraŭ Germanujo? Prusujo! Estis Bismarko kiu konspiris kun la sama Louis Bonaparte por hejme disbati popularan opozicion kaj aneksigi Germanujon al la dinastio *Hohenzollern*. Se la batalo de Sadovo⁶ estintus perdita anstataŭ gajnita, francaj batalionoj inundintus Germanujon kiel aliancanoj de Prusujo. Ĉu Prusujo post la venko revis eĉ nur por momento kontraŭmeti al la sklavigita Francujo liberan Germanujon? Ĝuste la malon! Ĝi timeme konservis la ennaskitajn belecojn de sia malnova sistemo kaj krome aldonis ĉiujn ruzaĵojn de la dua imperio, ties veran despotismon kaj ĝian ŝajndemokratian, ĝiajn politikajn trompaĵojn kaj financajn blufajn, ĝiajn pompajn frazaĵojn kaj ordinarajn prestidigitajn. La bonapartista reĝimo, kiu floris ĝis tiam nur je unu flanko de la Rejno, akiris per tio ĉe la alia bordo sian kontraŭparton. Kaj se la aferoj statis tiel, kio alia povis sekvi el tio ol la *milito*?

Se la germana laborista klaso permesas al la nuna milito forlasi sian striktan defendan econ, kaj degeneri en militon kontraŭ la franca popolo, tiam venko aŭ malvenko fariĝos same pereiga. Ĉia malfeliĉo, kiu falis sur Germanujon post la tiel nomataj liberigaj militoj, reviviĝos kun pli forta

4 Bando de la 10-a de decembro: societo de la 16-a de decembro, en 1849 starigita kaj en sekretaj sekcioj organizita bonapartista societo, kies kerno estis la pariza subproletaro. Detalan karakterizon de la societo de la 16-a de decembro donas Markso en «La dek-oka brumero de Louis Bonaparte».

5 En la eldono de 1870: al tiuj falsaj fratroj.

6

Karlo Markso: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito

violento.

Sed la principoj de la Internacio estas tro larĝe disvastiĝintaj kaj tro firme enradikiĝintaj en la germana laborista klaso, ol ke ni devus timi tiom malfeliĉan rezulton. La voĉo de la francaj laboristoj reeĥis el Germanujo. Laborista kunveno en Brunsviko la 16-an de julio deklaris sin plene konsenta, refutis ĉian penson pri nacia kontraŭeco kontraŭ Francujo kaj adoptis decidojn, en kiuj tekstas:

«Ni estas kontraŭ ĉiaj militoj, sed precipe kontraŭ dinastiaj militoj ... Kun profunda ĉagreno kaj doloro ni vidas nin entruditaj en defendmiliton kiel en neeviteblan malbonon; sed samtempe ni alvokas la tutan pensantan laboristan klason malebligi la ripeton de tia socia malfeliĉo postulante la povon por la popoloj mem por decidi pri milito kaj paco kaj tiel fari ilin mastroj de sia propra sorto.»

En Kemnico, kunveno de konfiduloj, reprezentantaj 50.000 saksajn laboristojn, faris unuanime jenan decidon:

«Nome de la germana demokratio kaj nome de la laboristoj de la socialdemokrata partio, ni deklaras la nunan militon ekskluzive dinastia ... Kun ĝojo ni prenas la de la francaj laboristoj al ni tenatan fratomanon ... Memorante la sloganon de la Internacia Laborista Asocio: 'Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!', ni neniam forgesos, ke la laboristoj de ĉiuj landoj estas niaj amikoj kaj la despotoj de ĉiuj landoj niaj malamikoj.»⁷

La berlina sekcio de la Internacio ankaŭ respondis al la pariza manifesto:

«Tutkore ni aliĝas al via protesto ... Ni promesas solene, ke nek trumpetosono nek kanonotondro, nek venko nek malvenko, povas deturni nin de nia komuna tasko de unuiĝo de la laboristoj en ĉiuj landoj.»⁸

En la fono de tiu memmortiga batalo atendas la horora figuro de Rusujo. Estas malbona aŭguro, ke la signalo al la nuna milito estis donita ĝuste en la momento en kiu la rusa registaro finis la konstruadon de siaj fervojoj kaj jam koncentris trupojn en la direkto de la rivero Pruto. Kiom ajn da simpatioj la germanoj povas prave pretendi en defendmilito kontraŭ bonapartisma

7 La laboristaj kunvenoj en Brunsviko la 16-an de julio kaj en Kemnico la 17-an de julio 1870 estis kunvokitaj de la estraro de la Socialdemokrata Laborista Partio (*Eisenach*-a). Ili estis protestaj manifestacioj de la laborista klaso kontraŭ la konkera politiko de la regantaj klasoj.

8 En la eldono de 1870 sekvas: Estu tiel!

Karlo Markso: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito

agreso, ili perdus ilin tuj, se ili permesus al la germana registaro alvoki la helpon de la kozakoj aŭ eĉ nur akcepti ĝin. Ili memoru ke post sendependiga milito kontraŭ la unua Napoleono Germanujo dum jardekoj kuŝis senhelpe antaŭ la piedoj de la caro.

La angla laborista klaso prezentas al la francaj laboristoj kiel al la germanaj fratece la manon. Ĝi estas firme konvinkita ke, kiel ajn finos tiu abomeninda milito, la alianco de la laboristoj de ĉiuj landoj fine elradikigos la militon. Dum la oficiala Francujo kaj la oficiala Germanujo ĵetas sin en fratomurdan batalon, la laboristoj sendas al si reciproke mesaĝojn de paco kaj de amikeco. Tiu unika granda fakto, senegala en la historio de la pasinteco, malfermas la perspektivon al pli hela estonto. Ĝi pruvas ke, kontraste al la malnova socio kun ĝia ekonomia mizero kaj ĝia politika frenezo, naskiĝas nova socio, kies internacia principo estos la paco, ĉar en ĉiu nacio regas la sama principo - la *laboro*!

La pioniro de tiu nova socio estas la Internacia Laborista Asocio.⁹

La Ĝenerala Konsilantaro

Applegarth, Robert
Boon, Martin J.
Bradnick, Fred
Stepney, Cowell
Hales, John
Hales, William
Leßner, Fred
Lintern, W.
Legreulier
Maurice, Zévy
Milner, George
Mottershead, Thomas
Murray, Charles
Odger, George
Parnell, James
Pfänder
Rühl

9 En la eldono de 1870 mankas tiu frazo.

Karlo Markso: Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito

Schmutz
Shepherd, Joseph
Stoll
Townshend, W.

Korespondantaj sekretarioj

Eugène Dupont, por Francujo
Karl Marx, por Germanujo
A. Serrailier, por Belgio, Nederlando kaj Hispanujo
Hermann Jung, por Svislando
Giovanni Bora, por Italujo
Antoni Zabicki, por Pollando
James Cohen, por Danujo
J. G. Eccarius, por Usono
Benjamin Lucraft, prezidanto
John Weston, kasisto
J. George Eccarius, ĝenerala sekretario

Oficejo: 256, *High Holborn, London, W. C.*
la 23-an de julio 1870

[Verkita inter la 19-a kaj la 23-a de julio 1870.

Laŭ: «*Der Bürgerkrieg in Frankreich*» (*La interna milito en Francujo*).
Tria germana eldono, Berlino 1891.]

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito¹

-
- 1 La «Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito» estis verkita de Markso inter la 6-a kaj la 9-a de septembro 1970.

La 6-an de septembro 1870 la Ĝenerala Konsilantaro, post pritaksado de la nova situacio estiĝinta per la kolapso de la Dua Imperio kaj la komenco de nova etapo de la milito, faris decidon pri publikigado de la «Dua mesaĝo pri la germana-franca milito» kaj elektis tiucele komisionon al kiu apartenis Markso, Jung, Milner kaj Serrailier.

Oni uzis ĉe la redaktado de la mesaĝo la materialon senditan al ĝi de Engelso, en kiu tiu senmaskigas la provojn de la prusaj militemuloj, junkroj kaj burĝaro pravigi siajn postulojn pri aneksado de franca teritorio per militstrategiaj konsideroj. La mesaĝo estis unuanime aprobita per aparte por tio kunvokita kunveno kaj disdonita al la tuta burĝa gazetaro de Londono. Kun escepto de la «*Pall Mall Gazette*», kiu publikigis la 16-an de septembro eltiraĵon el la mesaĝo, ĝi estis prisilentita de ĉiuj gazetoj. De la 11-a ĝis la 13-a de septembro ĝi estis eldonita en la angla lingvo je 1.000 ekzempleroj sub la titolo «*Second Address of the General Council of the International Working-Men's Association on the War*». Fine de septembro 1870 aperis la Unua kaj la Dua mesaĝo kune en nova eldono, en kiu la preseraroj de la unua eldono estis korektitaj kaj kelkaj redaktaj korektoj faritaj.

La tradukon de la Dua mesaĝo al la germana faris Markso, kiu ĉe tio kompletigis la tekston per kelkaj frazoj destinitaj al la germanaj laboristoj kaj ellasis kelkajn teksterojn. En tiu traduko la Dua mesaĝo estis publikigita en la «*Volksstaat*» n-ro 76 de la 21-a de septembro 1870 kaj en la «*Vörsbote*» n-roj 10 kaj 11 de oktobro kaj novembro 1870, kaj krome en Ĝenevo kiel flugfolio. 1891 Engelso publikigis la Unuan kaj Duan mesaĝon en la germana eldono de «*La interna milito en Francujo*». La tradukon por tiu eldono faris *Louise Kautsky* sub redaktado de Engelso.

En la franca lingvo la Dua mesaĝo estis presita en la gazeto «*L'Internationale*», Bruselo, n-ro 93 de la 23-a de oktobro 1870 kaj nekomplete (la publikigado ne estis ĝisfine daŭrigita) en la «*Égalité*» n-ro 35 de la 4-a de oktobro 1870.

En la rusa lingvo la Dua mesaĝo estis publikigita unuafoje 1905 en la rusa eldono de «*La interna milito en Francujo*», kiu estis eldonita de Lenino kiel traduko de la germana eldono de 1891.

**Al la membroj
de la Internacia Laborista Asocio
en Eŭropo kaj Usono**

En nia unua manifesto de la 23-a de julio ni diris:

«La mortsonorilo de la dua imperio sonoris jam en Parizo. Ĝi finiĝos kiel ĝi komencis: per parodio. Sed ni ne forgesu, ke estis la registaroj kaj la regantaj klasoj de Eŭropo, kiuj ebligis al Louis Bonaparte ludi dum dek ok jaroj la kruelan farson de la *restarigo de la imperio*.»

Do, jam antaŭ ol komenciĝis la milit-operacioj, ni traktis la bonapartist-an sapvezikon kiel aferon de pasinteco.

Ni ne trompiĝis pri la vivkapablo de la dua imperio. Ni ankaŭ ne malpravis en nia timo, ke la germana milito «perdos sian strikte defendan econ kaj degeneros en militon kontraŭ la franca popolo». La defendmilito finiĝis efektive per kapitulaco de Louis-Napoleono, la kapitulaco de Sedano kaj la proklamado de la respubliko en Parizo. Sed jam delonge antaŭ tiuj eventoj, jam en la sama momento, en kiu la tuta putreco de la bonapartistaj armiloj evidentiĝis, la prusa militista kamarilo decidiĝis al konkero. Kvankam *la propra proklamo de la reĝo Vilhelmo komence de la milito* kuŝis bare kiel malbela malhelpo. En sia tronparolado antaŭ la nordgermana regna parlamento li deklaris solene, ke li faras militon nur kontraŭ la imperiestro de la francoj kaj ne kontraŭ la franca popolo. La 11-an de aŭgusto li estis proklaminta manifeston al la franca popolo en kiu li diris:²

«La imperiestro Napoleono agresis akve kaj tere la germanan nacion, kiu deziris kaj daŭre deziras vivi en paco kun la franca popolo; mi transprenis la komandon super la germana armeo *por rebati lian agreson*, kaj *de militaj okazaĵoj* mi estis

Tiu ĉi teksto baziĝas sur la germana eldono de 1891. Devioj de la unua germana eldono de 1870 tuŝantaj la enhavon estas menciitaj piednote. La reliefigoj kaj subskriboj de la membroj de la Ĝenerala Konsilantaro estas prenitaj el la dua angla eldono. Ĉar la mesaĝo estas konata al la germanaj legantoj sub la titolo kiun Engelso donis al ĝi 1891, ĝi aperas ĉi tie ankaŭ sub tiu titolo.

- 2 En la eldono de 1870 mankis tiu frazo kaj la citaĵo el la manifesto de la reĝo Vilhelmo la 1-a.

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

trudita *transiri la francajn landlimojn.*»³

Ne kontenta per pretendi «la pure defendan econ» de la milito per la indiko ke li transprenis la ĉefan komandon super la germanaj armeoj «*por rebati agresojn*», li ankoraŭ aldonis ke li «estas nur de militaj okazaĵoj trudita» transiri la francajn landlimojn. Defenda milito kompreneble ne ekskludas atakajn operacojn, diktatajn de «militaj okazaĵoj».⁴

Laŭ tio, la diotima reĝo do devontigis sin antaŭ Francujo kaj la mondo al pure defenda milito. Kiel liberigi lin de tiu solena promeso? La teatraj reĝisoroj devis prezenti lin kvazaŭ li nur kontraŭvole cedus al nerezistebla ordono de la germana nacio; al la liberala germana meza klaso kun ties profesoroj, kapitalistoj, urbaj konsilantoj, ili donis tuj la replikon. Tiu meza klaso, kiu en siaj bataloj por la burĝa libereco de 1846 - 1870 donis neniam antaŭe viditan spektaklon de maldecidemo, malkapablo kaj malkuraĝo, estis kompreneble ege ravita surpaŝi la eŭropan scenejon kiel faŭkanta leono de la germana patriotismo. Ĝi alprenis la falsan ŝajnon de civitana sendependeco por ŝajniĝi kvazaŭ ĝi trudus al la prusa registaro – kion? la sekretajn planojn de ĝuste tiu registaro. Ĝi pentofaris pro sia longjara kaj preskaŭ religia kredo je la kapablo de Louis Bonaparte ne erari, laŭe postulante la dispecigon de la franca respubliko. Ni aŭkultu nur momenton al la kompreneblaj pretekstoj de tiuj kernaj patriotoj!

Ili ne kuraĝas aserti ke la popolo de Alzaco-Loreno sopiras la germanan brakumon: ĝuste la malo. Por puni ĝian francan patriotismon, Strasburgo, fortikaĵo, estis dum ses tagoj sencele kaj barbaramente bombardita per «germanaj» eksplodpafaĵoj, incendiita kaj granda nombro da sendefendaj loĝantoj mortigitaj. Jes ja! la grundo de tiuj provincoj antaŭ longa tempo apartenis al la delonge mortinta germana regno. Pro tio ŝajnas ke la tergrundo kaj la homoj kiuj elkreskis sur ĝi konfiskendas kiel nepreskriptebla germana proprietajo. Se la malnova mapo de Eŭropo devas esti reverkita laŭ la historia juro, tiam ni nepre ne forgesu, ke la elektoprinco de Brandenburgio siatempe, por siaj prusaj posedaĵoj, estis la vasalo de la pola respubliko.⁵

3 «*Kölnische Zeitung*», 12-a de aŭgusto 1870.

4 En la eldono de 1870 mankis tiu alineo; la sekva ĝis inkluzive la vortoj «de la germana nacio» estis 1870 mallongigita.

5 La ordenlando Prusujo (la posta Orienta Prusujo), de 1525 duklando, fariĝis per la Torna Paco (1466) pola feŭdo kaj 1618 fariĝis heredaĵo de la elektoprinco de Brandenburgio, kiu estante prusa duko restis ĝis 1657 pola vasalo. En la milito de

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

Sed la ruzaj patriotoj postulas Alzacon kaj German-Lorenon kiel «materian garantion» kontraŭ francaj agresoj. Ĉar tiu abomeninda preteksto konfuzis multajn stultulojn, ni sentas nin devigataj iom pli detale pritrakti tiun temon.

Estas sendube, ke la ĝenerala formo de Alzaco, kune kun tiu de la kontraŭa rejn bordo, kaj la ekzisto de granda fortikaĵo kiel Strasburgo, proksimume mezvoje inter Bazelo kaj *Germersheim*, tre favorigas francan atakon al suda Germanujo, dum ĝi kaŭzas apartajn malfacilaĵojn al atako el suda Germanujo al Francujo. Estas krome sendube, ke la anekso de Alzaco kaj German-Loreno donus al Sud-Germanujo multe pli fortan landlimon; ĝi tiam estus mastro super la kresto de la Vogezoj en ties plena longeco kaj super la fortikaĵoj kiuj kovras la nordajn montpasejojn. Se ankaŭ Messo estus aneksita, Francujo estus certe por la momento prirabita je du ĉefaj operaciaj bazoj kontraŭ Germanujo, sed tio ne malhelpus ĝin konstrui novajn ĉe Nancio aŭ Verduno. Germanujo posedas Koblencon, Majncon, *Germersheim*, *Rastatt* kaj Ulmon – ĉiuj operaciaj bazoj kontraŭ Francujo – kaj abunde uzis ilin dum tiu ĉi milito; kun kia ŝajno de praveco ĝi povus envii al la francoj Messon kaj Strasburgon, la solajn du gravajn fortikaĵojn kiujn ili havas en tiu regiono?

Krome, Strasburgo endanĝerigas Sud-Germanujon nur dum ĝi estas potenco separita de Nord-Germanujo. De 1792 ĝis 1795, Sud-Germanujo estis neniam atakita de tiu flanko, ĉar Prusujo partoprenis la militon kontraŭ la franca revolucio; sed ekde kiam Prusujo faris 1795 sian apartan pacon⁶ kaj lasis Sud-Germanujon al si mem, komencis la atakoj al Sud-Germanujo, ekde Strasburgo kiel bazo, kaj daŭris ĝis 1809. En la realo, *unuiĝinta* Germanujo povas sendanĝerigi Strasburgon kaj ĉian francan armeon en Alzaco, se ĝi koncentras ĉiujn siajn trupojn inter *Saarlouis* kaj *Landau*, kiel okazis en tiu ĉi milito, kaj avancas aŭ akceptas batalon survoje de Majnco al Messo. Tiom longe, kiom la ĉefa amaso de la germanaj trupoj staras tie, ĉiu armeo eniranta de Strasburgo al Sud-Germanujo estas ĉirkaŭata kaj ĝiaj

Pollando kontraŭ Svedio la duko transiris al la sveda flanko, por des pli bone povi prirabi Polujon. En la Paco de Olivo (3-a de majo 1660) Pollando devis rezigni la suverenecon super Orienta Prusujo.

- 6 La 5-an de aprilo 1795, Prusujo kaj Francujo faris en Bazelo la apartan pacon. Kiel sekvo de tiu pacakordo la unua kontraŭfranca koalicio de la eŭropaj regnoj komencis disfali.

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

ligoj minacataj. Se la nuna milito montris ion, tiam la facilecon ataki Francujon el Germanujo.

Sed sincere dirite, ĉu ne estas absurda kaj anakronisma, deklari militajn konsiderojn principo laŭ kiu estu difinitaj naciaj landlimoj? Se sekvi tiujn regulojn, Aŭstrujo povus pretendi Venecion kaj la Mincio-linion, kaj Francujo la reĵnan linion, por protekti Parizon, kiu estas certe pli elmetita al atakoj el nordoriento ol Berlino el sudokcidento. Se la landlimoj estus difinitaj laŭ militaj interesoj, la pretendoj neniam ĉesus, ĉar ĉiu militisma linio estas nepre mankhava kaj plibonigebla per anekso de pliaj teritorioj; kaj krome ĝi estas neniam definitive kaj juste difinebla, ĉar ĝi estas ĉiam trudata de la venkinto al la venkito kaj sekve portas en si jam la ĝermon de nova milito.

Jen la instruo de ĉia historio: Estas kun la nacioj kiel kun unuopuloj. Por forpreni al ili la eblecon ataki, oni devas senigi ilin je ĉiaj defendiloj. Oni devas ne nur kapti ilin ĉe la gorĝo, sed ankaŭ mortigi. Se iam konkeranto prenis «materiajn garantiojn» por rompi la fortojn de nacio, tiam tiu estis Napoleono la 1-a, per sia traktato de Tilsito⁷ kaj la maniero laŭ kiu li plenumis ĝin kontraŭ Prusujo kaj la cetera Germanujo. Kaj tamen, kelkajn jarojn poste, lia giganta potenco disrompiĝis kiel putrinta kano antaŭ la germana popolo. Kio estas la «materiaj garantioj», kiujn Prusujo en siaj plej sovaĝaj revoj povas aŭ rajtas trudi al Francujo, kompare kun tiuj, kiujn Napoleono la 1-a trudis al ĝi mem? La rezulto estos ĉi-foje ne malpli

7 Paco de Tilsito: Packontraktoj faritaj la 7-an kaj 9-an de julio 1807 inter la napoleona Francujo kaj la partoprenantoj de la kvara kontraŭfranca koalicio, Rusujo kaj Prusujo, post kiam ili malvenkis en milito. La packondiĉoj estis ekstreme pezaj por Prusujo, kiu perdis gravan parton de sia teritorio, interalie ĉiujn posedaĵojn okcidente de Elbo. Rusujo ne spertis teritoriajn perdojn, sed gajnis eĉ la distrikton Bjalistoko, kiu transiĝis de Prusujo al Rusujo. Sed la caro Aleksandro la 1-a devis agnoski la francajn konkerojn en Germanujo kaj la teritoriajn ŝanĝojn faritajn tie de Napoleono la 1-a kaj la napoleonan suverencon super la Joniaj Insuloj. Li devis krome deklari sian konsenton pri la starigo de la grandduklando Varsovio, kiu fariĝis regiono de koncentrado de trupoj de la francoj ĉe la landlimoj de Rusujo, kaj aliĝi al la blokado kontraŭ Anglujo (la tielnomata kontinenta baro). La rabopaco diktita de Napoleono la 1-a provokis fortajn malkontentojn inter la loĝantaro de Germanujo kaj kreis per tio la kondiĉojn por la liberiga movado, kiu 1813 plene disvolviĝis kontraŭ la napoleona fremdregado.

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

pereiga. La historio kalkulos sian punon ne laŭ la grandeco de la kvadratmejlaj elŝiritaj el Francujo, sed laŭ la grandeco de la krimo, ke oni en la dua duono de la 19-a jarcento denove starigis la politikon de konkero.

La ĉefaj parolantoj de la germanŝovinisma patriotismo diras: Sed ne konfuzu la germanojn kun la francoj. Ni ne volas gloron, ni volas sekurecon. La germanoj estas esence pacama popolo. En ilia prudenta protekto, eĉ la konkero transformiĝas el kaŭzo de estontaj militoj en garantiaĵon de eterna paco. Komprenoble ne estis Germanujo kiu agesis 1792 Francujon kun la edifa celo per bajonetoj mortbati la revolucion de la 18-a jarcento! Ĉu ne estis Germanujo kiu makulis siajn manojn dum la subjugigo de Italujo, la subpremo de Hungarujo kaj dispecigo de Pollando? Ĝia nuna militisma sistemo, kiu dividas la tutan fortan viran loĝantaron en du partojn – konstantan armeon en servo kaj alian konstantan armeon en forpermeso –, ambaŭ same devigitaj al pasiva obeo al la difavoraj regantoj, tia militisma sistemo estas komprenoble «materia garantio» de la mondpaco kaj krome la plej alta celo de la civilizacio! En Germanujo, kiel ĉie, la korteganoj de la ekzistanta potenco venenas la publikan opinion per incenso kaj mensoga memlaŭdo.

Ili ŝajnigas indigni ĉe vido al la francaj fortikaĵoj Messo kaj Strasburgo – tiuj germanaj patriotoj –, sed ili ne vidas maljuston en la giganta sistemo de moskvaj fortikaĵoj de Varsovio, *Modlin* kaj *Ivangorod*. Dum ili timtremas antaŭ la hororo de bonapartistaj atakoj, ili fermas la okulojn antaŭ la honto de carista patroneco.

Tute kiel en 1865 estis interŝanĝitaj promesoj inter Louis Bonaparte kaj Bismarko, same inter 1870 inter Gorĉakov kaj Bismarko⁸. Tute kiel Louis

8 En oktobro 1865 Bismarko akiris ĉe renkontiĝo kun Napoleono la 3-a en *Biarritz* fakte la konsenton de Francujo pri prusa-itala alianco kaj pri milito de Prusujo kontraŭ Aŭstrujo. Napoleono, kiu per ĉiaj rimedoj de diplomatia intrigo instigis al milito inter Prusujo kaj Aŭstrujo, konsentis pri tio, ĉar li supozis ke la milito estos longedaŭra kaj donos al li okazon, ĉe malvenko de Prusujo, aperi kiel arbitracianto kaj profitanto.

Ĉe eksplodo de la germana-franca milito, la cara ministro pri eksteraj aferoj Gorĉakov dum interparolado kun Bismarko en Berlino asertis, ke Ruslando konservos pri la milito bonvoleman neŭtralecon kaj faros diplomatian premon sur Aŭstrujo. La prusa registaro siavice devontigis sin ne malhelpi la caran

Bonaparte flatis sin ke la milito de 1866 per reciproka elĉerpiĝo de Aŭstrujo kaj Prusujo faros lin ĉefa arbitracianto super Germanujo, tiel same flatis sin Aleksandro ke la milito de 1870, per reciproka elĉerpiĝo de Germanujo kaj Francujo, faros lin ĉefa arbitracianto super la eŭropa okcidento. Tute same kiel la dua imperio konsideris la Nordgermanan Federacion⁹ neakordigebla kun sia ekzisto, tiel same la aŭtokrata Ruslando devas sin kredi endanĝerigita de germana imperio sub prusa gvidado. Tio estas la leĝo de la malnova politika sistemo. Ene de tiu tereno, la gajno de iu estas la perdo de la alia. La grandega influo de la caro en Eŭropo radikas en lia tradicia reganteco super Germanujo. En momento, en kiu vulkanecaj fortoj en Ruslando mem minacas skui la plej profundajn fundamentojn de la aŭtokratio, ĉu tiam la caro povas toleri malfortiĝon de sia pozicio fronte al la eksterlando? Jam la moskvaj gazetoj ripetas la saman lingvaĵon kiel la bonapartistaj ĵurnaloj post la milito de 1866. Ĉu la germanaj ŝovinistoj vere kredas, ke libereco kaj paco¹⁰ de Germanujo estas sekuraj, se ili trudas Francujon en la brakojn de Ruslando? Se la fortune de la armiloj, la senbrideco pro la sukceso kaj dinastaj intrigoj delogas Germanujon rabi francajn teritoriojn, tiam restos al ĝi nur du vojoj. Aŭ ĝi devos, kun ĉiaj konsekvencoj, fariĝi la evidenta servisto de rusa ampleksiĝo¹¹, aŭ ĝi devos post mallonga paŭzo armi sin por

Ruslandon ĉe ĝia politiko en la proksimorienta demando.

9 La Nordgemana Federacio estis germana federacia ŝtato, kiu estis starigita 1867 sub gvidado de Prusujo post ties venko en la prusa-aŭstra milito, anstataŭ la disfalinta Germana Federacio. En la Nordgemana Federacio estis unuiĝintaj 19 germanaj ŝtatoj kaj tri Liberaj Urboj, kiuj estis formale agnoskitaj memstaraj. La konstitucio de la Nordgemana Federacio certigis al Prusujo ties hegemonion; la prezidon de la federacio rajtis la prusa krono, Prusujo devis decidi pri la ekstera politiko; la reĝo de Prusujo estis deklarita federacia militestro. La leĝdonaj rajtoj de la regna parlamento [*Reichstag*] de la Nordgemana Federacio, kiu estis elektita laŭ la ĝenerala voĉdonrajto, estis ekstreme limigitaj. La leĝoj deciditaj de ĝi ekvalidis post aprobo de la Federacia Konsilantaro, kiu estis laŭ sia konsisto reakcia, kaj post promulgo fare de la prezido. 1870 estis anigitaj al la Federacio Bavario, Badeno, Virtembergo kaj Hesujo-Darmstado, kiuj ĝis tiam estis ekster la Federacio. La starigo de la Nordgemana Federacio estis paŝo antaŭen survoje al la nacia unueco de Germanujo. La Federacio ekzistis ĝis la fondiĝo de la Germana Imperio en 1871.

10 En la eldono de 1870: sendependeco, libereco kaj paco.

11 En la eldono de 1870 sekvas: politiko kongrua kun la tradicio de la Hohencoloj [la dinastio de la prusaj reĝoj, -vl].

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

nova «defenda» milito, ne por unu el la novbakitaj «loke tenataj» militoj, sed por rasa milito kontraŭ la aliancitaj rasoj de slavoj kaj romanoj.¹²

La germana laborista klaso energie subtenis la militon, kiun malhelpi ĝi ne povis, kiel militon por la sendependeco de Germanujo kaj por la liberigo de Germanujo kaj Eŭropo el la premsonĝo de la dua imperio. Estis la germanaj industrilaboristoj, kiuj kune kun la kamparaj laboristoj liveris la tendenojn kaj muskolojn de heroaj armeoj dum ili lasis hejme siajn duone malsatmortintajn familiojn. Perdinte multajn inter si per la bataloj eksterlande, ili ree perdos multajn per la mizero hejme.¹³ Ili nun siavice postulas «garantiojn», garantiojn ke iliaj gigantaj oferoj ne estu vane faritaj, ke ili konkeris la liberecon, ke la venkoj, kiujn ili certigis super la bonapartistaj armeoj, ne estu transformitaj al malvenko de la germana popolo kiel en la jaro 1815. Kaj kiel unuan el tiuj garantioj ili postulas «*honoran pacon por Francujo*» kaj «*la agnoskon de la franca respubliko*».

La Centra Komitato¹⁴ de la germana socialdemokrata laborista partio publikigis la 5-an de septembro manifeston, en kiu ĝi energie insistis pri tiuj garantioj:

«Ni,» ĝi diris, «ni protestas kontraŭ la anekso de Alzaco-Loreno. Kaj ni estas konsciaj ke ni parolas nome de la germana laborista klaso. En la komuna intereso de Francujo kaj Germanujo, en la intereso de la paco kaj de la libereco, en la intereso de la okcidenta civilizacio kontraŭ orienta barbareco, la germanaj laboristoj ne silente toleros la anekson de Alzaco-Loreno ... Ni estos fidelaj al niaj laboristaj kamaradoj de ĉiuj landoj por la komuna internacia tasko de la proletaro!»¹⁵

12 En la eldono de 1870 sekvas: Jen la pacperspektivo, kiujn la cerbomalsanaj patriotoj de la meza klaso «garantias» al Germanujo.

13 En la eldono de 1870 sekvas: Kaj la patriotaj blekantoj diros al ili konsole, ke la kapitalo ne havas patrujon kaj ke la salajroj estas reguligata per la *malpatriota internacia* leĝo de postulo kaj oferto. Ĉu pro tio ne urĝas la tempo ke la germana laborista klaso prenu la parolon kaj ne plu permesu al la sinjoroj de la meza klaso paroli en *ilia nomo*.

14 En la eldono de 1870: Komitato.

15 La manifesto de la komitato de la Socialdemokrata Laborista Partio (*Eisenach*) al ĉiuj germanaj laboristoj aperis la 5-an de septembro 1870 kiel flugfolio kaj estis publikigita en la «*Volksstaat*» n-ro 73 de la 11-a de septembro 1870. La citaĵo de la manifesto ne estas precize laŭvorta, ĉar ĝi estas retradukita al la germana el la dua angla eldono de la manifesto.

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

Malfeliĉe ni ne povas kalkuli je ilia rekta sukceso. Se la francaj laboristoj meze de paco ne povis haltigi la agresanton, ĉu tie la germanaj laboristoj havas pli da ŝanco haltigi la venkanton meze de armilondrado? La manifesto de la germanaj laboristoj postulas la ekstradicion de Louis Bonaparte, kiel ordinara krimulo, al la franca respubliko. Iliaj regantoj klopodegas por reinstali lin en la *Tuileries*, kiel la plej bonan homon por ruinigi Francujon. Kiel ajn, la historio montros, ke la germanaj laboristoj ne estas faritaj el la sama fleksebla materialo kiel la germana meza klaso. Ili faros sian devon.

Kiel ili, ni salutas la starigon de la respubliko en Francujo, sed samtempe premas nin zorgoj kiuj espereble montriĝos senkaŭzaj. Tiu respubliko ne renversis la tronon, sed nur okupis ties malplenan spacon¹⁶. Ĝi estis proklamita ne kiel socia atingo, sed kiel nacia defenddispono. Ĝi estas en la manoj de provizora registaro, konsistanta parte el konataj orleanistoj, parte el burĝaj respublikanoj; kaj el inter tiuj estas kelkaj, al kiuj la insurekto de junio 1848¹⁷ faris neestingeblan brulvundon. La labordivido inter la membroj de tiu registaro ŝajnas promesi malmultan bonon. La orleanistoj akiris la fortajn poziciojn – de la armeo kaj de la polico –, dum al la supozitaj respublikanoj estas disdonitaj la babil-postenoj. Kelkaj el iliaj unuaj agoj pruvas sufiĉe klare, ke ili heredis de la imperio ne nur amason da ruinoj, sed ankaŭ ĝian timon antaŭ la laborista klaso. Se oni nun en senmezuraj esprimoj promesas neeblajn aferojn en la nomo de la respubliko, ĉu tio ne okazas por provoki la alvokon de «ebla» registaro? Ĉu la respubliko, el vidpunkto de la burĝaro, kiu volonte fariĝus ties entombigisto, ne servu nur kiel transiro al orleanisma restaŭro?

Tiel la franca laborista klaso troviĝas en ekstreme malfacilaj kondiĉoj. Ĉia provo renversi la novan registaron, dum la malamiko preskaŭ jam frapas ĉe la pordo de Parizo, estus malespera malsaĝeco. La francaj laboristoj devas fari sian devon kiel civitanoj¹⁸, sed ili devas ne lasi sin regi de la naciaj memoroj de 1792, kiel la francaj kamparanoj lasis sin trompi per la naciaj memoroj pri la unua imperio.¹⁹ Ilia tasko ne estas ripeti la pasintecon,

16 En la eldono de 1870: ties lokon malplenigitan de germanaj bajonetoj.

17 Insurekto de junio 1848: la heroa ribelo de la parizaj laboristoj de la 23-a ĝis la 26-a de junio 1848.

18 En la eldono de 1870 sekvas: kaj ili faras ĝin.

19 Naciaj memoroj pri la Unua Imperio: la simpatioj, kiujn Louis Bonaparte kiel nevo de Napoleono la 1-a havis ĉe la kamparanoj. Tiuj vidis en Napoleono la 1-a

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

sed konstrui la estonton. Ili trankvile kaj decidite uzu la rimedojn kiujn donas al ili la respublika libereco por solide organizi sian propran klason. Tio donos al ili novajn, herkulajn fortojn por la renaskiĝo de Francujo kaj por nia komuna tasko – la liberigo de la proletaro. De iliaj forto kaj saĝeco dependas la sorto de la respubliko.

La anglaj laboristoj jam elpaŝis, per sana premo deekstere, por rompi la malemon de sia registaro agnoski la francan respublikon.²⁰ Tiu nuna hezitado de la angla registaro estas verŝajne destinita kompensi la militon de 1792 kontraŭ la jakobenoj, kiel ankaŭ la antaŭa maldeca urĝo per kiu ĝi konsentis la ŝtatenverŝon.²¹ La anglaj laboristoj postulas krome de sia registaro ke ĝi kontraŭstaru per siaj tutaj fortoj al la dispecigo de Francujo, kiun senhonte postulas parto de la angla gazetaro²². Tiu estas la sama gazetaro kiu dum dudek jaroj diigis Louis Bonaparte kiel la providencon de Eŭropo kaj tondre aplaudis la ribeladon de la usonaj sklavistoj. Nun kiel tiam ĝi agaĉas por la sklavisto.

La sekcioj de la Internacia Laborista Asocio en ĉiuj landoj alvoku la laboristan klason al aktiva movado. Se la laboristoj forgesas sian devon, se ili restas pasivaj, la nuna terura milito estus nur antaŭulo de pli teruraj inter-

la defendanton de iliaj atingoj el la Franca Revolucio kontraŭ la feŭda-monarĥisma restaŭro kaj la eksterlanda interveno, ĉe kio ili pretervidis aŭ forgesis, ke Napoleono la 1-a defendis precipe la interesojn de la grandburĝaro riĉiĝinta en la revolucio kaj per siaj militoj trudis al la franca popolo eksterordinarajn sang-ferojn.

- 20 Markso parolas pri la movado de la anglaj laboristoj por subteno kaj diplomatia agnosko de la Franca Respubliko proklamita la 4-an de septembro 1870. Jam la 5-an de septembro okazis, kun aktiva subteno de la *Trade-Unions*, en Londono, Birminghamo, *Newcastle* kaj aliaj urbegoj amasaj mitingoj kaj manifestacioj, ĉe kiuj la laboruloj per rezolucioj kaj peticioj esprimis sian simpatian por la Franca Respubliko kaj postulis ĝian agnoskon. La Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia kaj Markso persone faris gravan laboron en tiu movado.
- 21 Aludo al la aktiva partopreno de la burĝa-aristokrata Anglujo en la starigo de la koalicio de la absolutismaj feŭdoregnoj, kiuj komencis 1792 la militon kontraŭ la revolucia Francujo (Anglujo ek militis 1793). La reganta oligarĥio en Anglujo krome agnoskis la unua en Eŭropo la reĝimon starigitan per la ŝtatenverso de Louis Bonaparte la 2-an de decembro 1851.
- 22 En la eldono de 1870 tiu subfrazo tekstas: kiu estas de parto de la angla gazetaro kompreneble tiom brue favorata kiom de la germanaj patriotoj.

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

naciaj bataloj kaj en ĉiuj landoj kondukos al novaj malvenkoj fare de la moŝtoj de la spado, de la grandbieno kaj de la kapitalo.

Vive la république!²³

La Ĝenerala Konsilantaro

Robert Applegarth, Martin J. Boon, Fred. Bradnick,
Caihil, John Hales, William Hales, George Harris, Fred.
Leßner, Lopatin, B. Lucraft, George Milner, Thomas
Mottershead, Charles Murray, George Odger, James
Parnell, Pfänder, Rühl, Joseph Shepherd, Cowell
Stepney, Stoll, Schmutz

Korespondantaj sekretarioj

Eugène Dupont, por Francujo
Giovanni Bora, por Italio
Karlo Markso, por Germanujo kaj Ruslando
Zévy Maurice, por Hungario
Antoni Zabicki, por Pollando
A. Serraillier, por Belgio, Nederlando kaj Hispanio
James Cohen, por Danlando
Hermann Jung, por Svislando
J. G. Eccarius, por Usono

William Townshend, prezidanto
John Weston, kasisto
J. George Eccarius, ĝenerala sekretario

Oficejo: 256, High Holborn, Londono, W. C.
la 9-an de septembro 1870

23 En la eldono de 1870: [germane:] Vivu la respubliko!

Karlo Markso: Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro

[Verkita inter la 6-a kaj 9-a de septembro 1870.

Laŭ: «Der Bürgerkrieg in Frankreich» [«La interna milito en Francujo»].

Tria germana eldono, Berlino 1891.]

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

Mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio

*Al la membroj
de la Internacia Laborista Asocio
en Eŭropo kaj Usono*

I

La 4-an de septembro 1870, kiam la parizaj laboristoj proklamis la respublikon, kiun ovaciis preskaŭ sammomente la tuta Francujo sen ajna voĉo de kontraŭdiro – tiam intrigantoj de postenavidaj advokatoj, kun Thiers kiel politikisto kaj Trochu kiel generalo, transprenis la *Hôtel de Ville* (urbodomon). Tiuj homoj tiam kredis tiom firme je la destino de Parizo (prezenti Francujon en ĉiuj epokoj de historia krizo ke, por pravigi siajn uzurpitajn titolojn de regentoj de Francujo, ŝajnis al ili sufiĉe montri siajn eksvalidajn mandatojn kiel deputitoj de Parizo. En nia dua mesaĝo pri la lasta milito, kvin tagojn post la supriĝo de tiuj homoj, ni diris al vi kiuj ili estas. Kaj tamen, en la ŝtormo de la surpriza preno, kun la veraj gvidantoj de la laboristoj ankoraŭ en la malliberejoj de Bonaparte, kaj kun la prusoj jam en plena marŝo sur Parizo, Parizo toleris la ekprenon de la ŝtatpotenco; sed nur kun la eksplicita kondiĉo ke tiu ŝtatpotenco servu sole nur cele al la nacia defendo. Sed Parizo ne estis defendebla sen armi ĝian laboristan klason, transformi ĝin en uzeblan militpotencon kaj instrui ĝiajn vicojn per la milito mem. Sed armita Parizo, tio estas la armita revolucio. Venko de Parizo super la prusa atakanto estintus venko de la franca laboristo super la franca kapitalisto kaj ties ŝtatparazitaj. En tiu malakordo inter nacia devo kaj klasintereso la registaro de la nacia defendo hezitis eĉ ne momenton – ĝi transformiĝis en registaron de la nacia perfido.

Ĝia unua ago estis sendi Thiers al migrado al ĉiuj kortegoj de Eŭropo por almozpeti tie pri perado kun la oferto interŝanĝi la respublikon kontraŭ reĝo. Kvar monatojn post la eksieĝo, kiam la momento ŝajnis taŭga por prononci la unuan vorton pri kapitulaco, Trochu, en ĉeesto de Jules Favre kaj pliaj registaranoj, alparolis la kunvenintajn maires (distriktajn urbestrojn) de Parizo kiel sekvas:

I

«La unua demando, kiu estis starigita al mi de miaj kolegoj, ankoraŭ la saman vesperon de la 4-a de septembro, estis tiu: Ĉu Parizo povas, kun ia ekspekto de sukceso, elteni sieĝon de la prusa armeo? Mi ne hezitis nei tion. Pluraj de miaj ĉi tie ĉeestantaj kolegoj atestos pri la vero de miaj vortoj kaj pri mia insistado pri tiu opinio. Mi diris al ili, per tiuj samaj vortoj, ke, laŭ la stato de la aferoj, la provo, teni Parizon kontraŭ prusa sieĝo, estus malsaĝaĵo. Sendube, aldonis mi, heroa malsaĝaĵo; sed tio estus jam ĉio ... La okazaĵoj» (kiujn li gvidis mem) «ne dementis mian antaŭdiron.»¹

Tiu simpatia paroladeto de Trochu estis poste publikigita de unu el la ĉeestintaj maires, s-ro Corbon.

Do: En la sama vespero, en kiu estis proklamita la respubliko, estis konata al la kolegoj de Trochu, ke la «plano» de Trochu konsistis el la kapitulaco de Parizo. Se la nacia defendo estintus pli ol nura preteksto por la persona regado de Thiers, Favre kaj kompanio – la supren-venintoj de la 4-a de septembro demisiintus la 5-an, estus sciigintaj la parizan popolon pri la «plano» de Trochu kaj estus instigintaj ĝin aŭ kapitulaci tuj aŭ preni sian propran sorton en siajn proprajn manojn. Sed anstataŭ tio, la senhonoraj trompistoj decidis kuraci la «heroan malsaĝaĵon» de Parizo per malsato kaj sangaj kapoj kaj intertempe stultigi ĝin per fanfaronaj manifestoj, kiel ekz-e: «Trochu, la guberniestro de Parizo, neniam kapitulacos!»², kaj Jules Favre, la ekstera ministro, «ne cedos eĉ colon de nia teritorio nek ŝtoneton de niaj fortikaĵoj»³. En letero al Gambetta, tiu sama Jules Favre konfesas ke tio, kontraŭ kio ili «defendis» sin, ne estis la prusaj soldatoj, sed la parizaj laboristoj. Dum la tuta sieĝotempo, la bonapartistaj friponoj, al kiuj Trochu konscie konfidis la komandon de la pariza armeo, esprimis en sia konfidenca korespondado maldecajn ŝercojn pri la bone komprenita moko de la defendo. Oni rigardu ekzemple la korespondaĵojn de Alphonse-Simon Guiod, ĉefkomandanto de la artilerio de la pariza armeo, granda kruco de la Honora Legio, al Susane, divizigeneralo de la artilerio, korespondaĵo pub-

1 «*Le Figaro*», 19-a de marto 1871.

2 «*Le Temps*», 9-a de januaro 1871.

3 «*Le Temps*», 8-a de septembro 1870.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

likigita de la Komunumo.⁴ Fine, la 28-an de januaro⁵, ili deprenis la trompomaskojn. Kun la tuta heroa kuraĝo de la plej granda humiliĝo la registaro de la nacia defendo elpaŝis en la kapitulaco de Parizo, kiel la registaro de Francujo per la kaptitoj de Bismarko – rolo de tioma fieco ke eĉ Louis Napoleon en Sedano time detenis sin de tio. Post la 18-a de marto, en sia sovaĝa fuĝo al Versajlo, la «*Capitulards*»⁶ postlasis la dokumentan pruvon de sia perfido en Parizo. Por detrui tiun, diras la Komunumo en iu siaj manifestoj al la provincoj, «tiuj homoj ne hezitus transformi Parizon en ruinegon ĉirkaŭatan de sangomaro.»⁷

Sed por alvenigi tian rezulton, kelkaj ĉefaj membroj de la defendoregistro havis krome ankoraŭ tute apartajn privatajn kialojn.

4 La letero de Alphonse-Simon Guiod al Susane estis publikigita en la «*Journal Officiel de la République française*», Parizo, 25-a de aprilo 1871.

«*Journal Officiel de la République française*»: oficiala organo de la Pariza Komunumo, kiu aperis de la 20-a de marto ĝis la 24-a de majo 1871 en Parizo; la gazeto konservis la nomon de la registara gazeto de la Franca respubliko eldonatan en Parizo ekde la 5-a de septembro 1870. Nur la numero de la 30-a de marto havis la titolon «*Journal Officiel de la Commune de Paris*». Dum la Pariza Komunumo, ankaŭ la organo de la Thiers-registaro aperis sub la titolo «*Journal Officiel de la République française*».

5 Temas pri la konvencio pri la batalhalto kaj la kapitulaco de Parizo, subskribitaj de Bismarko kaj Jules Favre la 28-an de januaro 1871. La rifuzo de la registaro de nacia defendo, plu rezisti al la prusaj konkerantoj, kaj la hontinda kapitulaco de Parizo estis perfido de la naciaj interesoj de Francujo. La dominantaj klasoj de Francujo, strebantaj uzi ĉiajn fortojn por subpremi la revolucian movadon, oferis por tio la naciajn interesojn de la lando. Per sia subskribo de la konvencio, Favre deklaris sian konsenton kun la humiligaj postuloj de la prusoj: pago de militkontribuaĵo de 200 milionoj da frankoj ene de du semajnoj, transdono de la plej granda parto de la parizaj fortikaĵoj, transdono de la kampartilerio kaj de la militmaterialo de la pariza armeo al la germanaj instancoj. Bismarko kaj Favre tamen ne kuraĝis meti en la konvencion interkonsenton pri senarmigo de la nacia gvardio, ĉar tiu konsistis plejgrandparte el laboristoj. En la konvencio estis krome planite, okazigi kiom eble plej rapide elekton de nacia asembleo, kiu devus decidi pri la demando ĉu daŭrigi la militon aŭ fari packontrakton.

6 *Capitulards* (kapitulaculoj): tiel estis nomataj dum la sieĝo de Parizo la homoj kiuj perforte argumentis por kapitulaco, dum la loĝantaro pretis defendi sian urbon.

7 «*Le Vengeur*», 28-a de aprilo 1871.

Mallonge post komenco de la armistico, Millièrè, deputito de Parizo por la Nacia Asembleo, nun mortpafita laŭ ekspresa ordono de Jules Favre, publikigis serion da aŭtentaj tribunalaj dosieroj por pruvi ke Jules Favre, vivanta en eksterleĝa edzeco kun edzino de drinkulo vivanta en Alĝero, per ekstreme aŭdaca akumulado de falsaĵoj, kiuj okazis dum longa vico da jaroj, en la nomo de la infanoj de lia adulto fraŭde akiris grandan heredaĵon kaj per tio fariĝis riĉulo; kaj ke, en proceso entreprenita de la laŭleĝaj heredantoj, li eskapis al la malkovro nur per la aparta favoro de la bonapartistaj juĝejoj. Ĉar ne eblis forviŝi tiujn sekajn tribunalajn dosierojn, eĉ ne per la plej grandaj retorikaj fortoj, Jules Favre por la unua fojo en sia vivo fermis la buŝon, silente atendente la eksplodon de la interna milito, por tiam misfamigante la parizan popolon kiel bandon de eskapintaj malliberuloj, en plena ribelo kontraŭ familio, religio, ordo kaj proprio. Kaj tiu sama falsisto, apenaŭ veninte al potenco, li tuj post la 4-a de septembro kunsente liberigis Pic kaj Taillefer, kiuj ambaŭ, eĉ sub la imperio, estis kondamnitaj pro falsado okaze de la skandalo pri la gazeto «*L'Étendard*»⁸. Unu el tiuj nobluloj, Taillefer, havis la impertinenton sub la Komunumo eniri Parizon, kie li estis tuj enfermita; kaj post tio, Jules Favre kriis, de la tribuno de la nacia asembleo al la mondo, ke la parizanoj liberigas ĉiujn siajn malliberulojn!

Ernest Picard, la Karl Vogt⁹ de la registaro de la nacia defendo, kiu nomumis sin mem ministro pri internaj aferoj de la respubliko, post vane alstrebinte fariĝi ministro pri internaj aferoj de la imperio – estas la frato de certa Arthur Picard, elpuŝita kiel trompisto el la pariza borso (raporto de la pariza polic-prefekturo de la 31-a de julio 1867) kaj laŭ propra konfeso konviktita pri ŝtelo de 300.000 frankoj, farita kiel direktoro de filio de la *Société générale*¹⁰, rue Palestro n-ro 5 (raporto de la polic-prefektejo de la

8 «*L'Étendard*»: gazeto de bonapartista tendenco; aperis de 1866 ĝis 1868 en Parizo. Post malkaŝo de la trompaĵoj, kiuj servis al la gazeto kiel financofondo, ĝi devis ĉesigi sian aperadon.

9 En la angla eldono: Joe Miller, en la franca: Falstaff.

10 *Société générale de crédit mobilier*: franca akcibanko, fondita de la fratoj Péreire kaj leĝe agnoskita laŭ dekreto de la 18-a de novembro 1852. Ĉefa celo de la *Crédit mobilier* estis la perado de kreditoj kaj la fondado de industriaĵoj kaj aliaj entreprenoj. Ĝia plej granda enspezofonto estis la borsa spekulado per valor-paperoj de la akciaj societoj fonditaj de ĝi. La banko estis intime ligita kun la registaro de Napoleono la 3-a kaj ĝuis ties protekton. 1867 ĝi bankrotis, kaj 1871

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

11-a de novembro 1868). Tiun Arthur Picard, Ernest Picard nomumis redaktisto de sia gazeto «*L'Électeur libre*».¹¹ Dum la ordinara speco de borsuloj estis trompataj de la oficialaj mensogoj de tiu ministreja gazeto, Arthur Picard kuris alen kaj reen inter la ministrejo kaj la borso kaj tie transformis la malvenkojn de la francaj armeoj en kontantan profiton. La tuta ofica korespondaĵo de tiu fratoparo falis en la manojn de la Komunumo.

Jules Ferry, antaŭ la 4-a de septembro senmona advokato, sukcesis, kiel urbestro de Parizo dum la sieĝo eltrompi el la malsatmizero kapitalon por si. La tago en kiu li devos respondeci pri sia malversacio estos ankaŭ la tago de lia kondamno.

Tiuj homoj povis trovi siajn *tickets-of-leave*¹² nur en la ruinoj de Parizo; ili estis ĝuste la homoj kiujn Bismarko bezonis. Iomete da prestidigitado – kaj Thiers, ĝis tiam la sekreta flustristo al la registaro, aperis nun kiel ĝia pinto, kun la ticket-of-leave-uloj kiel ministroj.

Thiers, tiu nana monstro, fascinis la francan burĝaron dum pli ol duona jarcento, ĉar li estas la perfekta mensa esprimo de ĝia propra malmoraleco. Antaŭ ol fariĝi politikisto, li jam demonstris sian forton en mensogado kiel historiografo. La kroniko de lia publika vivo estas la historio de la malfeliĉoj de Francujo. Aliancita, antaŭ 1830, kun la respublikanoj, li kaptis sub Louis Philippe ministropostenon, perfidante sian protektanton Laffite. Ĉe la reĝo li enflatiĝis per incitado de plebaj ekscesoj kontraŭ la klerikaro, dum kiuj la preĝejo *Saint Germain l'Auxerrois* kaj ĉefepiskopa palaco estis elrabitaj, kaj per sia konduto al la dukino de Berry, ĉe kiu li ludis samtempe la rolon de ministrospliono kaj mallibereja akuŝisto.¹³ Lia faro estis la

okazis ĝia likvidiĝo. La karaktero de la *Crédit mobilier* malkaŝiĝis en serio da artikoloj publikigitaj en la «*New-York Daily Tribune*».

11 «*L'Électeur libre*»: semajngazeto, post eksplodo de la germana-franca milito taggazeto; organo de la dekstraj respublikanoj; aperis de 1868 ĝis 1871 en Parizo; 1870 kaj 1871 intime ligita kun la ministrejo pri financoj de la registaro de nacia defendo.

12 En Anglujo oni donas al komunjuraj krimuloj post trasufero de la pli granda parto de ilia puno ofte forpermes-biletojn, per kiuj ili estas ellasitaj, sed metitaj sub polican kontrolon. Tiuj biletoj nomiĝas *tickets-of-leave* kaj iliaj posedantoj *ticket-of-leave-men*. [Noto de Engelso al la germana eldono de 1871.]

13 Aludo al la agadoj la 14/15an de 1831 en Parizo direktitaj kontraŭ la legitimistoj

I

masakro al la respublikanoj en la rue Transnonain, lia faro la postsekvaj fiaj septembraj leĝoj kontraŭ la gazetaro kaj kontraŭ la rajtoj de la asocioj.¹⁴ 1840, kiam li reaperis kiel ministroprezidanto, li mirigis Francujon per sia plano fortikigi Parizon.¹⁵ Al la respublikanoj, kiuj akuzis tiun planon kiel komploton kontraŭ la libereco de Parizo, li respondis en la ĉambro de la deputitoj:

«Kiel? Vi imagas, ke fortikaĵoj povas iel endanĝerigi la liberecon? Antaŭ ĉio, vi kalumnias ĉian eblan registaron, se vi supozas ke ĝi iam povus provi daŭrigi sian

kaj la klerikuloj kaj trovis eĥon en la provincoj. Proteste kontraŭ manifestacio de la legitimistoj okaze de funebra ceremonio de la duko de Berry, la amaso detruis la preĝejon *St-Germain l'Auxerrois* kaj la palacon de la ĉefepiskopo Quélen, kiu estis konata pro sia simpatio por la legitimistoj. La orleanisma registaro volis frapi la malamikan partion de la legitimistoj kaj pro tio ne faris disponojn por reteni la amason. Thiers, kiu ĉeestis la detruadon de la preĝejo kaj de la ĉefepiskopa palaco, influis la nacigvardianojn por ke ili ne malhelpu la amason en ĝiaj agadoj. 1832 Thiers – tiam ministro pri internaj aferoj – arestigis la dukinon de Berry, la patrino de la tronpretendanto de la legitimistoj, de la grafo Chambord. En la malliberejo ŝi estis submetita al malhonoriga kuracista kontrolo. Oni volis uzi ŝian sekretan edzinecon kun napola nobelo kaj ŝian gravedecon por kompromiti ŝin politike.

- 14 Markso referencas la fian rolon kiun ludis *Thiers* (tiam ministro pri internaj aferoj) 1834 en la subpremo de la ribelo de la parizaj laboristoj. La 13-an kaj 14-an de aprilo 1834 okazis en Parizo ribelo de la laboristoj kaj de la aliĝantaj etburgaj tavoloj, kiuj batalis por la respubliko kontraŭ la reĝimo de la burĝa julimonarĥio. Ĉe la pinto de la ribelo staris la sekreta respublikana-demokratia societo de homrajtoj. La subpremo de la ribelo estis akompanata de senbridaj kruelaĵoj de la fisoldataro kaj de sangaj venĝoj de la registaro kontraŭ la demokratio. Ekzemple, ĉiuj loĝantoj de domo en la *Rue Transnonain* estis brutale murditaj. *Thiers* estis la ĉefa iniciatinto de tiuj kruelaj persekutoj.

Fiaj septembraj leĝoj: reaciaj leĝoj dekretitaj en septembro 1835 de la franca registaro kun referenco al la atenco kontraŭ la reĝo Louis Philippe la 28-an de julio. Ili limigis la agadon de la asizaj tribunaloj kaj enkondukis severajn disponojn kontraŭ la gazetaro, ekzemple la altigon de la kaŭcioj por periode aperantaj presaĵoj, malliberejon kaj altajn monpunojn por aŭtoroj de publikigaĵoj direktitaj kontraŭ la proprieto kaj la ekzistanta ŝtato.

- 15 En januaro 1841 Thiers prezentis al la ĉambro de deputitoj projekton de refortikado de Parizo. La revoluciaj demokrataj rondoj konsideris tiun projekton prepar-disponoj por subpremo de popolaribeloj. Thiers trudis sian planon sub preteksto

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

regadon per bombado de Parizo ... tia registaro estus post la venko centoble pli neebla ol antaŭe.»¹⁶

Efektive, nenia registaro estus iam ajn kuraĝinta bombadi Parizon ekde la fortikaĵoj, escepte la registaro kiu antaŭe liveris tiujn samajn fortikaĵojn al la prusoj.

Kiam la reĝo Bomba provis tion 1848 pri Palermo,¹⁷ Thiers leviĝis, tiam jam delonge ne plu ministro, refoje en la ĉambro:

«Vi scias, sinjoroj, kio okazas en Palermo. Vi ĉiuj tremas pro hororo» (en la parlamenta senco), «kiam vi aŭdas ke dum kvardek ok horoj granda urbo estis bombata – de kiu? Ĉu de fremda malamiko, aplikante la militan juron? Ne, sinjoroj, de sia propra registaro. Kaj pro kio? Ĉar la malfeliĉa urbo postulis siajn rajtojn. Kaj pro la postulado de siaj rajtoj ĝi ricevis kvardek ok horojn da bombado ... Permesu al mi alvoki la opinion de Eŭropo. Signifas fari servon al la humaneco, se oni levas sin kaj de la eble plej granda tribunio de Eŭropo reehigas kelkajn vortojn» (jes ja, vortojn!) «de indigno kontraŭ tiaj faroj. Kiam la regento Espartero, kiu estis farintaj servojn al sia lando» (kaj tio estis pli ol Thiers iam ajn faris) «intencis bombi Barcelonon por subpremi ribelon, tiam leviĝis de ĉiuj flankoj de la mondo ĝenerala kriego de indigno.»¹⁸

Dek-ok monatojn poste, Thiers troviĝis inter la plej ardaj defendantoj de la bombado al Romo fare de franca armeo.¹⁹ La eraro de la reĝo Bomba ŝajnas efektive konsisti nur en tio ke li limiĝis sian bombardon al kvardek ok

ke la defendaj instalaĵoj de Parizo estu fortikendaj. Tamen estis klare ke li konstruigis aparte fortajn kaj multajn fortikaĵojn proksime de la laboristaj kvartaloj, en oriento kaj nordoriento de Parizo, por povi pli bone subpremi estontajn popolibelojn.

16 «*Journal Officiel de la République française*», Parizo, 11-a de aprilo 1871.

17 En januaro 1848 la napolaj trupoj de Ferdinando la 2-a, kiu poste pro sia senretena bombado de Mesino en aŭtuno de la sama jaro ricevis la kromnomon reĝo Bomba, pripafis la urbon Palermo. En Palermo okazis, en kunteksto kun la batalo pri konstitucio, popolibelo, kiun Ferdinando la 2-a volis subpremi; sed ĝi fariĝis signalo por la burĝa revolucio de 1848/49 en la italaj ŝtatoj.

18 «*Le Moniteur universel*», 1-a de februaro 1848.

19 En aprilo 1849 la franca registaro, en alianco kun Aŭstrujo kaj Napolo, sendis ekspedician korpuson al Italujo por forigi la Roman Respublikon kaj por restarigi la profanan potencon de la papo. Post la armita interveno kaj la sieĝo de Romo, kiu estis kruele bombita de la francaj trupoj, la Roma Respubliko estis malgraŭ heroa rezistado venkita kaj Romo ekokupata de francaj trupoj.

horoj.

Malmultajn tagojn antaŭ la revolucio de februaro, kruda pro la longa ekzilo de ofico kaj defraŭdo, al kiu Guizot kondamnis lin, kaj flarante en la aero proksimiĝantan popolmovadon, Thiers deklaris, en la falsa hero-stilo, kiu alportis al li la nomon Mirabeau-mouche (Mirabeau-muŝo), al la ĉambro de la deputitoj:

«*Mi apartenas al la partio de la revolucio*, ne nur en Francujo, sed en Eŭropo. Mi deziras ke la registaro de la revolucio restu en la manoj de moderaj viroj ...; sed se tiu ĉi registaro falus en la manojn de perfortuloj, eĉ en tiuj de radikaluloj, mi pro tio tamen ne forlasos mian aferon. Mi ĉiam apartenos al la partio de la revolucio.»²⁰

Venis la februara revolucio. Anstataŭ substitui la ministerion Thiers al la ministerio Guizot, kiel revis la vireto, ĝi anstataŭigis Louis Philippe per la respubliko. La unuan tagon de la venko li zorgeme kaŝis sin, forgesante ke la malestimo de la laboristoj protektis lin antaŭ ilia malamo. Tamen, kun sia delonge konata kuraĝo, li tenis sin for de la publika scenejo ĝis kiam la masakroj de junio²¹ balais ĝin preta por liaspeca agado. Tiam li fariĝis la gvida kapo de la «ordopartio»²² kun ties parlamenta respubliko, tiu anonima intera regno, en kiu ĉiuj diversaj frakcioj de la reganta klaso *kune* konspiradis por la subpremo de la popolo, kaj unu kontraŭ la alian, ĉiu por restarigo de sia propra monarĥio. Tiam kiel nun, Thiers akuzis la respublikanojn esti la sola malhelpo al firmigo de la respubliko; tiam kiel nun li parolis al la respubliko kiel la ekzekutisto al *Don Carlos*: «Mi murdos vin, sed por via propra bono». Nun kiel tiam li devos elkrii, la tagon post sia venko: «*L'Empire est fait!*» – La imperio pretas. Malgraŭ siaj hipokritaj predikoj pri «nepraj liberecoj» kaj sia persona kolero kontraŭ Louis Bonaparte, kiu uzis

20 «*Le Moniteur universel*», 3-a de februaro 1848.

21 Masakroj de junio: la kruela subpremo de la heroa ribelo de la pariza proletaro de la 23-a ĝis la 26-a de junio 1848. La malvenko de la juni-insurekto estis la signalo por la kontraŭevolucio en la eŭropaj landoj.

22 «Ordopartio» (*partie de l'ordre*): koalicio de du monarĥiaj frakcioj de Francujo: la legitimistoj kaj la orleanistoj (favoruloj por la dinastio Orleano). Tiu partio de la konservativa grandburĝaro fondita kiel koalicio kontraŭ la proletaro ludis ekde 1849 ĝis la ŝtatenverso de la 2-a decembro 1851 la ĉefan rolon en la leĝdona asembleo de la Dua Respubliko. La bankroto de ĝia kontraŭpopola politiko estis uzata de la kliko de Louis Bonaparte por ĝiaj celoj.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

lin kaj elĵetis la parlamentismon – kaj ekster la artefarita atmosfero de la parlamentismo nia vireto ŝrumpas, kiel li bone scias, al nenio – malgraŭ ĉio Thiers havis sian manon en ĉiuj fiaĵoj de la dua imperio, de la okupado de Romo de francaj trupoj ĝis la milito kontraŭ Prusujo, al kiu li incitegis per siaj violentaj insultoj kontraŭ la germana unueco – ne kiel masko por la prusa despotismo, sed kiel interveno en la hereditan francan rajton pri la germana malkonkordo. Dum liaj nanaj brakoj emis, antaŭ la rigardo de Eŭropo, svingi la glavon de la unua Napoleono, kies historia ŝupurigisto li fariĝis, lia ekstera politiko ĉiam kulminis en la plej ekstrema humiligo de Francujo, de la londona konvencio de 1841²³ ĝis la pariza kapitulaco de 1871 kaj ĝis la nuna interna milito, en kiu li, kun la altmoŝta permeso de Bismarko, pelis la kaptitojn de Messo kaj Sedano kontraŭ Parizon.²⁴ Malgraŭ la fleksiĝemo de lia talento kaj la ŝanĝiĝemo de liaj celpunktoj, tiu homo estis dum sia tuta vivo katenita al la plej fosilia rutino. Estas klare, ke la iom pli profundaj fluoj de la moderna socio restos por li eterne nevideblaj; sed eĉ la plej evidentaj ŝanĝoj sur la socia surfaco rezistis al lia cerbo, kies tuta vivoforto estis fuĝinta en la langon. Tiel li neniam lacigis akuzi ĉian deflankiĝon de la malnoviĝinta franca sistemo de pretektaj doganaĵoj kiel malsanktigon. Kiel ministro de Louis Philippe li provis fifamigi la

23 La Londona Konvencio de 1841, kiu baris la markolojn de la Nigra Maro por la traveturo de ĉiaj eksterlandaj militŝipoj en pacaj tempoj, estis subskribitaj de reprezentantoj de Rusujo, Anglujo, Francujo, Aŭstrujo kaj Prusujo unuflanke kaj de Turkujo aliflanke la 13-an de julio 1841. Sed la kulmino de la eksterapolitika malvenko de la franca registaro estis la Londona Konvencio de la 15-a de julio 1840, decidita sen partopreno de Francujo. La fakto ke en la tria angla eldono de «La interna milito en Francujo» en tiu ĉi loko, kiel ekzemplo por la diplomatia malvenko de Francujo, estas menciita la Londona Konvencio de 1840, indikas ankaŭ, ke Markso volis ĉi tie referenci tiun laste menciitan okazon.

24 Thiers klopodis por fortikigi la versajlan armeon por pli bone povi subpremi la revolucian Parizon. Li petis Bismarkon pri altigo de la trupokontingento, kiu laŭ la versajla pac-antaŭtraktaĵo ne rajtis superi 40.000 homojn. Thiers certigis Bismarkon ke li uzos la trupon ekskluzive por subpremo de la ribelo en Parizo. Sekve oni permesis al li, per la Ruena Konvencio (28-a de marto 1871) altigi la nombron de la versajlaj trupoj al 80.000 kaj iomete poste al 100.000 homoj. Laŭ tiuj interkonsentoj, la germana armeokomando urĝe resendis la francajn militkaptitojn, precipe tiujn el la armeoj kiuj kapitulacis ĉe Sedano kaj Messo. La versajla registaro lokis tiujn trupopartojn en fermitaj tendaroj, kie ili estis trejnitaj al malamo kontraŭ la Pariza Komunumo.

I

fervojn kiel idiotan blagon; en la opozicio sub Louis Bonaparte li stigmatizis kiel malsanktigon ĉian provon reformi la putrintan francan arme-sistemon. Neniam en sia longa politika kariero li kulpis unu solan, eĉ ne pla plej etan disponon de praktika utilo. Thiers estis konsekvenca nur en sia avido al riĉeco kaj en sia malamo kontraŭ tiuj kiuj produktas ĝin. Li eniris sian unuan ministrejon sub Louis Philippe malriĉa kiel muso preĝeja; li forlasis ĝin milionulo. Kiam lia lasta ministrejo sub la sama reĝo (de la 1-a de marto 1840) kaŭzis al li en la ĉambro publikajn akuzojn pro malversacio, li kontentiĝis respondi per larmoj – jen artiklo pri kiu li same lerte «umas» kiel Jules Favre aŭ ia ajn alia krokodilo. En Bordojo 1871²⁵, lia unua paŝo por savi Francujon kontraŭ la venanta financa bankroto estis tiu provizi sin mem per tri milionoj jare; tio estis la unua kaj lasta vorto de tiu «ŝparema respubliko» kiujn li promesis 1869 al siaj parizaj elektantoj. Unu el liaj antaŭaj kolegoj de la ĉambro de 1830, mem kapitalisto – kio ne malhelpis lin esti sindona membro de la Pariza Komunumo –, s-ro Besley, antaŭnelonge diris en murafiŝo al Thiers:

«La servutigo de la laboro fare de la kapitalo estis ĉiam la fundamento de via politiko, kaj ekde kiam vi vidis la respublikon de la laboro instalita en la pariza urbodomo, vi senĉese kriis al Francujo: 'Vidu tiujn krimulojn!'»

Majstro de eta ŝtatfiaĵo, virtuoza de falsa ĵuro kaj perfido, finlerninta en ĉiuj malnoblaj militruzoj, insidaj trukoj kaj ordinaraj malfidelaĵoj de la parlamenta partibatalo; ĉiam preta, kiam elpuŝita el ofico, instigi al revolucio kaj dronigi ĝin en sango ekde kiam li regas la ŝtaton; kun klasaj antaŭjuĝoj anstataŭ ideoj; kun vanteco anstataŭ koro; lia privata vivo tiom fia kiom lia publika vivo kanajla – li ne povas alie, eĉ nun, ludante la rolon de franca Sulao²⁶, ol plialtigi la naŭzecon de siaj faroj per la ridindeco de sia fanfaronado.

La kapitulaco de Parizo, kiu liveris al la prusoj ne nur Parizon, sed la tutan Francujon, finfaris la longedaŭrajn perfidajn intrigojn kun la malami-ko, kiujn la uzurpantoj de la 4-a de septembro, kiel Trochu diras mem, komencis jam samtage. Aliflanke ĝi komencis la internan militon, kiujn ili nun, kun prusa subteno, devis fari kontraŭ la respubliko kaj Parizo. Jam en

25 En la eldonoj de 1871 kaj 1876 mankas: 1871.

26 Lucio Kornelio Sulao (latinlingve *Lucius Cornelius Sulla*) (naskiĝis en 813 a.n.e., mortis ĉe Kumo en 78 a.n.e.) estis romia politikisto, generalo kaj diktatoro, fifama pro sia krueleco. Vd la pn 10 (p. 11). -vl

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

la vortumo de la kapitulaco mem estis metita la kaptilo. Tiam, pli ol triono de la lando estis en la manoj de la malamiko, la vojoj de la ĉefurbo al la provincoj estis blokitaĵ, ĉiaĵ trafikiloj en malordo. En tiuj kondiĉoj ne eblis elekti veran reprezentaĵon de Francujo, se ne disponeblis plena tempo por prepari tion. Ĝuste pro tio, la kapitulaco postulis ke nacia asembleo estu elektita ene de ok tagoj, tiel ke en kelkaj partoj de Francujo la sciigo pri la farota elekto alvenis nur tagon antaŭe. Krome la asembleo, laŭ eksplicita artikolo en la kapitulaco, estu elektita por la sola celo decidi pri milito kaj paco kaj eventuale fari packontrakton. La popolo devis senti, ke la armistickondiĉoj malebligis la daŭrigon de la milito kaj ke, por konfirmi la pacon truditan de Bismarko, la plej malbonaj homoj en Francujo estas ĝuste la plej bonaj. Sed, ne kontentaj pri tiuj antaŭgardaj disponoj, Thiers, jam antaŭ ol sciigi la parizanojn pri la sekreto de la armistiko, vojaĝis elektokampanje tra la provincoj por revivigi la legitimistan partion,²⁷ kiu nun kun la orleanistoj devis anstataŭi la bonapartistojn, kiuj por la momento fariĝis neakcepteblaj. Li ne timis ilin. Maltaŭgaj kiel registaro de la moderna Francujo kaj pro tio malestimindaj kiel rivaloj – kia partio servus pli bonvene kiel ilo de la reakcio ol la partio, kies agado, laŭ la propraj vortoj de Thiers (ĉambro de la deputitoj, 5-a de januaro 1833),

«ĉiam limiĝis al tiuj tri rimedoj: eksterlanda invado, interna milito kaj anarĥio»²⁸ 62

Sed tiuj, la legitimistoj, kredis envere pri la alveno de sia retrocela miljara regno. Jen la botoj de eksterlanda invado kiuj premtretis Francujon; jen la falo de imperio kaj la kaptiteco de iu Bonaparte; kaj jen ree ili. La rado de la historio videble retroturniĝis ĝis la *Chambre introuvable* (la ĉambro de kamparaj delegitoj kaj junkroj) de 1816.²⁹ En la asembleoj de la respubliko

27 Legitimistoj: Favoruloj de la pli malnova, «legitima» branĉo, 1792 en Francujo renversita, de la Bourbon-dinastio, kiu de 1589 ĝis 1793 kaj dum la restaŭra tempo de 1814 ĝis 1830 havis la potencon. Ili reprezentis la interesojn de la hereda grandbiena proprieto. 1830, post la dua renverso de tiu dinastio, la legitimistoj kuniĝis al unu partio. Dum la Dua Imperio ili kontentiĝis per la taktiko de atendo, ĉar ili trovis nenian subtenon de la loĝantaro, ili eldonis kelkajn kritikajn pamfletojn kaj nur 1871 denove aperis surface, kiam ili aliĝis al la komuna batalo de la kontraŭrevoluciaj fortoj kontraŭ la Pariza Komunumo.

28 «*Le Moniteur universel*», 6-a de januaro 1833.

29 *Chambre introuvable*: esprimo por la tuj post la dua renverso de Napoleono

1848 ĝis 1851 ili estis reprezentitaj de siaj kleraj kaj formitaj parlamentaj gvidantoj; sed nun antaŭenŝovis sin la ordinaraj soldatoj de la partio – ĉiuj *Pourceaugnac*³⁰ de Francujo.

Tuj kiam malfermiĝis tiu asembleo de *ruraux* (kamparaj junkroj)³¹ en Bordojo, Thiers klarigis al ili ke ili devas tuj akcepti la packondiĉojn, eĉ sen la honorsaluto de parlamenta debato, kiel sola kondiĉo sub kiu la prusoj permesos al ili komenci la militon kontraŭ la respubliko kaj ties fortikaĵo Parizo. La kontraŭrevolucio efektive ne havis tempon por perdi. La dua imperio estis duobliginta la ŝtatŝuldon kaj ĵetinta la grandajn urbojn en pezajn lokajn ŝuldojn. La milito estis terure altiginta la postulojn kaj senindulge detruinta la rimedojn. Por kompletigi la ruinon staris tie la prusa *Shylock* kun sia fakturo por la vivtenado de duona miliono da siaj soldatoj sur franca tero, por sia kompenso de kvin miliardoj kaj 5-elcentaj interezoj por ties nepagitaj partoj.³² Kiu pagu la fakturon? Nur per perforta faligo de la respubliko la alproprigistoj de la riĉeco povis esperi ŝovi la kostojn de milito, kiun ili mem okazigis, sur la ŝultrojn de la produktantoj de tiu riĉeco. Kaj do, ĝuste la senmezura ruiniĝo de Francujo spronis tiujn patriotajn reprezentantojn de terposedo kaj de kapitalo, sub la okuloj kaj la alta protekto de la fremda konkeranto, kompletigi la eksteran militon per interna milito – ribelado de sklavistoj.

Por tiu konspiro ekzistis granda obstaklo – Parizo. Senarmigi Parizon, tio estis unua kondiĉo de la sukceso. Pro tio, Thiers ordonis al Parizo demeti siajn armilojn. Poste, Parizo estis incitita de la frenezaj manifestacioj de la

1815 elektita, fanatike ultrarojalisma kaj reakcia ĉambro de deputitoj.

30 S-ro de *Pourceaugnac* [*pursonjāk*]. estas fikcia figuro primokata en baleta komedio de Moliero.

31 Asembleo de *Ruraux* (junkro-sembleo): malestima esprimo por la nacia asembleo kunveninta en februaro 1971 en Bordojo, kiu konsistis plejparte el reakciaj monarĥiistoj, bienposedantoj, oficistoj, rentuloj kaj komercistoj, elektitaj en la kamparaj elektodistriktoj. El 630 deputitoj de la asembleo, proksimume 430 estis monarĥiistoj.

32 En la pac-antaŭtraktaĵo de Versajlo, subskribita la 26-an de februaro 1871 de *Thiers* kaj *Favre* kiel de Bismarko kaj reprezentantoj de la sudgermanaj ŝtatoj, estis determinita: Francujo cedas Alzacon kaj la orientan parton de Loreno al Germanujo kaj pagas militkompenson de 5 miliardoj da frankoj; ĝis ties pago germanaj trupoj okupas parton de Francujo. La definitiva packontrakto estis subskribita la 10-an de majo 1871 en Frankfurto ĉe Majno.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

kunvenoj de la kamparaj junkroj kaj per la propraj ambiguaj eldiroj de Thiers pri la jura ekzisto de la respubliko; per la minaco senkapigi Parizon kaj senĉefurbigi ĝin (*décapiter et décapitaliser*); la nomumo de orleanistaj senditoj; la leĝoj de Dufaure pri la senvalidiĝintaj tratoj kaj domlu-ŝuldoj,³³ kiuj pereige minacis la komercon kaj industrion de Parizo; la imposto de Pouyer-Quertier de 2 centonoj por ĉiu ekzemplero de ajne ebla presaĵo; la mortpunoj kontraŭ Blankio kaj Flourens; la subpremo de la respublikanaj gazetoj; la transigo de la nacia asembleo al Versajlo; la renovigo de la sieĝo-stato deklaritan de Palikao kaj neniigita per la 4-a de septembro; la nomumo de decembran heroon Vinoy³⁴ guberniestro, la ĝendarmon Valentin policprefekto kaj la jesuitan generalon d'Aurelle de Paladines ĉefkomandanto de la nacia gvardio de Parizo.

Kaj nun ni havas demandon al sinjoro Thiers kaj al la sinjoroj de la nacia defendo, liaj komizoj. Estas konate, ke per sia financministro, s-ro Pouyer-Quertier, Thiers postulis deprunton de du miliardoj, tuj pageblan. Ĉu estas vere aŭ ne:

1. ke tiu afero estis tiel aranĝita ke provizio de plurcent milionoj fluis en la privatajn poŝojn de Thiers, Jules Favre, Ernest Picard, Pouyer-Quertier kaj Jules Simon, kaj

33 La 10-an de marto 1871 la nacia asembleo decidis la Leĝon pri prokrasto de la limdatoj por pago de tratoj, laŭ kiu la tratoj limigitaj inter la 13-a de aŭgusto kaj la 12-a de novembro estos pagigeblaj sep monatojn poste, t.e. la 13-an de marto 1871. Tratoj limigitaj je la 13-a de novembro ĝis la 12-a de aprilo 1871 estis pagigendaj de la 13-a de junio ĝis la 12-a de julio 1871. La sekvo estis, ke nur de la 13-a ĝis la 17-a de marto, 150.000 tratoj estis protestitaj kaj multaj etaj entreprenistoj kaj komercistoj bankrotis.

La pago de domluprezoj en Parizo estis, dum la sieĝo, prokrastitaj de kvaronjaro al kvaronjaro. Fine de marto 1871 venis denove ŝanĝo de kvaronjaro, sed la nacia asembleo, malgraŭ insistaj admonoj de *Millière*, ne faris decidon en tiu demando. Pro tio, la 1-an de aprilo estis pagendaj la luprezoj de ses monatoj, kaj per tio centmiloj da personoj el la laboranta loĝantaro kaj el la malpli bonhavaj tavoloj estis elmetitaj al la indulgo de la domposedantoj kaj al malsato.

34 Decembra heroo (*décembriseur*): partoprenanto en la bonapartisma ŝtatrenverso de la 2-a de decembro 1851 kaj adepto de ĉiaj agadoj kongruaj kun la spirito de tiu puĉo. La rekta partopreno de *Vinoy* en la ŝtatrenverso konsistis en tio ke li subpremis la provon ribeli de la respublikanoj en iu departemento per armita forto.

I

2. ke neniŭ pago estu farita ĝis post la «pacigo» de Parizo³⁵?

Ĉiukaze la afero devis esti urĝega, ĉar Thiers kaj Jules Favre petis sen ajna honto, en la nomo de la asembleo de Bordoza, okupadon de Parizo per prusaj trupoj. Sed tio ne kongruis kun la ludo de Bismarko, kion li, moke kaj tute publike, rakontis al la admirantaj frankfurtaj filistroj dum sia reveno al Germanujo.

II

Parizo estis la sola serioza malhelpo survoje al la kontraŭrevolucia konspiro. Parizo estis do senarmigenda. Rilate al tiu punkto, la bordoza asembleo estis la sincero mem. Se la freneza muĝado de la kamparaj junkroj ne estus sufiĉe aŭdebla, la transdono de Parizo, fare de Thiers, en la manojn de la triopo – Vinoy, la decembromurdisto, Valentin, la bonapartistista ĝendarmo, kaj Aurelle de Paladines, la jesuita generalo – malebligis eĉ la lastan dubon. Sed dum la konspirantoj impertinente elmontris la veran celon de la senarmigo, ili postulis de Parizo demeti la armilojn sub preteksto kiu estis la plej indigniga, plej senhonta mensogo. La kanonaro de la nacia gvardio, diris Thiers, apartenas al la ŝtato kaj estas redonenda al la ŝtato. La fakto estis jena: Ekde la tago de la kapitulaco, kiam la kaptitoj de Bismarko estis liveranta Francujon al Bismarko, sed al si mem kondiĉintaj multnombraj gvardion por la eksplicita celo subpremi Parizon, – ekde tiu tago Parizo estis gardema. La nacia gvardio reorganizis sin kaj konfidis sian ĉefkomandon al centra komitato, kiu estis elektita de ĝia tuta amaso, escepte de la malnovaj bonapartistaj taĉmentoj. La tagon antaŭ la enmarŝo de la prusoj en Parizon, la centra komitato prizorgis la transportadon al *Montmartre*, *La Villete* kaj *Belleville* de la kanonoj kaj maŝinpafiloj kiujn la *capitulards* perfide postlasis en kaj apud la kvartaloj okupotaj de la prusoj. Tiu kanonaro estis akirita de la klopodoj de la nacia gvardio mem. Kiel ĝia posedo ĝi

35 Laŭ gazetaraj informoj, Thiers kaj aliaj registaranoj ricevos, el interna pruntaĵo, kiun la registaro de Thiers intencis preni, pli ol 300 milionojn da frankoj kiel «provizion». Thiers konfesis poste, ke la financaj rondo, kun kiuj estis intertraktite pri tiu pruntepreno, postulis la plej urĝan sufokon de la Pariza Komunumo. La 20-an de junio 1871, post la subpremo de la Pariza Komunumo fare de la versajlaj trupoj, la leĝo pri la pruntepreno estis akceptita.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

estis oficiale agnoskita en la kapitulaco de la 28-a de januaro³⁶ kaj pro tiu aparta eco esceptita de la ĝenerala transdono de la armiloj apartenantaj al la ŝtato al la venkinto. Kaj Thiers estis tiom sena je eĉ la plej travidebla preteksto por komenci la militon kontraŭ Parizo, ke restis al li nur la kruda mensogo: la kanonaro de la nacia gvardio estas ŝata proprieto!

La rekvizicio de la kanonaro devis servi nur kiel antaŭludo al la ĝenerala senarmigo de Parizo kaj per tio al la senarmigo de la revolucio de la 4-a de septembro. Sed tiu revolucio fariĝis la leĝa stato de Francujo. La respubliko, ĝia faro, estis agnoskita de la venkinto en la teksto de la kapitulaco. Post la kapitulaco, ĝi estis agnoskita de ĉiuj fremdaj potencoj; en ĝia nomo estis kunvokita la asembleo. La pariza laborist-revolucio de la 4-a de septembro estis la sola jura bazo de la nacia asembleo en Bordoza kaj de ĝia plenuma potenco. Sen la 4-a de septembro, la nacia asembleo devintus tuj cedi la lokon al la leĝdona korpo elektita 1869 sub franca kaj ne prusa potenco per ĝenerala voĉdonado, kiu estis perforte dispelita de la revolucio. Thiers kaj liaj *ticket-of-leave*-uloj devintus intertrakti por havigi al si protektpaperon subskribitan de Louis Bonaparte, por eviti vojaĝon al Kajeno.³⁷ La nacia asembleo kun sia rajtigo decidi pri la paco kun Prusujo, estis nur unuopa incidento en tiu revolucio, kies vera enkorpiĝo estis daŭre la armita Parizo; la sama Parizo kiu faris tiun revolucion, kiu pro ĝi eltenis kvinmonatan

36 Temas pri la konvencio pri la batalhalto kaj la kapitulaco de Parizo, subskribitaj de Bismarko kaj Jules Favre la 28-an de januaro 1871. La rifuzo de la registaro de nacia defendo, plu rezisti al la prusaj konkerantoj, kaj la hontinda kapitulaco de Parizo estis perfido de la naciaj interesoj de Francujo. La dominantaj klasoj de Francujo, strebantaj uzi ĉiajn fortojn por subpremi la revolucionan movadon, oferis pro tio la naciajn interesojn de la lando. Per sia subskribo de la konvencio, Favre deklaris sian konsenton kun la humiligaj postuloj de la prusoj: pago de militkontribuado de 200 milionoj da frankoj ene de du semajnoj, transdono de la plej granda parto de la parizaj fortikaĵoj, transdono de la kampartilerio kaj de la militmaterialo de la pariza armeo al la germanaj aŭtoritatoj. Bismarko kaj Favre tamen ne kuraĝis meti en la konvencion interkonsenton pri senarmigo de la nacia gvardio, ĉar tiu konsistis plejgrandparte el laboristoj. En la konvencio estis krome planite, okazigi kiom eble plej rapide elekton de nacia asembleo, kiu devus decidi pri la demando ĉu daŭrigi la militon aŭ fari packontrakton.

37 Kajeno (*Cayenne*): Ĉefurbo de Franca Gujano (Karibujo, Sudameriko), ekzilejo por politikaj kaptitoj; Kajeno, pro sia granda mortokvoto, kaŭzita de la malliber-eja reĝimo kaj la nekutima tropika klimato, estis nomata «seka gilotino».

II

sieĝadon kaj la teroron de malsato kaj kiu, per sia daŭrigita rezistado – malgraŭ la «plano» de Trochu – donis la bazon por tenaca defendmilito en la provincoj. Kaj Parizo devis nun aŭ demeti siajn armilojn laŭ la ofenda blekado de la ribelaj sklavistoj de Bordojo kaj agnoski ke ĝia revolucio de la 4-a de septembro signifas nur la simpla transdono de la ŝtatpotenco de Louis Bonaparte al ties reĝaj rivaloj – aŭ ĝi devis antaŭpaŝi kiel la sindediĉa pioniro de Francujo, kies savo el perejo kaj renaskiĝo estis neeblaj sen la revolucia renverso de la politikaj kaj sociaj kondiĉoj, kiujn kreis la dua imperio kaj kiuj sub ties ŝirmo maturiĝis al ekstrema putriĝo. Parizo, ankorau sennutra pro kvinmonata malsatigo, hezitis eĉ ne momenton. Ĝi decidis heroe, elteni ĉiajn danĝerojn de rezistado kontraŭ la francaj komplotuloj, malgraŭ ke daŭre alfaŭkis ĝin prusaj kanonoj de ĝiaj propraj fortikaĵoj. Sed ĉe tio, en sia abomeno al interna milito kiu estis al Parizo trudata, la centra komitato insistis pri sia defenda konduto, malgraŭ la incitoj de la asembleo, la intervenoj de la plenuma potenco kaj la minacaj trupamasigoj en kaj ĉirkaŭ Parizo.

Thiers mem komencis do la internan militon per tio ke li sendis Vinoy ĉekape de amaso da policaj serĝentoj kaj de kelkaj lini-regimentoj en nokta rab-invado kontraŭ *Montmartre*, por tie surprize forpreni la kanonaron de la nacia gvardio. Estas konate kiel tiu provo fiaskis pro la rezisto de la nacia gvardio kaj pro la fratiĝo de la trupoj kun la popolo. Aurelle de Paladines estis jam anticipe presinta sian venkoraporton, kaj Tiers tenis pretaj la murafiŝojn por anonci siajn ŝtatrenversajn disponojn. Ambaŭ estis nun anstataŭigota de la alvoko de Thiers, en kiu li proklamis sian larĝaniman decidon lasi al la nacia gvardio ĝiajn armilojn; li ne dubas, diris li, ke ĝi uzos ilin por aliĝi kontraŭ la ribeluloj al la registaro. El inter la 300.000 naciaj gvardistoj sekvis nur 300 tiun alvokon de la eta Thiers por aliĝi, kontraŭ si mem, al li. La glorplena laborista revolucio de la 18-a de marto senkonteste ekposedis Parizon. La centra komitato estis ĝia provizora registaro. Eŭropo ŝajnis por momento dubi ĉu ĝiaj novaj mirigaj ĉefaj, ŝtataj kaj militaj agoj havas iomete da realo aŭ ĉu ili estis la revoj de jam delonge malaperinta pasinteco.

De la 18-a de marto ĝis la invado de la versajlaj trupoj en Parizon, la proleta revolucio restis tiom pura de ĉiaj perfortaĵoj, kiuj svarmas en la revolucioj kaj eĉ pli en la kontraŭrevolucioj de la «altaj klasoj», ke la kontraŭuloj trovis nenian alian pretekston por sia indigno ol la ekzekuton de la generaloj Lecomte kaj Clément Thomas kaj la kolizion en la placo

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

Vendôme.

Iu el la bonapartistaj oficiroj, kiu ludis rolon en la nokta surprizatako al *Montmartre*, estis kvarfoje ordoninta al la 81-a liniregimento pafi al nearmita amaso en la *Place Pigalle*; kiam la trupoj rifuzis, li kolere skoldis ilin. Anstataŭ mortpafi virinojn kaj infanojn, liaj propraj soldatoj mortpafis lin mem. La enradikiĝintaj kutimoj, kiuj estas ekzercitaj al la soldatoj per instruado fare de la malamikoj de la laboristoj, kompreneble ne perdiĝas tuj en la sama momento, en kiu tiuj soldatoj transiras al la laboristoj. Tiuj samaj homoj ekzekutis ankaŭ Clément Thomas.

«Generalo» Clément Thomas, malkontenta eksserĝento, en la lasta tempo de Louis Philippe dungigis sin ĉe la redaktejo de la respublikana gazeto «*Le National*»³⁸, kie li samtempe transprenis la postenojn de respondeca pajlohomino (gérant responsable, kiu transprenis la sidadon en punejo) kaj duelisto ĉe tiu tre batalema gazeto. Kiam post la februara revolucio la homoj de la «*National*» prenis la potencon, ili transformis tiun iaman serĝentojn en generalon. Tio okazis ĵus antaŭ la junia masakro, kiun li, kiel ankaŭ Jules Favre, estis kunplaninta kaj ĉe kiu li transprenis unu el la plej kanajlaj roloj de ekzekutisto. Poste li malaperis kune kun sia generaleco por longa tempo por reaperi la 1-an de novembro 1870. La tagon antaŭe, la «registaro de la defendo» donis en la urbodomo al Blankio, Flourens kaj aliaj reprezentantoj de la laboristaro sian solenan promeson demeti sian urzurpitan potencon en la manojn de libere elektita Pariza Komunumo.³⁹ Anstataŭ plenumi sian promeson, ĝi pelis kontraŭ Parizo la bretonojn de

38 «*Le National*»: taggazeto, en la kvardekaj jaroj organo de la moderaj burĝaj respublikanoj, aperis de 1830 ĝis 1851 en Parizo.

39 La 31-an de oktobro 1870, post ricevo de la informoj pri la kapitulaco de Messo, la malvenko de *Le Bourget* kaj pri la intertraktadoj kun la prusoj, taskitaj de la registaro de la nacia defendo, komencitaj de *Thiers*, okazis ribelo de la parizaj laboristoj kaj de la revolucia parto de la nacia gvardio. La ribelantoj okupis la urbodomon kaj kreis revolucionan potencorganon, la Komitaton por publika bonfarto [*Comité de salut public*], kun ĉekape Blankio. La registaro, sub premo de la laboristaro, estis devigita promesi sian abdikon kaj elektojn por la Komunumo por la 1-a de novembro. Sed ĝi rompis sian promeson; ĝi uzis la nesufiĉan organizitecon de la revoluciaj fortoj en Parizo kaj la mankhavan kunteniĝon de la blankianoj kaj de la etburĝaj demokratoj (jakobenoj), kiuj gvidis la ribelon, por okupi la urbodomon helpe de al ĝi restintaj batalionoj de la nacia gvardio kaj restarigis sian potencon.

II

Trochu, kiuj anstataŭis nun la korsikanojn de Bonaparte.⁴⁰ Nur la generalo Tamiŝier rifuzis makuli sian nomon per tia rompo de promeso kaj demetis sian postenon de ĉefkomandanto de la nacia gvardio. Lian lokon ekokupis nun Clément Thomas, denove generalo. Dum sia tuta ĉefkomando li faris militon ne kontraŭ la prusoj, sed kontraŭ la pariza nacia gvardio. Li malhelpis ĝian ĝeneralan armadon, incitis la burĝajn batalionojn kontraŭ la laboristaj batalionoj, forigis la oficiojn malamikajn al la «plano» de Trochu kaj dissolvis, sub la brulsigno de malkuraĝo, la samajn proletajn batalionojn, kies heroa kuraĝo admirigis eĉ iliajn plej fanatikajn malamikojn. Clément Thomas rekte fieris pri tio ke li reakiris sian iaman privilegion de junio kiel persona malamiko de la pariza proletaro. Ankoraŭ kelkajn tagojn antaŭ la 18-a de marto, li submetis al la militministro Le Flô propran planon por «elradikigo de la floro de la pariza kanajlaro». Post la malvenko de Vinoy, li ne povis deteni sin aperi kiel privata spiono sur la batalkampo. La centra komitato kaj la parizaj laboristoj estis same respondecaj pri la mortpafo de Clément Thomas kaj Lecomte kiel la princino de Kimrio pri la mortpremitaj homoj dum la interpuŝiĝo okaze de ŝia alveno en Londono.

La pretekstita masakro al senarmaj civitanoj en la *Place Vendôme* estas fabelo pri kiu Thiers kaj la kamparaj junkroj obstine silentis en la asembleo, kaj kies disvastigon ili konfidis ekskluzive al la lakeoj de la eŭropa gazetararo.

La «orduloj», la reakciuloj de Parizo, tremis dum la venko de la 18-a de marto. Por ili tio estis la signo de fine venanta popolvenĝo. La fantomoj de la viktimoj murditaj sub iliaj manoj, de la tagoj de junio 1848 ĝis la 22-a de januaro 1871,⁴¹ aperis antaŭ iliaj okuloj. Ilia ektimo estis ilia sola puno. Eĉ la policaj serĝentoj, anstataŭ, kiel decis, esti senarmigitaj kaj enkarcerigitaj,

40 Bretonoj: Mobilizita gvardio el Bretonio, kiun Trochu uzis kiel ĝendarman trupon por subpremi la revolucian movadon en Parizo.

41 La 22-an de januaro 1871, pro la iniciato de la blankianoj, okazis revolucia movado de la pariza proletaro kaj de la nacia gvardio. La manifestacio, kies partoprenantoj postulis la renverson de la registaro kaj starigon de la Komunumo, estis dispafita laŭ ordono de la registaro de la nacia defendo fare de la bretona mobilizita gvardio, kiu gardis la urbodomon; multaj partoprenantoj estis arestitaj; la registaro ordonis fermadon de ĉiuj kluboj en Parizo, malpermesis popolajn kunvenojn kaj serion da gazetoj. Post kiam la revolucia movado estis subpremita de la teroro, la registaro ekpreparis la kapitulacon de Parizo.

trovis la pordegojn de Parizo larĝe malfermitaj por sekure eskapi al Versajlo. Ne nur okazis nenio al la orduloj, oni eĉ permesis al ili rekolektiĝi kaj okupi pli ol fortan postenon meze de Parizo. Tiu indulgo de la centra komitato, tiu larĝanimeco de la armitaj laboristoj, tiel strange en kontraŭdiro kun la kutimoj de la ordopartio, estis misinterpretitaj de tiu partio kiel signo de malforteco. Pro tio ĝia absurda plano, sub preteksto de nearmita manifestacio ree provi tion, kion Vinoy kun siaj kanonoj kaj maŝinpafiloj ne povis atingi. La 22-an de marto, el la luksaj kvartaloj ekmoviĝis kolono da «distingitaj sinjoroj», kun ĉiuj dandoj en siaj vicoj, kaj ĉekape la bone konataj klientoj de la imperio, la Heeckeren, Coëtlogon, Henri de Pène ktp. Sub la malkuraĝa preteksto de paca manifestacio, sed sekrete armita per la armiloj de la insidmurdisto, tiu bando formiĝis, senarmigis kaj fitraktis la postenantojn kaj patrolojn de la nacia gvardio sur kiujn trafis ilia kolono kaj, el la *Rue de la Paix* penetrante en la *Place Vendôme*, ĝi provis, kriegante «For la centra komitato! For la murdistoj! Vivu la nacia asembleo!» trapanetri la vicon de la tie starantaj gardosoldatoj kaj tiel surprizataki la malantaŭan ĉefkomandeejon de la nacia gvardio. Kiel respondo al iliaj revolvero-pafadoj oni faris la regulajn laŭleĝajn ordonojn⁴² al ili; kiam tiuj restis senefikaj, la generalo de la nacia gvardio⁴³ komandis pafadon. Unu salvo dispelis la naivajn vantulojn, kiuj estis atendintaj ke la nura elmonro de ilia «respektinda societo» efikos sur la pariza revolucio kiel la trumpetoj de Josuo sur la muroj de Jeriĥo. Ili postlasis du mortintajn naciagvardianojn, naŭ grave vunditajn (inter ili unu membro de la centra komitato⁴⁴) kaj la tutan scenejon de ilia grandfaro prisemitan de revolveroj, ponardoj kaj bastonspadoj, kiel ateston pri la «senarmeco» de ilia «paca» manifestacio. Kiam la 13-an de junio 1849⁴⁵ la pariza nacia gvardio faris vere pacan

42 Regulaj laŭleĝaj ordonoj (*sommations*) disiĝi; en Francujo, laŭ la leĝo de 1831 la aŭtoritatoj rajtis dissolvi manifestaciojn, kunvenojn, mitingojn ktp. nur post ordono al la amaso disiĝi. Tiu ordono estis ripetota trifoje kun tamburado aŭ trumpetado; post nesekvo la aŭtoritatoj havis la rajton uzi la perforton.

43 Bergeret.

44 Maljournal

45 13-a de junio 1849 en Parizo: la etburĝa montpartio (*Montagne*) postulis la ĉesigon de la franca interveno kontraŭ la Roma Respubliko, ĉar laŭ artikolo 4 de la franca konstitucio estis malpermesite uzi francajn trupojn kontraŭ la libereco de aliaj popoloj. Proteste kontraŭ la rompo de la konstitucio la montpartio alvokis al paca manifestacio por la 13-a de junio en Parizo; armitan ribelon ĝi

II

manifestacion, por protesti kontraŭ la rabista agreso de francaj trupoj al Romo – tiam Changarnier, tiam generalo de la ordopartio, estis proklamita de la nacia asembleo, kaj aparte de Thiers, kiel savinto de la socio, ĉar li estis pelintaj siajn trupojn de ĉiuj flankoj al tiuj senarmaj homoj, por forpafi ilin, forsabri kaj distreti ilin per la hufoj de iliaj ĉevaloj. Tiam oni deklaris en Parizo la sieĝostaton; Dufaure urĝe adoptigis novajn subprem-leĝojn al la asembleo; okazis novaj arestoj, novaj proskriboj, nova teroro. Sed la «subaj klasoj» faris tion alie. La centra komitato de 1871 lasis la heroojn de la «paca manifestacio» simple forkuri, kaj tiel ili estis jam du tagojn poste kapablaj kuniĝi sub la admiralo Seisset por tiu armita manifestacio, kiu finiĝis per tiu konata forkuro al Versajlo. En sia rezistemo akcepti la de Thiers per sia nokta enrompo en *Montmartre* komencitan internan militon, la centra komitato ĉi-foje kulpiĝis pri decida eraro per tio ke ĝi ne tuj marŝis al la tiam komplete senhelpa Versajlo por meti finon al la konspiroj de Thiers kaj liaj junkroj. Anstataŭ tio, oni permesis al la ordopartio ree provi sian forton ĉe la elektourno, kiam la 26-an de marto estis elektita la Komunumo. Tiutage la orduloj en la distriktaj ur-bodomoj interŝanĝis bonvolemajn vortojn de repaciĝo kun siaj nur tro larĝanimaj venkintoj, samtempe en siaj koroj grumblante solenajn ĵurojn pri sanga venĝo kiam venos la tempo.

Kaj nun vidu la alian flankon de la afero! Thiers komencis sian duan militiron kontraŭ Parizo komence de aprilo. La unua kolono de parizaj kaptitoj, alvenanta en Versajlo, estis skandale traktata, dum Ernest Picard, kun la manoj en la poŝoj, tie vagadis kaj primokis ilin kaj la edzinoj de Thiers kaj Favre, meze de siaj honor(?)damoj, de la alta balkono aplaudis fiaĵojn de la versajla plebo. La kaptitaj linisoldatoj estis simple mortpafitaj; nia brava amiko generalo Duval, la fergisisto, estis sen ajna jura formo murdita. Galliffet, la prostituitisto de sia edzino, tiel konata per la senhonta elmontrado de ŝia korpo dum la festenoj de la dua imperio, Galliffet fanfaronis en proklamo, ke li ordonis murdi kelkajn naci-gvardistojn surprizitajn kaj senarmigitajn de liaj rajdistoj, kaj same iliajn kapitanon kaj leŭtenanton. Vinoy, la forkurinto, estis nomumita grandkrucito de la honorlegio pro lia tagordono, en kiu li preskribis mortpafi ĉiun ĉe la kumun-

volis eviti pro timo antaŭ la proletaro. Tiu sinteno kondukis al malvenko de la ago, la manifestacio estis dispelita, la plena bankroto de la etburĝa demokratio en Francujo estis evidenta. Post la 13-a de junio multaj gvidantoj de la montpartio kaj eksterlandaj etburĝaj demokratoj estis arestitaj aŭ devis elmigri.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

umanoj kaptitan linisoldaton. Desmaret, la ĝendarmo, estis ordenita ĉar li, perfide kaj laŭ buĉista maniero dispecigis la altaniman kaj kavalirecan Flourens, kiu la 31-an de oktobro 1870 estis savinta la kapojn de la defend-registaro.⁴⁶ La «stimulaj detaloj» de lia murdo estis de Thiers en la nacia asembleo ĝue kaj detale komunikitaj. Kun la orgojla vanteco de parlamenta nano, al kiu oni permesas ludi la rolon de Tamerlano⁴⁷, li rifuzis al la ribeluloj kontraŭ lia eteco ĉian rajton je civilizita militado, eĉ tiun de neŭtraleco por iliaj sukurejoj por vunditoj. Nenio pli abomena ol tiu simio, jam antaŭsentita de Voltero, kaj kiu nur mallonge povas senbridigi siajn tigrajn avidojn.⁴⁸

Post kiam la Komunumo (dekreto de la 7-a de aprilo) ordonis rebat-dispoj kaj deklaris sia devo «protekti Parizon kontraŭ la kanibalaj faroj de la versajlaj banditoj kaj postuli okulon pro okulo, denton pro dento»⁴⁹ – Thiers tamen ne ĉesigis la kruelan traktadon de la kaptitoj; li krome ofendis ilin en siaj raportoj, ekzemple jene: «Neniam la ĉagrenita rigardo de honestaj homoj falis sur tiom degraditaj vizaĝoj de degradita demokratio»⁵⁰ – raportoj de honestaj homoj kiel Thiers mem kaj liaj *ticket-of-leave*-uloj. Malgraŭ tio, la mortpafado de kaptitoj estis dum iom da tempo haltigita. Sed apenaŭ Thiers kaj liaj decembro-generaloj eltrovis ke la rebatdekreto de la Komunumo estis nura minaco, ke eĉ iliaj ĝendarm-spionoj, kaptitaj en Parizo en uniformo de nacigvardistoj, ke eĉ polic-serĝentoj portantaj brulbombojn estis indulgitaĵ – tiam rekomencis ankaŭ la amasa mortpafado de kaptitoj, kaj estis daŭrigata ĝis la fino. Domojn, en kiujn fuĝis nacigvardianoj, ĉirkaŭis ĝendarmoj, kiuj priverŝis ilin per keroseno (kiu aperis ĉi tie

46 Dum la okazaĵoj de la 31-a de oktobro, kiam la membroj de la registaro de la nacia defendo estis arestataj en la urbodomo, Flourens malhelpis ilian mortpafadon, kiun postulis unu el la partoprenantoj de la ribelo.

47

48 Voltero: «*Candide*», ĉapitro 22.

49 El la alvoko de la Pariza Komunumo de la 5-a de aprilo 1871, kiu kune kun la dekreto pri la ostaĝoj estis publikigita en la «*Journal Officiel de la République française*», Parizo, de la 6-a de aprilo. (Markso citas ĉi tie la dekreton sub la dato de ĝia publikigo en la angla gazetararo.) La dekreto determinis ke ĉiu, kiu estis kulpigita pro interkonsento kun la versajla registaro kaj kies kulpo estis pruvita, povis esti ostaĝigita. Per tiu rimedo la Pariza Komunumo provis kontraŭagi la mortpafadojn de la komunumanoj fare de la versajlanoj.

50 «*Journal Officiel de la République française*», Versajlo, 5-a de aprilo 1871.

II

unuafoje) kaj bruligis ilin; la duone karboniĝintajn kadavrojn poste elprenis la ambulanco de la gazetaro (en *Les Ternes*). Kvar nacigvardianoj, kiuj la 25-an de aprilo ĉe *Belle-Epine* kapitulacis al kelkaj rajdantaj ĉassoldatoj, estis poste de la kavaleri-kapitano, inda servisto de Gallifetti, unu post la alia mortpafitaj. Unu el la kvar, Scheffer, lasita tie kiel mortinta, rampis al la pariza antaŭposteno kaj faris tribunalan ateston pri tiu okazaĵo antaŭ komisiono de la Komunumo. Kiam Tolain interpelaciis la militministron pri tiu raporto de la komisiono, la hurlado de la kamparaj junkroj sufokis lian voĉon; ili malpermesis al Le Flô respondi. Estus ofendo por ilia «glora» armeo – paroli pri ĝiaj faroj. La neglekta tono en kiu Thiers raportis pri la masakrado de la nacigvardianoj ĉe *Moulin-Saquet* dumdorme surprizitaj kaj pri la amasaj mortpafadoj en *Clamart*, ofendis eĉ la nervojn de la vere ne tro sentema londona «*Times*». Sed estus ridinde nombri la nur enkondukajn fiaĵojn, faritajn de la bombardintoj de Parizo kaj incitintoj de sklavistribelo sub protekto de fremda konkeranto. Meze de ĉiuj ĉi teroroj, Thiers ne forgesas sian parlamentan lamentadon pri la terura respondeco kiu pezas sur liaj nanaj ŝultroj, fanfaronas ke «*l'Assemblée siège paisiblement*» (la asembleo daŭre kunsidas en paco), kaj pruvas per siaj konstantaj festenoj, hodiaŭ kun decembrogeneraloj, morgaŭ kun germanaj princoj, ke lia digesto estas neniel ĝenata, eĉ ne de la fantomoj de Lecomte kaj Clément Thomas.

III

En la mateno de la 18-a de marto 1871, Parizo estis vekita de la tondra voko: «Vivu la Komunumo!» Kio estas tiu Komunumo, tiu sfinkso, kiu elmetas la burĝan menson al tiom akraj provoj?

«La proletoj de Parizo», diris la centra komitato en sia manifesto de la 18-a de marto, «meze de la malvenkoj kaj perfidoj de la regantaj klasoj, komprenis, ke venis la horo en kiu ili devas savi la situacion, per tio, ke ili transprenas la gvidadon de la publikaj aferoj en siaj propraj manoj ... Ili komprenis ke estas ilia plej alta devo kaj ilia absoluta rajto fariĝi mastroj de siaj propraj sortoj kaj preni la regadpotencon.»⁵¹

Sed la laborista klaso ne povas simple preni en sian posedon la pretan ŝtatmaŝinaron kaj tiun ekfunkciigi por siaj propraj celoj.⁵²

51 «*Journal Officiel de la République française*», Parizo, 21-a de marto 1871.

52 La 12-an de aprilo 1871 Markso skribis al Kugelmann:

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

La centrigita ŝtatpotenco, kun siaj ĉie ĉeestantaj organoj – konstanta armeo, polico, burokrataro, klerikaro, juĝistaro, do organoj kreitaj laŭ plano de sistema kaj hierarĥia labordivido – devenas de la tempoj de la absoluta monarĥio, kie ĝi servis al la formiĝanta burĝa socio kiel potenca armilo en ĝiaj bataloj kontraŭ la feŭdismo. Tamen ĝia disvolvo estis ĝenata de sufiĉe multa mezepoka rubaĵo, grandbienulaj, nobelaj kaj lokaj privilegioj, urbaj kaj korporaciaj monopoloj kaj provincaj konstitucioj. La giganta balailo de la franca revolucio de la 18-a jarcento forbalais ĉiujn ĉi ruinaĵojn de pasintaj tempoj kaj tiel samtempe purigis la socian bazon de la lastaj malhelpoj kiuj baris la superstrukturon de la moderna ŝtatkonstruaĵo. Tiu moderna ŝtatkonstruaĵo leviĝis sub la unua imperio, kiu mem estis kreita de la koalici-militoj de la malnova feŭda Eŭropo kontraŭ la moderna Francujo. Dum la post-sekvaj potencformoj la registaro estis metita sub parlamentan kontrolon, t.e. sub la rektan kontrolon de la regantaj klasoj. Unuflanke ĝi evoluis nun al forcejo de kolosaj ŝtatŭldoj kaj premaj impostoj, kaj pro la nerezistebla allogo de sia ofica potenco, siaj enspezoj kaj siaj postenigoj fariĝis la pomo de malkonkordo por la rivalaj frakcioj kaj aventuristoj de la regantaj klasoj – aliflanke ĝia politika karaktero ŝanĝiĝis samtempe kun la ekonomiaj ŝanĝiĝoj de la socio. Kiom la progreso de la moderna industrio disvolvis, ampleksigis kaj profundigis la klasan kontraŭecon inter kapitalo kaj laboro, tiom la ŝtatpotenco akiris pli kaj pli la karakteron de publika potenco por subpremi la laboristan klason,⁵³ maŝino de klasa potenco. Post ĉiu revolucio, kiu signas progreson de la klasbatalo, aperas pli kaj pli videble la pure subprema karaktero de la ŝtatpotenco. La revolucio de 1830 transdonis la regadon de la bienuloj al la kapitalistoj kaj per tio, de la pli malproksimaj al la pli rektaj malamikoj de la laboristoj. La burĝaj respublikanoj, kiuj kaptis la ŝtatpotencon en la nomo de la februara revolucio, uzis ĝin por okazigi la juniajn masakrojn, por pruvi al la laborista klaso, ke la «sociala» respubliko signifas nenion pli ol ilia sociala subpremado fare de la respubliko; kaj por pruvi al la porreĝa amaso de burĝoj kaj bienuloj, ke ili povas trankvile lasi la prizorgadon kaj la monavantaĝojn de la regado al la burĝaj respublikanoj.

«Se vi legas la lastan ĉapitron de mia "Dek-unua de brumero", vi trovos, ke mi esprimas kiel venontan provon de la franca revolucio, ne plu transdoni kiel ĝis nun la burokratan-militistan maŝinaron de unu mano al alia, sed disrompi ĝin, kaj tio estas la antaŭkondiĉo de ĉia popola revolucio sur la kontinento. Tio estas ankaŭ la provo de niaj heroaj parizaj partikamaradoj.»

53 En la eldonoj de 1871 kaj 1876: subpremi la laboron.

III

Tamen, post tiu ilia sola heroaĵo de junio, restis al la burĝaj respublikanoj nur retiriĝi el la unua vico en la lastan vicon de la «ordopartio» – koalicio formita el ĉiuj konkurencaj frakcioj kaj ribelgrupoj de la alproprigaj klasoj en sia nun malkaŝe deklarita kontraŭeco al la produktantaj klasoj. La konvena formo de ilia ĉiesa registaro estis la parlamenta respubliko kun Louis Bonaparte kiel prezidanto; registaro de malkaŝa klasterorismo kaj intenca ofendado de la «*vile multitude*» (kota amaso). Se, kiel diris Thiers, la parlamenta respubliko estis la ŝtatformo kiu plej malmulte disigas la frakciojn de la reganta klaso, ĝi male malfermis abismon inter tiu klaso kaj la tuta socia korpo ekster ĝiaj maldensaj vicoj.

La baroj nun falis, kiuj sub antaŭaj registaroj estis ankoraŭ truditaj de la interna divido de tiu klaso al la ŝtatpotenco. Fronte al la minacanta leviĝo de la proletaro, la unuiĝinta poseda klaso uzis la ŝtatpotencon nun senretene kaj impertinente kiel nacian militinstrumenton de la kapitalo kontraŭ la laboro. Sed ĝia seninterrompa krucmilito kontraŭ la produktantaj amasoj devigis ĝin ne nur provizi la plenumantan potencon per ĉiam kreskanta subprem-potenco, ĝi devigis ĝin ankaŭ iom post iom senigi sian propran parlamentan fortikaĵon – la nacian asembleon – je ĉiaj defendeblecoj kontraŭ la plenumanta potenco. La plenumanta potenco, en la persono de Louis Bonaparte, simple forpelis ĝin. La korpa posteulo de la respubliko de la «ordopartio» estis la dua imperio.

La imperio, kun la ŝtatrenverso kiel naskiĝatesto, la ĝenerala voĉdonrajto kiel pravigo kaj la sabro kiel scepro, pretendis apogi sin sur la kamparanoj, sur tiu granda amaso da produktantoj kiu ne estis rekte implikita en la batalon inter kapitalo kaj laboro. Ĝi pretendis savi la laboristan klason per rompo de la parlamentismo kaj per ĝi la malkaŝan submetiĝon de la registaro sub la regantaj klasoj. Ĝi pretendis savi la posedantajn klasojn per daŭrigo de ilia ekonomia suvereneco super la laborista klaso; kaj fine ĝi pretendis unuigi ĉiujn klasojn per la revigliĝo de la iluzio de nacia gloro. En la realo, tiu estis la sola ebla regoformo en tempo kiam la burĝaro jam estis perdinta la kapablon regi la nacion kaj kiam la laboristaro ankoraŭ ne akiris tiun kapablon. La tuta mondo aljubilis ĝin kiel savanton de la socio. Sub ĝia potenco la burĝa socio, senigita je ĉiaj politikaj zorgoj, atingis disvolviĝon eĉ de ĝi mem neniam revitan. Ĝia industrio, ĝia komerco ampleksiĝis al senmezuraj proporcioj; la financtrompado festis kosmopolitajn orgiojn; la mizero de la amasoj akre kontrastis kun la senhonta pompo de akrebrila,

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

bombasta kaj fiodora lukso. La ŝtatpotenco, ŝajne ŝvebanta alte super la socio, estis tamen mem la plej skandala skandalo de tiu socio kaj samtempe la kovejo de ĝia tuta putreco. Ĝia propra putreco kaj la putreco de la socio savita de ĝi estis senmaskigitaj de la bajonetoj de Prusujo, kiu mem ardis de avido transigi la centron de tiu reĝimo de Parizo al Berlino. La imperiismo estas la plej prostitua kaj samtempe la lasta formo de tiu ŝtatpotenco kreita de la burĝa socio kiel instrumento de sia propra liberigo de la feŭdismo kaj kiun la plene evoluinta burĝa socio transformis al instrumento de subjugigo de la laboro sub la kapitalon.

La rekta kontraŭo de la imperio estis la Komunumo. La voko al la «sociala respubliko», per kiu la pariza proletaro enkondukis la februaran revolucion, esprimis nur la malprecizan postulon pri respubliko, kiu ne nur forigu la monarĥian formon de klasa regado, sed la klasan regadon mem. La Komunumo estis la preciza formo de tiu respubliko. Parizo, la centro kaj sidejo de la malnova regpotenco kaj samtempe la socia centro de la franca laborista klaso, Parizo leviĝis armite kontraŭ la provo de Thiers kaj liaj kamparaj junkroj restarigi kaj eternigi tiun de la imperio transprenitan malnovan regpotencon. Parizo povis rezisti nur ĉar pro la sieĝo ĝi estis senigita je la armeo kiun ĝi estis anstataŭiginta per nacia gvardio konsistanta precipe el laboristoj. Tiun fakton necesis nun transformi en konstantan institucion. La unua dekreto de la Komunumo estis do forigo de la konstanta armeo kaj ĝia anstataŭigo per la armita popolo.

La Komunumo formiĝis el la urbaj konsilantoj elektitaj per ĝenerala voĉdonado en la diversaj distriktoj de Parizo. Ili estis respondecaj kaj ĉi-momente eksigeblaj. Ilia plimulto konsistis memkompreneble el laboristoj aŭ agnoskitaj reprezentantoj de la laborista klaso. La Komunumo celis esti ne parlamenta, sed laboranta institucio, plenumanta kaj leĝdonanta samtempe. La polico, ĝis nun la instrumento de la ŝtata registaro, estis tuj senigita de ĉiuj ĝiaj politikaj ecoj kaj transformita en la ĉi-momente eksigebla instrumento de la Komunumo. Same pri la oficistoj de ĉiuj ceteraj administraciaj branĉoj. De la membroj de la Komunumo malsupren, la publika servo estis farena kontraŭ laborista salajro. La akiritaj rajtoj kaj la reprezentaciaj pagoj por la ŝtataj altranguloj malaperis kun tiuj altranguloj mem. La publikaj oficoj ĉesis esti privata proprieto de la lakeoj de la centra registaro. Ne nur la urba administracio, sed la tuta iniciatado farata de la ŝtato estis metita en la manojn de la Komunumo.

III

Post forigo de la konstanta armeo kaj de la polico, la instrumentoj de la materia potenco de la malnova registaro, la Komunumo tuj komencis rompi la klerikan instrumenton de subpremo, la pastran potencon; ĝi dekretis la dissolvon kaj senproprietigon de ĉiuj eklezioj, tiom kiom ili estis posedantaj korporacioj. La pastroj estis resenditaj en la trankvilon de la privata vivo, por tie, laŭ la bildo de siaj antaŭuloj, la apostoloj, nutri sin de la almozoj de la kredantoj. Ĉiuj instruaj institucioj estis senpage malfermitaj al la popolo kaj samtempe purigitaj de ĉia enmiksiĝo de la ŝtato kaj de la eklezio. Per tio estis ne nur la lerneja kleriĝo atingebligita al ĉiu, sed ankaŭ la scienco mem liberigita de la katenoj metitaj al ĝi de la klasa antaŭjuĝo kaj de la regpotenco.

La juĝistaj oficistoj perdis tiun ŝajnan sendependecon, kiu servis nur por kaŝi ilian obeemon al ĉiuj sinsekvaj registaroj, al kiuj ĉiuj sinsekve ili estis ĵurintaj kaj rompintaj la ĵuron de fideleco. Kiel ĉiuj ceteraj oficistoj, ili estis de nun elektendaj, respondecaj kaj eksigeblaj.

La Pariza Komunumo devis kompreneble servi kiel modelo por ĉiuj grandaj industriaj centroj de Francujo. Ekde kiam la komunuma ordo de la aferoj estis enkondukita en Parizo kaj en la duarangaj centroj, la malnova centra registaro devis cedi ankaŭ en la provincoj al la memregado de la produktantoj. En mallonga skizo pri nacia organizado, kiun la Komunumo ne havis la tempon detaligi, tekstas eksplicite ke la komunumo estu la politika formo eĉ de la plej eta vilaĝo kaj ke la konstanta armeo en la kamparo estu anstataŭigenda per popolmilito kun ekstreme mallonga servotempo. La kamparaj komunumoj de ĉiu distrikto devis mastrumi siajn komunajn aferojn per asembleo de delegitoj en la distrikta ĉefurbo, kaj tiuj distriktaĵaj asembleoj siavice sendi delegitojn en la nacian delegacion en Parizo; la delegitoj devis esti ĉiumomente eksigeblaj kaj esti ligitaj al la difinitaj instrukcioj de siaj elektintoj. La malmultaj, sed gravaj funkcioj, kiuj poste restis por la centra registaro, ne devis esti, kiel oni intence falsis, forigitaj, sed konfiditaj al komunumaj, t.e. strikte respondecaj oficistoj. La unueco de la nacio ne estis rompenda, sed male organizenda per la komunuma konstitucio; ĝi devis realiĝi per neniigo de tiu ŝtatpotenco kiu pretendis esti la enkorpiĝo de tiu unueco, sed volis esti sendependa kaj supera al la nacio, ĉe kies korpo ĝi tamen estis nur parazita elkreskaĵo. Dum necesis fortranĉi la nur subpremajn organojn de la malnova regpotenco, ĝiaj pravaj funkcioj estis forprenendaj de potenco, kiu pretendis stari super la socio, kaj

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

redonendaj al la respondecaj servantoj de la socio. Anstataŭ unufoje en tri aŭ ses jaroj decidi kiu membro de la reganta klaso reprezentu kaj subpremu la popolon en la parlamento, la voĉdonrajto servu al la popolo konstituita en komunumoj tiel kiel la individua voĉdonrajto servas al ĉiu alia dungisto elekti laboristojn, kontrolistojn kaj librotenistojn en sia firmao. Kaj estas sufiĉe konate, ke socioj same bone kiel unuopuloj, en veraj aferoj scias trovi la taŭgan personon kaj, se ili iam trompiĝas, baldaŭ scias korekti tion. Aliflanke, nenio povus esti pli fremda al la spirito de la Komunumo ol anstataŭigi la ĝeneralan voĉdonadon per hierarkia investituro.

Estas la kutima sorto de novaj historiaj kreaĵoj ke oni konsideras ilin kiel flankajn pecojn de malnovaj kaj eĉ kadukaj formoj de la socia vivo, kies aspekto estas iel simila. Do, tiu nova Komunumo, kiu rompas la modernan ŝtatpotencon, estis konsiderata reviviĝo de la mezepokaj komunumoj, kiuj antaŭis tiun ŝtatpotencon kaj poste fariĝis ties bazo. – La komunuma konstitucio estis miskomprenita kiel provo starigi federacion de etaj ŝtatoj, tian pri kiu revis Montesquieu kaj la ĝirondistoj⁵⁴, anstataŭ tiu unueco de grandaj popoloj, kiuj, kvankam komence perforte estigita, tamen nuntempe fariĝis potenca faktoro de la socia produktado. – La kontraŭeco de la Komunumo al la ŝtatpotenco estis misinterpretita kiel troigita formo de la malnova batalo kontraŭ trocentrigo. En aliaj landoj, apartaj historiaj cirkonstancoj povis malhelpi la klasikan disvolviĝon de la burĝa regoformo, tia kia ĝi okazis en Francujo, kaj povis permesi ke, kiel en Anglujo, la grandaj centraj ŝtatorganoj kompletiĝas per koruptaj pastrejkunvenoj (vestries), per urbaj konsilantoj ŝakrantaj pri mono kaj per furiozaj prizorgantoj de malriĉuloj en la urboj kaj per efektive heredaj pacjuĝistoj en la kamparo. La Komunuma konstitucio, male, redonintus al la socia korpo ĉiujn fortojn, kiujn ĝis nun foruzis la parazita elkreskaĵo «ŝtato», kiu nutras sin de la socio kaj malhelpas ties liberan disvolviĝon. Sole per tiu faro ĝi estus lanĉinta la renaskiĝon de Francujo. – La meza klaso de la provincaj urboj vidis en la

54 Ĝirondistoj: Anoj de la partio de la *Gironde*, kiu reprezentis la interesojn de la komerca kaj industria burĝaro kaj de la bienposeda burĝaro fortiĝinta dum la jaroj de la Franca Revolucio; nomata laŭ la departemento Ĝirondio, kies deputitoj en la leĝdona nacia asembleo kaj en la konvento estis grandparte gvidantoj de tiu partio. La ĝirondistoj batalis 1793 sub la standardo de defendo de la rajtoj de la departementoj je aŭtonomeco kaj federacio kontraŭ la jakobena registaro kaj la amasoj subtenantaj ĝin.

III

Komunumo la provon restarigi la regadon, kiun ĝi ĝuis sub Louis Philippe super la lando kaj kiu sub Louis Bonaparte estis repuŝita per la pretendita regado de la kamparo super la urboj. Tamen, en la realo la komunuma konstitucio metintus la kamparajn produktistojn sub la spiritan gvidadon de la distriktaĵaj ĉefurboj kaj certigintus al ili tie, en la urbaj laboristoj, la naturajn reprezentantojn de iliaj interesoj. – La nura ekzisto de la Komunumo, kiel io memkomprenebla, venigis kun si la lokan memregadon, sed nun ne plu kiel kontraŭpezon kontraŭ la nun senutiligita ŝtatpotenco. Povis veni nur en la menson de iu Bismarko, kiu, se ne okupita de siaj sangaj-feraj intrigoj, volonte revenas al sia, al li tiel konvena, metio de kunlaboranto ĉe la «*Kladderatsch*»⁵⁵ – nur en tian menson povis veni la ideo imputi al la Pariza Komunumo nostalgion pri tiu karikaturo de la malnova franca urbokonstitucio de 1791, de la prusa urboordo, kiu malaltigas la urbajn administraciojn al nuraj radoj de la prusa ŝtatmaŝinaro. – La Komunumo realigis la frapvorton de ĉiuj burĝaj revolucioj – malmultekosta regado – per tio ke ĝi nuligis la du plej grandajn elspezosumojn, la armeon kaj la oficistaron. Ĝia nura ekzisto antaŭkondiĉis la neekziston de la monarĥio, kiu, almenaŭ en Eŭropo, estas la vera balasto kaj nemalhavebla masko de la klasa regado. Ĝi provizis al la respubliko la bazon de vere demokratiaj institucioj. Sed nek «malmultekosta» regado nek «vera respubliko» estis ĝia fina celo; ambaŭ realiĝas preterpase kaj per si mem.

La diverseco de la interpretoj, kies objekto fariĝis la Komunumo, kaj la diverseco de la interesoj, kiuj trovis sin esprimataj en ĝi, pravas ke ĝi estis plene kaj tute ampleksigebla politika formo, dum ĉiuj antaŭaj regformoj estis esence subpremaj. Ĝia vera sekreto estis jena: Ĝi estis esence registaro de la laborista klaso, la rezulto de la batalo de la produktanta kontraŭ la alpropriga klaso, la fine malkovrita politika formo, sub kiu la ekonomia liberigo de la laboro povis realiĝi.

Sen tiu lasta kondiĉo la Komunuma konsitucio estintus neeblaĵo kaj trompo. La politika regado de la produktanto ne povas daŭri apud la eternigo de lia socia servuteco. Pro tio, la Komunumo devis servi kiel levilo por renversi la ekonomiajn bazojn, sur kiuj staras la ekzisto de la klasoj kaj per tio la klasa regado. Ekde kiam la laboro estas liberigita, ĉiu homo fariĝas laboristo, kaj produkta laboro ĉesas esti klasa eco.

55 «*Kladderatsch*»: ilustrita politika-satira semajngazeto, aperis de 1848 ĝis 1944 en Berlino; komence radikale maldekstra, ĝi poste servis la reaktion.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

Estas siaspeca fakto: Malgraŭ la tuta parolado kaj la nemezurebla literaturo de la lastaj sesdek jaroj pri la emancipiĝo de la laboristoj⁵⁶ – ekde kiam la laboristoj ie prenas la aferon en siajn proprajn manojn, jam tuj ree eksonas la apologiaj frazoj de la proparolantoj de la nuna socio kun ĝiaj du polusoj: kapitalo kaj salajrosklaveco (la terposedanto estas nun nur la silenta partnero de la kapitalisto), kvazaŭ la kapitalisma socio vivus ankoraŭ en stato de plej senkulpa virgeco, ĉiuj ĝiaj principoj⁵⁷ ankoraŭ ne disvolvintaj, ĉiuj ĝiaj memtrompoj ankoraŭ ne senmaskigitaj, ĉiu ĝia prostitua realeco ankoraŭ ne senvualigita! La Komunumo, ili elkrias, volas forigi la proprieton, la bazon de ĉia civilizacio! Jes ja, sinjoroj, la Komunumo volis forigi tiun klasan proprieton, kiu transformas la laboron de la multaj en la riĉecon de la malmultaj. Ĝi intencis la senprophetigon de la senprophetistoj. La individuan posedaĵon ĝi volis realigi, transformante la produktadrimedojn, la tergrundon kaj la kapitalon, kiuj estas nun antaŭ ĉio la rimedoj por servutigo kaj ekspluatado de la laboro, en nurajn instrumentojn de la libera kaj asociita laboro. – Sed tio estas la komunismo, la «neebla» komunismo! Nu, tiuj homoj el la regantaj klasoj, kiuj estas sufiĉe saĝaj por kompreni la maleblecon de daŭrigo de la nuna sistemo – kaj ekzistas multaj da ili – fariĝis trudiĝemaj kaj fanfaronaj apostoloj de kooperativa produktado. Sed se la kooperativa produktado ne restu pura ŝajno kaj trompo, se ĝi forigu la kapitalisman sistemon, se la tutaĵo de kooperativoj reguligu la nacian produktadon laŭ komuna plano, per tio prenante ĝin sub sian propran gvidadon kaj ĉesigante la konstantan anarĥion kaj la periode revenantajn konvulsiojn, kiuj estas la neevitebla sorto de la kapitalisma produktado – kio estus tio alia, sinjoroj, ol la komunismo, la «ebla» komunismo?

La laborista klaso ne postulis miraklojn de la Komunumo. Ĝi ne havis tute pretajn utopiojn enkondukeblajn per popoldecido. Ĝi scias, ke por ellabori sian propran liberigon kaj per ĝi tiu pli alta vivoformo kiun la nuna socio per sia propra ekonomia evoluo nerezisteble alstrebas, ke ĝi, la laborista klaso, devas trairi longajn batalojn, tutan serion da historiaj procezoj, per kiuj la homoj same kiel la cirkonstancoj komplete transformiĝas. Ĝi ne bezonas realigi idealojn; ĝi bezonas nur liberigi la elementojn de la nova socio, kiuj jam evoluis en la sino de la disfalanta burĝa socio. En plena

56 En la eldono de 1871 kaj 1876: «emancipiĝo de la laboro».

57 En la eldonoj de 1871 kaj 1876: kontraŭdiroj.

III

konscio de sia historia misio⁵⁸ kaj kun la heroa decido agi digne je ĝi, la laborista klaso povas kontentiĝi rideti fronte al la krudaj insultoj de la gazetaraj lakeoj kaj fronte al la instruema protekto de bonintencaj burĝaj doktrinuloj kiuj preĝadas siajn nesciajn banalaĵojn kaj sektecajn kapricaĵojn en orakola tono de scienca neerareblo.

Kiam la Pariza Komunumo prenis la gvidadon de la revolucio en siajn proprajn manojn; kiam simplaj laboristoj kuraĝis por la unua fojo tuŝi la regoprivilegion de siaj «naturaj superuloj», de la proprietuloj, kaj, sub cirkonstancoj de senekzempla malfacilo, faris sian laboron modeste, konsciencie kaj efike – faris ĝin por salajroj kies plej alta estis apenaŭ kvinono de tiu kiu estas, laŭ alta scienca atestanto (Profesoro *Huxley*) la plej malalta por sekretario de la londona lerneja inspektisto –, tiam la malnova mondo tordiĝis en koler-konvulsiojn vidante la ruĝan flagon kiu, la simbolo de la respubliko de la laboro, flirtis super la urbodomo.

Kaj tiu estis tamen la unua revolucio en kiu la laborista klaso estis klare agnoskita kiel la sola klaso ankoraŭ kapabla je socia iniciato; agnoskita eĉ de la granda amaso de la pariza meza klaso – etkomercistoj, metiistoj, komercistoj – escepte nur de la riĉaj kapitalistoj. La Komunumo savis ĝin per saĝa solvo de la ĉiam revenanta kaŭzo de la disputo ene de la meza klaso mem, la demando inter ŝuldantoj kaj kreditoroj. La sama parto de la meza klaso partoprenis en 1848 la subpremon de la laborista ribelo de junio; kaj tuj poste ĝi estis de la konstitucia asembleo senceremonie oferata al ĝiaj kreditoroj.⁵⁹ Sed tio ne estis la sola kialo pro kiu ĝi nun aliĝis al la laboristoj. Ĝi sentis, ke ekzistis jam nur unu elekto: la Komunumo aŭ la imperio, egale sub kia nomo. La imperio estis ekonomie ruiniginta tiun mezan klason per sia malŝparado de la publika riĉeco, per la financa trompado kiun ĝi nutris, per ĝia apogo al la artefarite akcelita koncentrado de la kapitalo kaj la per tio okazita senproprietigo de granda parto de tiu meza klaso. La imperio subpremis ĝin politike, morale indignigis ĝin per siaj orgioj, ofendis ĝian volterismon per transdono de la edukado de ĝiaj infanoj al la «sensciaj

58 En la eldono de 1876: tendenco.

59 La dekreto de la Pariza Komunumo de la 16-a de aprilo 1871 determinis, ke ĉiuj ŝuldodevoj estu repagotaj partopage en tri jaroj kaj sen interezopago. La dekreto faciligis aparte la kondiĉojn de la etburĝaro kaj estis malavantaĝa por la kreditoroj, kiuj estis grandkapitalistoj.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

fratetoj»⁶⁰ kaj ĝian nacian senton kiel francoj per tio ke ĝi transkape ĵetis ilin en militon kiu por la tuta detruo, kiun tiu kaŭzis, lasis nur unu kompenson – la neniigon de la imperieco. Efektive, post elmigro de la altaj bonapartistaj kaj kapitalistaj vagulbando el Parizo, elpaŝis la vera ordopartio de la meza klaso kiel «*Union républicaine*»⁶¹, metis sin sub la flagon de la Komunumo kaj defendis ĝin kontraŭ la intencaj misprezentoj de Thiers. Ĉu la dankemo de tiu granda amaso de la meza klaso sukcese trapasos la nunajn malfacilajn provojn, montriĝos poste.

La Komunumo tute pravis kriante al la kamparanoj: «Nia venko estas via espero!»⁶² El ĉiuj mensogoj elkovitaj en Versajlo kaj plutrumpitaj de la glorplenaj eŭropaj gazetaraj helptaĉmentoj⁶³, unu el la plej monstraj estis tiu, ke la junkroj de la nacia asembleo estas la reprezentantoj de la francaj kamparanoj. Oni imagu nur la amon de la franca kamparano por tiuj al kiuj li post 1815 devis pagi unu miliardon da kompenco!⁶⁴ En la okuloj de la franca kamparano ja eĉ la nura ekzisto de grandbienulo estas atenco al liaj

60 Sensciaj fratetoj (*frères ignorantins*): moknomo de religia frataro (ordeno), kiu estiĝis 1680 en Remso kaj kies membroj dediĉis sin al instruado de malriĉaj infanoj; en la lernejoj de la ordeno la lernejoj ricevis ĉefe religian edukadon, dum la aliaj kampoj de scio estis tre neglektataj. Markso aludas per tiu esprimo la malaltan nivelon kaj la klerikan karakteron de la bazlernejo en la burĝa Francujo.

61 «*Union républicaine*» (*Alliance républicaine des Départements*): politika organizaĵo, al kiu apartenis reprezentantoj de la etburĝaj tavoloj, kiuj devenis de la diversaj departementoj kaj vivis en Parizo. La organizaĵo subtenis la Komunumon, alvokis al batalo kontraŭ la versajla registaro kaj la monarĥista nacia asembleo kaj pledis por starigo de la Komunumo en ĉiuj departementoj.

62 Markso aludas verŝajne alvokon verkitan de *André Léo* (*Léodile Champseix*), kiu unue aperis en «*La Couronne*» n-ro 22 de la 10-a de aprilo 1871, poste ankaŭ en aliaj gazetoj kaj kiel flugfolio sub la titolo «*Au travailleur des campagnes*», subskribita per la vortoj: «*Les travailleurs de Paris*».

63 En la originalo: gazetaraj zuavoj. [Zuavoj: francaj koloniaj trupoj formitaj en 1830 el alĝerianoj kaj francaj koloniistoj en Alĝerio. Poste ili konsistis jam nur el francoj. La zuavoj estis konataj pro sia blinda obeemo.]

64 La 27-an de aprilo 1825, la reakcia registaro de Karlo la 10-a decidis leĝon pri la pago de kompensoj al la iamaj elmigrintoj por la bienoj konfiskitaj en la jaroj de la Franca Revolucio. La plej grandan parton de tiu kompenco de 1 miliardo da frankoj, kiu estis pagata kiel trielcenta ŝtatrento, ricevis la pintoj de la kortega aristokrataro kaj la grandbienuloj de Francujo.

III

konkeroj de 1789. La burĝo impostis 1848 la terparcelon per aldonimposto de 45 centonoj de franko, sed li faris tion nome de la revolucio; nun li estis lanĉinta internan militon kontraŭ la revolucio por meti la ĉefan pezon de la kvin miliardoj da militkompensoj konsentitaj al la prusoj sur la ŝultrojn de la kamparanoj. Kontraste al tio, la Komunumo deklaris jam en unu el siaj unuaj proklamaĵoj, ke la veraj kaŭzintoj de la milito devas ankaŭ porti ties kostojn. La Komunumo estus depreninta de la kampulo la sangimposton, doninta al li malmultekostan regadon, kaj liajn sangosuĉulojn, la notaron, la advokaton, la ekzekuciiston kaj aliajn tribunalajn vampirojn transforminta al salajrataj komunumaj oficistoj, de li mem elektitaj kaj al li respondecaj. Ĝi estus liberiginta lin de la despoteco de la kampgardisto, de la ĝendarmo kaj de la prefekto; ĝi anstataŭis la stultigon fare de la pastro per la klerigo de la instruisto. Kaj la franca kamparano estas, antaŭ ĉio, homo kiu kalkulas. Li taksus ekstreme racia, ke la salajro de la pastro, anstataŭ enkasigata de la impostokolektisto, dependu nur de la libervola agado de la piemo de lia paroĥanaro. Jen la grandaj rektaj bonfaroj kiujn la Komunumo – kaj nur tiu – proponis al la francaj kamparanoj. Pro tio tute superfluas ĉi tie detaligi la pli komplikajn verajn vivdemandojn, kiujn nur la Komunumo estis kapabla kaj samtempe devigata solvi favore al la kamparano – la hipoteka ŝuldo kiu pezis kiel premsonĝo sur lia parcelo, la kampara proletaro kiu ĉiutage plu kreskis sur ĝi kaj lia propra senposedigo de tiu parcelo, kiu trudigis kun ĉiam kreskanta rapideco pro la evoluo de la moderna kampkulturo⁶⁵ kaj la konkurenco de la kapitalisma terkulturo.

La franca kamparano elektis Louis Bonaparte prezidanto de la respubliko, sed la ordopartio⁶⁶ kreis la duan imperion. Kion la franca kamparano vere bezonas, tion li komencis montri en 1848 kaj 1850, kiam li ĉie kontraŭmetis al la registara prefekto sian urbestron, al la registara pastro sian lernejan instruiston, kaj al la registara ĝendarmo sin mem. Ĉiuj leĝoj dekretitaj de la ordopartio⁶⁷ en januaro kaj februaro 1850 estis konfesitaj

65 En la eldonoj de 1871 kaj 1876: kampkulturscienco.

66 Vd noton [paperlibre:] 58.

67 Temas pri la leĝoj pri la dispartigo de Francujo en milit-distriktojn, ĉe kies pinto staris la plej fifamaj reakciuloj, kiuj havis ampleksajn rajtojn; pri la leĝo kiu donis al la prezidanto de la Respubliko la rajton nomumi kaj eksigi la urbestrojn; pri la leĝo kontraŭ la instruistoj, kiuj estis metitaj sub la kontrolon de la prefektoj, kaj pri la leĝo pri instruado, kiu fortigis la influon de la eklezio sur la gvidado

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

subpremaj disponoj kontraŭ la kampanoj. La kampano estis bonapartisto, ĉar la granda revolucio, kun ĉiuj avantaĝoj por li, estis en liaj okuloj enkorpiĝitaj de Napoleono. Tiu trompiĝo, kiu estis sub la dua imperio rapide disfalanta (kaj ĝi estis laŭ sia tuta ecaro malamika al la grundnobelaj junkroj), tiu antaŭjuĝo de la pasinteco, kiel ĝi povintus daŭri fronte al la alvoko de la Komunumo al la vivaj interesoj kaj urĝaj bezonoj de la kampuloj?

La grundnobeloj – tio estis fakte ilia ĉefa timo – sciis, ke tri monatoj da libera komunikado inter la komunuma Parizo kaj la provincoj generus ĝeneralan kampanan ribelon. Pro tio ilia tima urĝo ĉirkaŭi Parizon per polica blokado kaj malhelpi la disvastiĝon de la pesto.

Se laŭ tio la Komunumo estis la vera reprezentanto de la sanaj elementoj de la franca socio kaj pro tio la vere nacia registaro, ĝi estis samtempe, kiel laborista registaro, kiel la kuraĝa antaŭbatalanto de la liberigo de la laboro, en plena senco de la vorto internacia. Sub la okuloj de la prusa armeo, kiu estis aneksinta du francajn provincojn al Germanujo, la Komunumo aneksis la laboristojn de la tuta mondo al Francujo.

La dua imperio estis la jubila festeno de la kosmopolita trompado, la kavaliro-friponoj de ĉiuj landoj alrapidis laŭ ĝia voko, por partopreni ĝiajn orgiojn kaj la prirabadon de la franca popolo. Eĉ en tiu ĉi momento, la dekstra mano de Thiers estas Ganesco, la valaĥa kanajlo, kaj lia maldekstra mano Markowski, la rusa spiono. La Komunumo allasis ĉiujn fremdulojn al la honoro fali por senmorta celo. – Inter la ekstera milito perdita pro ĝia perfido kaj la interna milito lanĉita per sia konspiro kun la fremda konkeranto, la burĝaro trovis la tempon montri sian patriotismon per organizado de policaj persekutoj kontraŭ la germanoj en Francujo. La Komunumo nomumis germanon sia ministro pri laboro⁶⁸. – Thiers, la burĝaro, la dua imperio konstante trompis Pollandon per laŭtaj deklaroj de sia simpatio, dum en realo ili perfidis ĝin al Ruslando kaj plenumis la filaboron de Ruslando. La Komunumo honoris la heroajn filojn de Polujo per tio ke ĝi metis ilin ĉe la pinto de la defendo de Parizo⁶⁹. Kaj, por tute nemiskompreneble signi la

de la edukado. Karakterizon de tiuj leĝoj donas Markso en sia verko «*Die Klassenkämpfe in Frankreich 1848 bis 1850* [La klasbataloj en Francujo de 1848 ĝis 1850]».

68 *Leo Frankel*.

69 *Jaroslav Dombrowski kaj Valery Wróblewski*.

III

novan historian eraon, kiun enkonduki ĝi estis konscia, la Komunumo, sub la okuloj de la venka Prusujo kaj de la bonapartista armeo gvidata de bonapartistaj generaloj, renversis la kolosan simbolon de milita gloro, la *Vendôme-kolonon*⁷⁰.

La granda sociala dispono de la Komunumo estis ĝia propra laboranta ekzistado. Ĝiaj apartaj disponoj povis nur indiki la direkton en kiu registaro de la popolo per la popolo moviĝas. Al tio apartenas la abolo de noktlaboro por bakistaj submajstroj; la malpermeso, sub minaco de puno, apliki la praktikon, kutiman ĉe dungistoj, malaltigi la salajron per monpunoj por la laboristoj pro diversaj pretekstoj – procedo en kiu la dungisto estis en unu persono leĝdonanto, juĝisto kaj ekzekuciisto kaj krome enpoŝigas la monon. Alia tiuspeca dispono estis la transdono de ĉiuj fermitaj metiejoj kaj fabrikoj al laboristaj kooperativoj, sub kondiĉo de kompenso, egale ĉu la koncerna kapitalisto estis fuĝinta aŭ preferinta ĉesigi la laboron.

La financaj disponoj de la Komunumo, elstaraj pro sia klarvido kaj modereco, povis limiĝi nur al tiaj kiuj estis akordigeblaj al la situacio de sieĝata urbo. Konsidere al la monstraj ŝteloj faritaj al la urbo Parizo de la grandaj financkompanioj kaj konstruentreprenistoj sub la regado de Haussmann,⁷¹ la Komunumo havintus multe pli grandan rajton konfiski ilian proprieton ol Louis Bonaparte tiun de la familio Orléans. La Hohencoloj⁷² kaj la anglaj oligarĥoj, kiuj ambaŭ devenigis grandan parton de siaj posedaĵoj el rabita eklezia proprieto, kompreneble ekstreme indignis pri la Komunumo, kiu profitis de la sekularigo nur je 8.000 frankoj.

Dum la versajla registaro, ekde kiam ĝi reakiris iom da kuraĝo kaj forto, aplikis la plej perfortajn rimedojn kontraŭ la Komunumo; dum ĝi subpremis la opiniliberecon en tuta Francujo kaj malpermesis eĉ kunvenojn de delegitoj de la grandaj urboj; dum ĝi submetis Versajlon kaj la ceteran Francujon al spionado multe pli aĉa ol tiu de la dua imperio; dum ĝi forbruligis, helpe de

70 Vd noton [paperlibre:] 14.

71 En la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj de la 19-a jarcento, la prefekto de la departemento *Seine, Haussmann*, farigis multajn laborojn por transformado de Parizo. Apud plibeligo de la aristokrataj kvartaloj oni i.a. plilarĝigis stratojn kaj faris novajn rektajn stratojn, por ebligi ĉe popolribeladoj al la registaraj trupoj la lokadon de artilerio. El la ŝtataj rimedoj disponigitaj por tio, *Haussmann* kaj liaj subuloj malversaciis eksterordinarajn sumojn.

72 La nomo de la prusaj reĝoj (*Hohenzollern* [hohencólern]). -vl

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

siaj ĝendarmoj-inkvizitoroj, ĉiujn gazetojn presitajn en Parizo kaj malfermis ĉiujn leterojn el kaj al Parizo; dum en la nacia asembleo la plej timemaj provoj eldiri vorton favore al Parizo estis per hurlado silentigitaj en maniero eĉ ne aŭdita en la junkra ĉambro de 1816; dum la sangavida militado de la versajlanoj ekster – kaj ĝiaj provoj de subaĉeto interne de – Parizo, ĉu la Komunumo ne estus fie perfidinta sian pozicion se ĝi observintus ĉian etiketon de la liberalismo kvazaŭ en plej profunda paco? Se la registaro de la Komunumo estus parenca al tiu de sinjoro Thiers, tiam estus nenia kialo por subpremi gazetojn de la ordopartio en Parizo kiel komunumaj gazetoj en Versajlo.

Estis efektive ĝene por la junkroj, ke ĝuste en la momento kiam ili deklaris la revenon al la eklezio sola rimedo por savi Francujon, la senkreda Komunumo malkovris la strangajn sekretojn de la monaĥinejo *Picpus* kaj de la preĝejo *St. Laurent*. Estis satiro pri Thiers ke, dum li pluvigis meritmedalojn sur la bonapartistaj generaloj pro ties majstreco en batalperdado, subskribado de kapitulacoj kaj volvado de cigaredoj en *Wilhelmshöhe*, la Komunumo eksigis kaj arestis siajn generalojn tuj kiam ili estis suspektataj neglekti sian servon. La eksigo kaj aresto de membro⁷³, kiu estis enŝteliĝinta sub falsa nomo kaj antaŭe en Liono pasiginta ses tagojn en malliberejo pro simpla bankroto – ĉu ĝi ne estis antaŭplanita ofendo ĵetita en la vizaĝon de la falsisto Jules Favre, tiam daŭre ministro pri eksteraj aferoj de Francujo, daŭre vendanta Francujon al Bismarko, daŭre diktanta ordonojn al tiu senkompara belga registaro? Sed efektive, la Komunumo ne pretendis senerarecon, kion faras ĉiuj malnovaj registaroj senescepte. Ĝi publikigis ĉiujn paroladojn kaj agojn, ĝi iniciis la publikon en ĉiujn siajn malperfektajn.

En ĉiu revolucio antaŭenŝovas sin, apud ĝiaj veraj reprezentantoj, ali-speculoj. Iuj estas la supervivantaj de antaŭaj revolucioj kun kiuj ili estas intimaj; sen kompreno de la nuna movado, sed ankoraŭ posedantaj grandan influon sur la popolo pro siaj konataj kuraĝo kaj karaktero aŭ eĉ pro nura tradicio. Aliaj estas nuraj blekuloj kiuj, dum jaroj regurdantaj la samajn konstantajn gurdaĵojn kontraŭ la respektiva registaro, enŝteliĝis en la famon de plej pura revoluciulo. Ankaŭ post la 18-a de marto, tiaspeculoj aperis kaj en kelkaj okazoj ludis eĉ elstaran rolon. Kiom ilia povo atingis, tiom ili malhelpis la veran agadon de la laborista klaso, same kiel ili malhelpis la

73 *Blanchet*.

III

plenan disvolviĝon de ĉiu antaŭa revolucio. Ili estas neevitebla malbono; kun la tempo oni deskuas ilin; sed ĝuste tiun tempon oni ne lasis al la Komunumo.

Mirige estis efektive la transformiĝo, kiun la Komunumo kaŭzis al Parizo! Nenia spuro plu de la malĉasta Parizo de la dua imperio. Parizo ne estis plu la kolektiĝejo de britaj bienuloj, irlandaj *absentees*⁷⁴, usonaj eksklavistoj kaj parvenuoj, rusaj ekservutistoj kaj valaĥaj bojaroj. Ne plu kadavroj en la *Morgue*, ne plu noktaj rompĥteloj kaj preskaŭ ne plu ŝteloj; post februaro 1848, la stratoj de Parizo fine refariĝis sekuraj, kaj tio sen ajna polico.

«Ni», diris membro de la Komunumo, «ni nun ne plu aŭdas pri murdo, rabo kaj perforto kontraŭ personoj: efektive ŝajnas kvazaŭ la polico estus treninta kun si ĉiujn siajn konservativajn amikojn al Versajlo.»

La duonmondumulinioj estis retrovintaj la spuron de siaj protektantoj – la fuĝintaj viroj de la familio, de la religio kaj precipe de la proprieto. Anstataŭ ili, revenis al la surfaco la veraj inoj de Parizo – heroaj, altanimaj kaj sindonemaj kiel la inoj de la antikveco. Parizo, laboranta, pensanta, batalanta, sanganta, super la preparo de nova socio preskaŭ forgesanta la kanibalojn antaŭ siaj pordegoj, radiantaj en la entuziasmo de sia historia iniciato!

Kaj nun, fronte al tiu nova mondo en Parizo, jen la malnova en Versajlo – tiu kunveno de la guloj⁷⁵ de ĉiuj mortintaj reĝimoj, legitimistoj kaj orleanistoj, avidaj nutri sin de la kadavro de la nacio – kun vosto de antaŭdiluvaraj respublikanoj, kiuj per sia ĉeesto en la asembleo konsentis la sklavist-ribelon, kiuj esperis ke la maljuna ĉarlatano ĉekape de la registaro certigu la daŭrigon de ilia parlamenta respubliko, kaj karikaturis la jaron 1789 kunvenante, kiel fantomoj de la pasinteco, en la *Jeu de Paume*⁷⁶. Jen do tiu asembleo, reprezentanto de ĉio mortinta en Francujo, kiun revenigis al ŝajnvivo la sabroj de la generaloj de Louis Bonaparte! Parizo ĉiel vera, Versajlo ĉiel mensoga; kaj tiu mensogo elbuŝigita de Thiers!

74 *Absentees* aŭ *absenters* (malĉeestantoj): iraj grandbienuloj kiuj fordiboĉis siajn senpene akiritajn enspezojn eksterlande kaj plej ofte malĉeestis en siaj bienoj. La mastrumadon de siaj bienoj ili lasis al mastrumistoj aŭ al peranto kiu donis la terojn al etaj farmistoj kontraŭ uzuraj farmopagoj.

75 Gulo: legenda fiestaĵo, kiu prirabas tombojn kaj nutras sin de kadavroj. -vl

76 Pilkludejo, kie la nacia asembleo de 1789 faris siajn famajn decidojn.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

Thiers diras al urbestroj deputitaj de Seine-et-Oise:

«Vi povas kalkuli kun mia vorto, mi neniam rompis ĝin.»

Li diras al la asembleo mem «ke ĝi estas la plej libere elektita kaj la plej liberala kiun Franio iam ajn havis». Li diras al sia bunte miksitaj soldataraco ke ĝi estas «la admiro de la mondo kaj la plej bela armeo kiun Francujo iam ajn havis»; li diras al la provincoj ke li ne bombadas Parizon, ke tio estas mito.

«Se okazis kelkaj kanonpafoj, tio ne estis de la armeo de Versajlo, sed de kelkaj ribeluloj por kredigi ke ili batalas dum ili eĉ ne kuraĝas montri sin»⁷⁷

Jen li diras al la provincoj:

«La artilerio de Versajlo ne bombadas Parizon, ĝi nur kanonas ĝin.»

Li diras al la ĉefepiskopo de Parizo, ke la supozaj ekzekutoj kaj reprezalioj (!) atribuitaj al la trupoj de Versajlo estas nur malseriozaĵoj. Li diras al Parizo ke li volas nur «liberigi ĝin de la aĉaj tiranoj kiuj subpremas ĝin»⁷⁸ kaj ke, fakte, «la Parizo de la Komunumo estas nur manpleno da krimuloj».

La Parizo de Thiers ne estis tiu de la «kota amaso», sed ia imaga Parizo, la Parizo de la *francs-fileurs*⁷⁹, la Parizo de la bulvarduloj kaj de la bulvardulinoj, la riĉa, kapitalista, ora, pigra Parizo, kiu nun plenegis Versajlon, Sankta-Denizon, *Rueil* kaj *Saint-Germain* per siaj lakeoj, friponoj, la literatura bohemo kaj per siaj duonmondulinoj, kiuj konsideris la internan militon nur kiel agrablan interaktan distraĵon, spektante la batalojn per lornoj, nombrante la kanonpafojn kaj ĵurante je sia propra honoro kaj je tiu de siaj prostituitinoj ke la spektaklo estas multe pli bone surscenigita ol iam ajn antaŭe en la *Porte-Saint-Martin*. La homoj kiuj falis estis vere mortintaj, la kriegoj de la vunditoj estis veraj kriegoj kaj, vidu, ĉio ĉi estis tiel intense historia!

Jen la Parizo de s-ro Thiers; same, la elmigrintoj de Koblenco estis la Francujo de s-ro de Calonne.⁸⁰

77 «*Le Temps*», 19-a de aprilo 1871.

78 «*Journal Officiel de la République française*», 5-a de majo 1871.

79 *Franc-fileurs* (nenifaruloj): moknomo por la pariza burĝaro kiu dum la sieĝo de la urbo malkuraĝe fuĝis el la urbo. La ironieco de tiu esprimo rezultiĝas el tio ke ĝi sonas simile kiel *franc-tireurs* (partizanoj).

80 Elmigrintoj de Koblenco: Koblenco estis dum la Franca Revolucio la centro de

IV

La unua provo de komploto de la sklavistoj por faligi Parizon estis igi la prusanojn okupi ĝin; sed tio fiaskis pro la rifuzo de Bismarko. La dua, tiu de la 18-a de marto, finiĝis per la malvenko de la armeo kaj la fuĝo de la registaro al Versajlo, kio devigis la administracion sekvi ĝin. Ŝajnigante intertraktadojn kun Parizo, Thiers donis al si la tempon prepari sin por la milito kontraŭ ĝi. Sed kie trovi armeon? La restoj de la frontregimentoj estis malmultaj kaj ne tre fidindaj. Liaj urĝaj alvokoj al la provincoj, invitante ilin helpi Versajlon per siaj naciaj gvardianoj kaj siaj volontuloj, estis akceptitaj per simpla rifuzo. Nur Bretonio liveris manplenon da vendeanoj⁸¹ kiuj batalis sub blanka flago kaj kies batakrio etis: «Vivu la reĝ'!». Thiers estis do devigita kolekti, tre haste, buntan bandon konsistantan el maristoj, marinfanterianoj, papaj zuavoj, la ĝendarmoj de Valentin, urbaj serĝentoj kaj fidenuncistoj de Piétri. Tiu armeo estintus tamen ridinde senpova sen la reveno de imperiaj militkaptitoj kiujn Bismarko pogute liberigis, ĝuste sufiĉaj por vivteni la internan militon kaj protekti la versajlan registaron serveme submetitan al Prusujo. Dum la milito mem, la versajla polico devis prigardi la versajlan armeon, dum la ĝendarmoj devis trejni ĝin elmetante sin mem al ĉiuj plej danĝeraj postenoj.

La fortikaĵoj kiuj falis ne estis prenitaj, sed aĉetitaj. La heroeco de la federintoj konvinkis Thiers ke la rezistado de Parizo ne rompeblis per lia propra strategia genio nek per la bajonetoj kiujn li disponis.

Intertempe, liaj rilatoj kun la provincoj fariĝis pli kaj pli malfacilaj. Eĉ ne unu mesaĝo de aprobo venis por serenigi Thiers kaj liajn junkrojn. Tute male ... Deputitoj kaj mesaĝoj pluve venis de ĉiuj flankoj, postulante, en ĉio alia ol respektama tono, la repaciĝon kun Parizo surbaze de senekivoka agnosko de la respubliko, la konfirmado de la komunumaj liberecoj kaj la

la kontraŭrevolucia monarĥista elmigrado, kiu preparis intervenon kontraŭ la revolucia Francujo. Tie troviĝis, apogate de la feŭdismaj absolutismaj regnoj, la elmigranta registaro sub gvido de la fanatika reakciulo *Calonne*, kiu estis ministro sub Ludoviko la 16-a.

- 81 En la originalo: «*chouans*». Nomo origine por okcidentfrancaj rojalistoj kiuj batalis kontraŭ la Franca Revolucio; dum la Pariza Komunumo, la komunumanoj nomis per tiu fivorto monarĥistan taĉmenton de la versajlanoj, rekrutita en Bretonio kaj sub *Charette* batalanta kontraŭ la Komunumo.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

dissolvon de la Nacia Asembleo, kies mandato eksvalidis. Ili alvenis tiom kvante ke Dufaure, ministro pri justico de Thiers, en sia cirkulero de la 23-a de aprilo al la prokuroroj, ordonis al ili trakti «la sloganon repaciĝo» kiel krimon! Dume, ekmalesperante pri la sukceso de sia kampanjo, Thiers decidis ŝanĝi la taktikon; li ordonis, en la tuta lando, komunumajn elektojn por la 30-a de aprilo surbaze de la nova komunuma leĝo kiun li mem estis diktinta al la Nacia Asembleo. Konfide al la intrigoj de siaj prefektoj kiom al la polica timigo, Thiers atendis ke la verdikto de la provincoj donos al la Nacia Asembleo tiun moralan povon kiun ĝi neniam havis kaj ke ili fine sendos al li la materian forton kiun li bezonis por venki Parizon.

Lia bandita milito kontraŭ Parizo, kiun li ekzalte laŭdis en siaj propraj bultenoj, kaj la klopodoj de liaj ministroj por starigi en tuta Francujo la regnon de la teroro, Thiers, dekomence, zorgis por akompani ilin per eta komedio de repaciĝo, kiu devis servi por pli ol unu plano. Ĝi devis trompi la provincojn, allogi la burĝajn elementojn de Parizo kaj, precipe, doni al la deklaritaj respublikanoj de la Nacia Asembleo la okazon por kaŝi sian perfidon de Parizo malantaŭ sian fidon al Thiers. La 21-an de marto, kiam li ankoraŭ ne havis armeon, li deklaris al la Nacia Asembleo:

«Kio ajn okazu, mi ne sendos armeon kontraŭ Parizo».

La 27-an de marto, li denove elpaŝis tie:

«Mi trovis la respublikon kiel fakton, kaj mi estas firme decidita konservi ĝin».⁸²

En la realo, li subpremis la revolucion en Liono kaj Marsejlo⁸³ nome de la respubliko, dum la blekegoj de liaj junkroj kovris la simplan mencion de tiu nomo en Versajlo. Post tiu faro, li mildigis la «fakton» kiu estis jam nur «hipoteza fakto». La princoj de Orleano, kiujn li, pro antaŭzorgo, estis veniginta de Bordoza, havis nun, en klara rompo de la leĝo, ĉian liberecon intrigi en *Dreux*. La koncedojn kiujn ofertis Thiers en siaj senfinaj interparoladoj kun la delegitoj de Parizo kaj de la provincoj, kvankam ili konstante variis laŭ tono kaj koloro, finiĝis ĉiam per jeno: lia venĝo limiĝos verŝajne al «la manpleno da krimuloj implikitaj en la murdo al Lecomte kaj

82 «*Annales de l'Assemblée nationale*», v. 2, Parizo 1871.

83 La revolucio kiu proklamis la Komunumon en Liono, la 22-an de marto, kaj la 23-an de marto en Marsejlo kaj en *Saint-Étienne*, estis tre rapide subpremita de la registaro de *Thiers*. Krome, la Komunumo estis proklamita en Tuluzo, Narbono kaj en kelkaj pliaj urboj.

Clément Thomas», kondiĉe ke, kompreneble, Parizo kaj Francujo agnosku senrezerve s-ron Thiers persone kiel la plej bonan el la respublikoj; precize kiel li faris en 1830 kun Louis-Philippe. Tiujn koncedojn mem li ne nur pridubigis per oficialaj komentoj pri ili en la Asembleo farataj de liaj ministroj. Li havis krome sian Dufaure por agi. Dufaure, tiu maljuna orleanisma advoato, estis ĉiam la ĉefjuĝisto de la sieĝostato, nun en 1871 sub Thiers, same kiel en 1839 sub Louis-Philippe kaj en 1849 sub la prezidanteco de Louis Bonaparte.⁸⁴ Kiam li ne estis ministro, li riĉiĝis pledante por la parizaj kapitalistoj kaj faris al si politikan kapitalon pledante kontraŭ la leĝoj de li mem enkondukitaj. Nun, ne kontenta urĝe voĉdonigi en la Nacia Asembleo serion da subpremaj leĝoj destinitaj, post la falo de Parizo, elsarki la lastajn restaĵojn de la respublika libereco, li lasis antaŭvidi la sorton de Parizo per mallongigo de la proceduro, laŭ li tro longa, de la milittribunaloj⁸⁵, kaj proponante novan drakonan leĝon pri deportado. La revolucio de 1848, abolante la mortpunon pri politikaj aferoj, anstataŭigis ĝin per deportado. Louis Bonaparte ne kuraĝis, almenaŭ ne malkaŝe, restarigi la reĝimon de la gilotino. La Asembleo de la jankroj, kiu ankoraŭ

84 Aludo al la klopodoj de *Dufaure* pri firmigo de la juli-monarĥio dum la armita ribelo de la *Societo de la sezonoj* en majo 1839 kaj al la rolo kiun li ludis en la batalo kontraŭ la opozicia etburĝa montpartio en la Dua Respubliko en junio 1849.

La ribelo, preparita de la sekreta republikana-socialisma *Societo de la sezonoj* sub gvido de Blankio kaj *Barbès*, de la 12-a de majo 1839 en Parizo ne havis amaso-bazon, ĝi havis komplotan karakteron kaj estis disbatita de la militistaro kaj la nacia gvardio. Por la lukto kontraŭ la revolucia danĝero oni starigis novan ministrejon, al kiu apartenis *Dufaure*.

En la jaro 1849 akriĝis la politika krizo kaŭzita de la opozicio de la montpartio kontraŭ *Louis Bonaparte*. Tiam *Dufaure* estis ministro pri internaj aferoj kaj iniciatinto de serio da subpremaj leĝoj direktitaj kontraŭ la revolucia parto de la nacia gvardio, la demokratoj kaj la socialistoj.

85 *Dufaure* prezentis al la nacia asembleo leĝon kiu eĉ pli mallongigis la proceduron ĉe militaj tribunalo kompare kun la respektivaj determinoj de la *Code de justice militaire* de 1857. La leĝo donis al la armeestro kaj al la militministro la rajton, sen antaŭa esplorado kaj laŭ propra bontrovo, plendi ĉe tribunalo. En tiaj kazoj, la verdikto, inkluzive de ekzamenado de apelacio, estis plenumenda ene de 48 horoj.

La leĝpropono estis publikigita en la «*Journal Officiel de la République française*», Versajlo, 7-a de aprilo 1871.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

ne havis la aŭdacon eĉ nur aludi ke la parizanoj ne estas ribeluloj sed murdistoj, devis do limigi sian anticipan venĝon kontraŭ Parizo je la nova leĝo de deportado de Dufaure. Kun ĉiuj ĉi cirkonstancoj, Thiers mem ne povintus tiom longe daŭrigi sian komedion pri repaciĝo, se ĝi ne estus, kiel li ĝuste celis, provokinta la kolerhurladojn de la junkroj kiuj, per siaj remaĉaj cerboj, komprenis nek lian ludon nek la neceson de hipokrito, de falso kaj atendigo.

Kun vido al la proksimaj balotoj pri komunumaj konsilataroj de la 30-a de aprilo, Thiers ludis, la 27-an, unu el siaj grandaj scenoj de repaciĝo. Meze de inundo da sentimentala retoriko, li ekkriis de la asemblea tribuneno:

«La sola ekzistanta komploto kontraŭ la respubliko estas tiu de Parizo, kiu trudas al ni verŝi francan sangon. Mi diris kaj rediras: ke tiuj malpiaj armiloj falu el la manoj kiuj tenas ilin, kaj la puno haltos tuj per dispono de indulgo, kiu ekskludas nur la etan nombron da krimuloj.»

Al la violentaj interrompoj de la junkroj li respondis:

«Sinjoroj, diru al mi, mi petegas vin, ĉu mi malpravas? Ĉu vi vere bedaŭras ke mi diris, kio estas vera, ke la krimuloj estas nur manpleno da? Ĉu ne estas feliĉa, meze de niaj malfeliĉoj, ke la homoj kapablaj verŝi la sangon de Clément Thomas kaj de la generalo Lecomte estas nur maloftaj esceptoj?»⁸⁶

Francujo tamen havis nur surdajn orelojn por la paroladoj de Thiers, kiujn li mem konsideris parlamenta sirenkanto. El la 700.000 komunumaj konsilantoj elektitaj de la 35.000 komunumoj restintaj al Francujo, la legitimistoj, oreleanistoj kaj bonapartistoj ĉiuj kune estis eĉ ne 8.000. La komplementaj elektoj, kiuj sekvis, estis eĉ pli decide malamikaj al ili. Do, anstataŭ akiri de la provincoj la materian forton kiun ĝi tiel bezonis, la nacia asembleo perdis eĉ la lastan moralan pretendon je potenco: tiun esti la esprimo de la universala voĉdonado de la lando. Kaj por kompletigi la malvenkon, la komunumaj konsilataroj nove elektitaj de ĉiuj urboj de Francujo malkaŝe minacis la uzurpan asembleon de Versajlo per kontraŭasembleo en Bordojo.

Per tio venis la momento de decida ago, longe atendita de Bismarko. Li minacordonis al Thiers sendi tuj al Frankfurto plenrajtigitajn por definitiva pacakordo. Humile obeante la alvokon de sia mastro, Thiers urĝe sendis sian fidelulon Jules Favre, apogitan de Pouyer-Quertier. Pouyer-Quertier,

86 «*Annales de l'Assemblée nationale*», v. 2, Parizo 1871, p. 736.

IV

«elstara» kotonŝpinisto de Rueno, arda kaj eĉ aĉe servema fanatikulo de la dua imperio, neniam vidis ion malbonan, escepte de la komerctraktato kun Anglujo⁸⁷, malutila por liaj fabrikant-interesoj. Apenaŭ instalita en Bordoza kiel financministro de Thiers, li jam akuzis tiun «malpian» traktaton, faris aludojn pri ties venonta nuligo, kaj havis eĉ la impertinenton, kvankam vane (li ne kalkulis kun Bismarko), provi tuj reenkonduki la iamajn protektajn dogantarifojn kontraŭ Alzaco, ĉar, diris li, nenia valida internacia traktato kontraŭstaras tion. Tiu homo, kiu konsideris la kontraŭevolucion kiel rimedon malaltigi la salajrojn en Rueno, kaj la forcedon de francaj provincoj kiel rimedon altigi la prezon de liaj varoj en Francujo, ĉu li ne estis antaŭdestinita kiel inda kompano de Jules Favre en ties lasta perfido, kronado de lia tuta kariero?

Ĉe la alveno en Frankfurto, tiun perfektan paron de plenrajtigitoj Bismarko tuj alblekis per la ordono: Aŭ restarigo de la imperio, aŭ senkondiĉa akcepto de miaj propraj packondiĉoj! Tiuj kondiĉoj entenis mallongigon de la pagotempoj por la militkompensoj kaj la daŭra okupado de la parizaj fortikaĵoj de prusaj trupoj ĝis kiam Bismarko deklaru sin kontentigita pri la stato de la aferoj en Francujo; Prusujo estis tiel agnoskita kiel supera arbitracianto pri la internaj aferoj de Francujo! Kompense, li ofertis liberigi, por ekstermi Parizon, la kaptitan bonapartistan armeon kaj certigi al ĝi la rektan helpon de la trupoj de la imperiestro Vilhelmo. Li garantiis sian bonan intencon per tio ke li dependigis la unuan kompenso-pagon de la «pacigo» de Parizo. En tian logaĵon kompreneble avide mordis Thiers kaj liaj plenrajtigitoj. Ili subskribis la packontrakton la 10-an de majo, kaj ratifigis ĝin al la asembleo de Versajlo la 18-an.

En la intertempo inter subskribo de la pacakordo kaj alveno de la bonapartistaj kaptitoj, Thiers sentis sin des pli devigita refari sian repaciĝ-komedion, ĉar liaj respublikanaj helpantoj havis, pro iu incidento, urĝan bezonon trovi pretekston por fermi la okulojn pri la preparoj al la buĉado de Parizo. Ankoraŭ la 8-an de majo, li respondis al deputacio de mezklasaj pacemuloj:

87 Anglujo kaj Francujo subskribis la 23-an de januaro 1860 komerctraktaton: en ĝi, Francujo rezignis pri la import-malpermesoj kiuj estis anstataŭigitaj per maksimumaj doganaĵoj de 30 elcentoj de la varprezo. Krome, Francujo ricevis la rajton eksporti la plej multajn francajn varojn doganlibere al Anglujo. Kiel sekvo de tiu kontrakto okazis subita fortiĝo de la konkurenco en la interna merkato pro la varalfluo el Anglujo. Tio kaŭzis la malkontenton de la francaj industriistoj.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

«Kiam la ribeluloj decidis kapitulaci, la parizaj pordegoj restos malfermitaj por ĉiuj, dum unu semajno, kun la escepto por la murdintoj de la generaloj Clément Thomas kaj Lecomte.»

Kelkajn tagojn poste, akre riproĉita de la junkroj pro tiuj promesoj, li rifuzis doni klarigojn; tamen ne sen doni tiun signifoplenan indikon:

«Mi diras ke inter vi estas senpacienuloj, homoj tro urĝataj. Ili devas atendi ankoraŭ ok tagojn; fine de tiuj ok tagoj ne estos plu danĝero, kaj tiam la tasko konformos al ilia kuraĝo kaj ilia kapablo.»⁸⁸

Tuj kiam Mac-Mahon kapablis certigi al li ke li povos tre bladaŭ eniri Parizon, Thiers deklaris al la asembleo ke li eniros Parizon kun la leĝo en la mano, kaj postulos kompletan punon de tiuj mizeruloj kiuj oferis la vivon de niaj soldatoj kaj detruis niajn publikajn monumentojn.

Kiam la decida momento proksimiĝis, li diris al la asembleo: «Mi estos senkompata», li diris al Parizo ke ĝi estas kondamnita, kaj li diris al siaj bonapartistaj banditoj ke ili havas ŝtatpermeson ĝissate venĝi sin je Parizo. Fine, kiam la perfido malfermis la pordegojn de Parizo al la generalo Douay, la 21-an de majo, Thiers malkaŝis, la 22-an, al la junkroj la «celon» de sia repaciĝ-komedio, kiujn ili tiel obstine persistis ne kompreni.

«Mi diris al vi, antaŭ kelkaj tagoj, ke ni proksimiĝas al nia celo, hodiaŭ mi venis por diri al vi: 'Ni atingis la celon. La ordo, la justeco, la civilizacio fine venkis!」⁸⁹

Estis ĝuste tiel. La civilizacio kaj la justeco de la burĝa ordo montras sin en sia vera, fulmotondra lumo ĉiufoje kiam la sklavoj de tiu ordo leviĝas kontraŭ siaj mastroj. Tiam, tiu civilizacio kaj tiu justeco prezentas sin kiel senmaska barbareco kaj senleĝa venĝo. Ĉiu nova krizo en la klasbatalo inter alproprigisto kaj produktisto de riĉeco montras tion pli klare. Eĉ la abomenaĵoj de la burĝoj en junio 1848 malaperas antaŭ la nedirebla fiaĵo de 1871. La memofera heroismo, kun kiu la pariza popolo – viroj, virinoj kaj infanoj – plu batalis dum ok tagoj post la eniro de la versajlanoj, reflektas la grandecon de ilia afero same kiel la inferaj faroj de la fisoldatoj reflektas la ennaskitan spiriton de tiu civilizacio, kies dungitaj batalistoj kaj defendistoj ili estas. Glora civilizacio, certe, kies granda problemo estas la demando kiel seniĝi je tiu amasoj da kadavroj, kiujn ĝi murdis post fino de la batalo!

88 «*Annales de l'Assemblée nationale*», v. 2, Parizo, 1871, p. 914.

89 «*Annales de l'Assemblée nationale*», v. 3, Parizo, 1871, p. 109.

IV

Por trovi komparon por la konduto de Thiers kaj liaj sanghundoj, necesas reiri al la tempoj de Sulao kaj la du triumviratoj de Romo⁹⁰. Sama fridsanga amasbuĉado, sama senkonsidero de aĝo kaj sekso ĉe murdado; sama sistemo torturi kaptitojn; samaj proskriboj, sed ĉi-foje kontraŭ tuta klaso; sama sovaĝa ĉaso al la kaŝitaj ĉefoj, por ke eĉ ne unu eskapu; samaj denuncoj de politikaj kaj privataj malamikoj; sama indiferento antaŭ buĉado de homoj tute fremdaj al la batalo. Ekzistas nur unu diferenco: tiu ke la romanoj ankoraŭ ne havis maŝinpafilojn por are seniĝi je la proskribitoj, kaj ili ne havis «la leĝon en la mano», nek sur la lipoj la sloganon «civilizacio».

Kaj, post tiuj hororoj, vidu la alian flankon, eĉ pli aĉan, de tiu burĝa civilizacio, tian kia priskribis ĝin ĝia propra gazetaro!

«Dum malproksime sonas ankoraŭ unuopaj pafoj, skribas la pariza korespondanto de londona *Tory*-gazeto, kiam neprizorgataj vunditoj mortaĉas inter la tomoŝtonoj de *Père-Lachaise*, kiam 6.000 ribeluloj frapataj de teroro en la agoniode la malespero erarvagadas en la labirintaj katakomboj, kiam oni vidas ankoraŭ malfeliĉulojn puŝataj tra la stratoj por esti per maŝinpafilo dudekope mortigataj, estas naŭze vidi la kafejojn plenaj de adorantoj de absinto, de bilardo kaj de domeno; vidi la ĉiesulinojn okupi la bulvarojn kaj aŭdi la bruadon de la diĉoj el la ŝikaj restoracioj ofendi la noktansilenton.

S-ro Édouard Hervé skribas en *Le Journal de Paris*⁹¹, versajla gazeto subpremita de la Komunumo:

«La maniero, en kiu la pariza loĝantaro [!] hieraŭ esprimis sian kontenton, estis pli ol frivola, kaj ni timas ke tio pligraviĝos kun la tempo. Parizo havas nun festan aspekton, kio estas tute malkonvena, kaj se ni ne volas ke oni nomu nin 'dekadencaj parizanoj', necesas ĉesigi tion.»

Poste li citas la teksteron de Tacito:

«Kaj tamen, tagon post tiu horora batalo, eĉ antaŭ ol tiu estis tute finita, Romo, malnobliĝinta kaj koruptita, rekomencis aĉe sterna sin en la marĉo de la volupto kiu detruis ĝian korpon kaj makulis ĝian animon – *alibi proelia et vulnera, alibi balneae popinaeque* (ĉi tie bataloj kaj vundoj, tie banoj kaj restoracioj).»⁹²

90 Vd noton p. 11, n-ro 9.

91 «*Journal de Paris*»: semajngazeto de monarĥisma-orleanisma tendenco, fondita 1867 en Parizo.

92 Citaĵoj el artikolo de la franca publicisto *Hervé* en la «*Journal de Paris*» de la 31-a de majo 1871, kiu entenis ankaŭ citaĵon el Tacito: «Historioj», III, 83.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

S-ro Hervé forgesas nur diri ke la «pariza loĝantaro» pri kiu li parolas estas nur la pariza loĝantaro de Thiers, la diboĉuloj, kiuj amase revenis de Versajlo, *Saint-Denis*, *Rueil* kaj *Saint-Germain*, efektive la dekadencaj parizanoj».

En ĉiuj siaj sangaj triumfoj super la memoferaj pioniroj de nova kaj pli bona socio, tiu hontinda civilizacio fondita sur servutigo de la laboro sufokis la ĝemadojn de siaj viktimoj sub tamtamo de kalumnioj kiu mondvaste reeĥas. La serena laborista Parizo de la Komunumo estas subite, de la sanghundoj de la «ordo», ŝanĝita al pandemonio. Kaj kion pruvas tiu monstra metamorfozo por la burĝa menso de ĉiuj landoj? Nu, ke la Komunumo konspiris kontraŭ la civilizacio! La pariza popolo entuziasme ofertas sin por la Komunumo; la nombro de ĝiaj mortintoj pli altas ol tiu de ĉiu alia batalo konata de la historio. Kion pruvas tio? Nu, ke la Komunumo ne estis la registaro de la popolo mem, sed la uzurpado de manpleno da krimuloj! La virinoj de Parizo fordonas ĝoje sian vivon sur la barikadoj kaj sur la ekzekutejoj. Kion pruvas tio? Nu, ke la demono de la Komunumo ŝanĝis ilin al megeroj⁹³ kaj hekatoj⁹⁴! La modereco de la Komunumo dum du monatoj de nekontestata dominado egalas nur al la heroeco de ĝia defendo. Kion pruvas tio? Nu, ke dum monatoj la Komunumo zorge kaŝis, sub masko de modereco kaj humaneco, la sangosoifon de siaj demonaj instinktoj malbridataj nur en la horo de sia agonio!

La laborista Parizo, dum sia heroa memoferado, tiris konstruaĵojn kaj monumentojn kun si en la flamojn. Kiam la mastroj de la proletaro dispecigas ties vivantan korpon, ili ne daŭre esperu triumfe reokupi siajn netuŝitajn domojn. La versajla registaro kriegas: Brulatenco! kaj flustras tiun instrukcion al ĉiuj siaj helpuloj ĝis la plej malproksima vilaĝo, ĉie ĉasi ĝiajn kontraŭulojn kiel suspektatajn je brulatenco. La tutmonda burĝaro rigardas la postbatalan amasbuĉadon plaĉe, sed ĝi terurigas pro profanado de ŝtono kaj tegolo.

Kiam registaroj donas al siaj militŝiparoj liberecon «mortigi, bruligi kaj detruiri», ĉu tio estas permeso al brulatenco? Kiam la britaj trupoj intence forbruligis la vaŝingtonan Kapitolon kaj la somerpalacon de la ĉina imperi-

93 Megero: unu el la furioj, diino vivanta en la Tartaro (infero de la antikvuloj) kaj taskita puni la krimojn de la homoj.

94 Hekato: nomo de la diino Diano, kiam ŝi oficis en la Tartaro.

IV

estro⁹⁵, ĉu tio estis brulatenco?⁹⁶ Kiam Thiers dum ses semajnoj bombadis Parizon, sub la preteksto ke li volis bruligi nur tiujn domojn en kiuj estis homoj, ĉu tio estis brulatenco? – En milito, fajro estas komplete prava armilo. Konstruaĵojn okupitajn de la malamiko oni bombadas por bruligi ilin. Se la defendantoj devas forlasi ilin, ili mem bruligas ilin, por ke la atakantoj ne povu uzi ilin. Esti bruligataj, tio estis ĉiam la neevitebla sorto de ĉiuj konstruaĵoj troviĝantaj en la batalfronto de ĉiuj regulaj armeoj de la mondo. Sed en la milito de la sklavigitoj kontraŭ ties subpremantoj, la sole pravigebla milito en la historio, tio nepre ne validu! La Komunumo uzis la fajron, en la plej strikta senco, kiel defendilon. Ĝi uzis ĝin por bari al la versajlaj trupoj tiujn longajn rektajn stratojn, kiujn Haussmann intence malfermis al artileripafado⁹⁷; ĝi uzis ĝin por kovri sian retreton, ĝuste kiel la versajlanoj dum sia antaŭeniro uzis granatojn, kiuj detruis minimume same multajn domojn kiel la fajro de la Komunumo. Eĉ nun ne klaras, kiuj domoj estis bruligitaj de la defendantoj kaj kiuj de la atakantoj. Kaj la defendantoj uzis la fajron nur post kiam la versajlaj trupoj komencis sian amasmurdadon de la kaptitoj. – Krome, la Komunumo longe antaŭe anoncis publike, ke, ekstremokaze, ĝi entombiĝos sub la ruinoj de Parizo kaj faros el Parizo duan Moskvon, kion ja ankaŭ promesis la defend-registaro, kvankam nur por kaŝi sian perfidon. Ĝuste por tiu celo Trochu estis veniginta la necesan kerosenon. La Komunumo sciis, ke la vivo de la pariza popolo ne valoris

95 En aŭgusto 1814, dum la milito inter Anglujo kaj Usono, anglaj trupoj, post preno de Vaŝingtono, forbruligis la Kapitolon, la Blankan Domon kaj aliajn publikajn domojn.

Kiam Anglujo kaj Francujo faris kolonian konkermiliton kontraŭ Ĉinujo (1857-1860), la anglaj kaj francaj interventrupoj, post okupo de Pekino en oktobro 1860, senreste prirabis la faman imperiestran somerpalacon, la plej riĉan trezor-ejon de ĉinaj arĥitekturo kaj arto, kaj forbruligis ĝin ĝis la fundamentoj.

96 En la anglaj eldonoj de 1871 sekvas ĉi tie la frazo: «Kiam la prusoj, ne pro militaj kialoj, sed pro pura malico kaj venĝemo forbruligis urbojn kiel *Châteaudun* kaj sennombrajn vilaĝojn per keroseno, ĉu tio estis brulatenco?»

97 En la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj de la 19-a jarcento la prefekto de la departemento *Seine, Haussmann*, farigis ampleksajn laboradojn por transformi Parizon. Apud plibeligo de la aristokratiaj kvartaloj li i.a. larĝigis stratojn kaj aranĝis novajn rektajn stratojn, kio devis, ĉe popolribeloj, faciligi al la registaraj trupoj la uzon de artilerio. El la rimedoj disponigitaj por tio, *Haussmann* kaj liaj subuloj malversaciis monstrajn sumojn.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

multe por ĝiaj kontraŭuloj, sed iliaj propraj konstruaĵoj jes ja multe valoris por ili. Kaj Thiers, siavice, estis deklarinta ke lia venĝo estos senkompata. Nur kiam li havis sian armeon batalpreta je unu flanko, kaj je la alia flanko la prusoj baris la eliron, li ekkriis: «Mi estos senkompata! La puno estos kompleta, la justico severa.» Se la agoj de la parizaj laboristoj estis vandalismo, tiam ili estis la vandalismo de senespera defendo, ne la vandalismo de la triumfo, kiel tiu kiun kulpis la kristanoj pri la vere netakseblaj artverkoj de la pagana antikveco; kaj eĉ tiu vandalismo estis de la historiisto pravigita kiel neevitebla kaj relative sensignifa ero en la giganta lukto inter unuflanke nova, suprenira, kaj aliflanke malnova, kaduka socio. Ĝi estis eĉ malpli la vandalismo de Haussmann, kiu forbalais la historian Parizon por fari spacon por la Parizo de la promenantoj.

Sed la ekzekuto de la dudek kvar ostaĝoj, antaŭ ĉio de la ĉefepiskopo de Parizo, fare de la Komunumo! – La burĝaro kaj ĝia armeo jam en junio 1848 reenkondukis moron delonge malaperintan el la militado – la mortpafadon de ĝiaj sendefendaj kaptitoj. Tiu brutala moro ekde tiam estis pli aŭ malpli uzata ĉe ĉiu subpremo de popolribelo en Eŭropo kaj Hindio, kio pruvas ke ĝi estis vera «progreso de la civilizacio»! Aliflanke, la prusoj revivigis en Francujo la moron preni ostaĝojn – senkulpajn homojn kiuj garantiis per sia vivo por la agoj de aliuloj. Kiam Thiers, kiel ni vidis, jam komence de la batalo uzis la humanan moron mortpafi la komunumajn kaptitojn, restis al la Komunumo nenio alia, por protekti la vivon de tiuj kaptitoj, ol uzi la prusan moron preni ostaĝojn. La vivo de tiuj ostaĝoj estis re kaj ree perdita pro la daŭra mortpafado de kaptitoj fare de la versajlanoj. Kiel eĉ pli longe domaĝi ilin post la sangelverŝo per kiu la pretoranoj⁹⁸ festis sian enmarŝon en Parizon? Ĉu ankaŭ la lasta kontraŭpezo kontraŭ la senrespekta sovaĝeco de la burĝaj registaroj – ostaĝopreno – fariĝu nura moko? La vera murdisto de la episkopo Darboy estas Thiers. La Komunumo re kaj ree proponis interŝanĝi la ĉefepiskopon kaj krome tutan amason da pastroj kontraŭ la unusola Blankio en la manoj de Thiers. Thiers rifuzis obstine. Li sciis ke li donus kun Blankio kapon al la Komunumo, dum la ĉefepiskopo servus liajn celojn plej bone kiel – kadavro. En tio, Thiers imitis Cavaignac. Kian kriegon de terurigo en junio 1848 Cavaignac kaj liaj ordistoj eklekis denuncante la ribelulojn kiel murdistojn de la ĉefepiskopo Affre! Kaj tamen

98 Pretoranoj: en la antikva Romo, la korpgardistaro de pretoro, poste de imperiestro aŭ militestro, destinita ankaŭ por bridi la popolon.

IV

ili precize sciis, ke la ĉefepiskopo estis mortpafita de la ordensoldatoj. Jacquemet, la ĉefvikario de la ĉefepiskopo, ĉeesta surloke, tuj post la faro enmanigis al ili tian ateston.

La tuta ĥoro de kalumnioj, kiun la ordopartio en siaj sang-orgioj neniam preterlasas voĉigi kontraŭ siaj viktimoj, pravas nur ke la nuntempa burĝo konsideras sin legitima posteulo de la iama feŭd-sinjoro, kiu konsideras ĉian armilon en sia propra mano prava kontraŭ la plebano, dum ia armilo en la mano de la plebano en si mem konstituis krimon.

La konspiro de la dominanta klaso por renverso de la revolucio per interna milito sub protekto de la fremda konkerinto – konspiro kies spurojn ni sekvis de la 4-a de septembro mem ĝis la enmarŝado de la pretoranoj de Mac-Mahon tra la pordego de *St-Cloud* – atingis sian kulminon kun la sangelverŝo en Parizo. Bismarko vidas amuze la ruinojn de Parizo, en kiuj li vidis eble la «unuan partopagon» de tiu ĝenerala detruado de la urbegoj, kiun li jam elrevis kiam li estis ankoraŭ simpla junkro en la prusa *Chambre introuvable*⁹⁹ de 1849. Li rigardas trankvile la kadavrojn de la pariza proletaro. Por li, tio ne estas nur la ekstermado de la revolucio, sed samtempe la ekstermado de Francujo kiu estas nun reale senkapigita kaj krome de la franca registaro. Kun la supraĵeco propra al ĉiu sukcesa politikisto, li vidas nur la surfacon de tiu monstra historia okazo. Kie iam antaŭe la historio prezentis la spektaklon de venkinto, kiu kronas sian venkon per tio ke li fariĝas ne nur la ĝendarmo, sed ankaŭ la luata sbiro de la venkita registaro? Inter Prusujo kaj la pariza Komunumo ne estis milito. Male, la Komunumo estis akceptinta la antaŭtraktadojn de paco, kaj Prusujo estis deklarinta sian neŭtralecon. Prusujo do ne estis militanta partio. Ĝi agis kiel sbiro; kiel malkuraĝa sbiro, ĉar ĝi prenis nenian riskon sur sin; kiel luata sbiro, ĉar ĝi antaŭe kondiĉis la pagon de sia sangomono de 500 milionoj de la falo de Parizo. Kaj tiel fine aperis la vera eco de tiu milito, ordonita de la Providenco por puni la sendian kaj diboĉan Francujon per la pia kaj bonmora Germanujo! Kaj tiu senekzempla rompo de la popolrajto, eĉ tia kiel

99 Prusa *Chambre introuvable* [Prusa Netrovebla Ĉambro] de 1849 – tiel Markso nomas, analoge al la franca *Chambre introuvable* (esprimo por la ĉambro de la deputitoj elektita tuj post la dua falo de Napoleono 1815, kun plimulto fanatike ultrareĝisma kaj reakcia) la parlamenton elektitan en januaro/februaro 1849 surbaze de la konstitucio, kiun la prusa reĝo trudis al la popolo en la tago de la kontraŭrevolucia ŝtatenverso, la 5-an de decembro 1848.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo (La Pariza Komunumo)

komprenis ĝin la leĝistoj de la antikva mondo, anstataŭ instigi la «civilizitajn» registarojn de Eŭropo proskribi tiun jurrompan Prusujon, la nuran instrumenton de la peterburga kabineto – instigas ilin nur al la demando ĉu la malmultaj viktimoj, kiuj eskapis al la duobla postenoĉeno ĉirkaŭ Parizo, ne estu ankaŭ transdonotaj al la versaĵla ekzekutisto!

Ke post la plej terura milito de la moderna tempo la venka kaj la venkita armeoj alianciĝas por komune masakri la proletaron – tiu senprecedenca evento pruvas, ne kiel pensas Bismarko, la finan subpremon de la supren baraktanta nova socio, sed la kompletan diseriĝon de la malnova burĝa socio. La plej alta heroo elano, kiun ankoraŭ kapablis la malnova socio, estas la nacia milito, kaj tiu pruviĝas nun kiel pura registara trompo, kiu havas plu nenion alian celon ol prokrasti la klasbatalon, kaj oni seniĝas je tiu trompo tuj kiam tiu klasbatalo eksplodas en interna milito. La klasa dominado jam ne kapablas kaŝi sin sub nacia uniformo; la naciaj registaroj estas unuecaj kontraŭ la proletaro!

Post pentekosta dimanĉo 1871 ne eblas plu paco nek batalhalto inter la laboristoj de Francujo kaj la alproprigistoj de iliaj laborproduktoj. La fera mano de luata fisoldataro povas, provizore, teni ambaŭ klasojn en komuna subpremo. Sed la batalo nepre rekomencos ĉiam denove, kun ĉiam pli granda amplekso, kaj ne povas esti dubo pri la fina venkonto – la malmultaj alproprigistoj aŭ la giganta laboranta plimulto. Kaj la francaj laboristoj estas nur la pioniroj de la tuta moderna proletaro.

Dum la eŭropaj registaroj tiel, antaŭ Parizo, konfirmas la internacian karakteron de la klasa dominado, ili vekrias pro la Internacia Laborist-Asocio – la internacia kontraŭorganizaĵo de la laboro kontraŭ la mondburĝa komploto de la kapitalo – kiel ĉefa fonto de ĉio ĉi malfeliĉo. Thiers akuzis ĝin kiel despoton de la laboro, kiu ŝajnigas esti ĝia liberiganto. Picard ordonis tranĉi ĉiajn ligojn de la franca Internacio kun la eksterlandaj; grafo Jaubert, la maljuna mumiiĝinta kunkulpulo de la Thiers de 1835, deklaris kiel ĉefan taskon de ĉiuj registaroj, ekstermi ĝin. La junkroj de la nacia asembleo hurlas kontraŭ ĝi, kaj la tuta eŭropa gazetaro aliĝas al tiu ĥoro. Honesta franca verkisto¹⁰⁰, kiu estas tute fremda al nia asocio, esprimas sin jene:

«La membroj de la centra komitato de la nacia gvardio, kiel ankaŭ la plej granda

100 Verŝajne *Robinet*.

parto de la membroj de la Komunumo, estas la plej aktivaj, plej inteligentaj kaj plej energiaj mensoj de la Internacia Laborist-Asocio ... Homoj, profunde honestaj, sinceraj, inteligentaj, sindediĉemaj, puraj kaj fanatikaj en la bona senco de la vorto.»¹⁰¹

La burĝa menso, tute trempita de polica spirito, kompreneble imagas la Internacian Laborist-Asociacion kiel specon de sekreta komploto, kies centra oficejo de tempo al tempo ordonas eksplodojn en diversaj landoj. Sed nia asocio estas fakte nur la internacia ligo, kiu kunigas la plej progresintajn laboristojn en la diversaj landoj de la civilizita mondo. Kie ajn, kaj kiel ajn, en kiaj ajn kondiĉoj la klasbatalo konkretiĝas, tiam estas ankaŭ nature ke membroj de nia asocio staras en la unua vico. La grundo, el kiu ĝi kreskas, estas la moderna socio mem. Ĝi ne estingeblas eĉ per plej monstra sang-elverŝo. Por estingi ĝin, la registaroj devus antaŭ ĉio estingi la despotismon de la kapitalo super la laboro – do la kondiĉojn de sia propra paraziteco.

La laborista Parizo, kun sia Komunumo, estos eterne celebrata kiel la glora pioniro de nova socio. Ĝiaj martiroj estas pie konservataj en la granda koro de la laborista klaso. Ĝiajn eksterminintojn la historio jam nun najlis al la pilorio, de kiu elsavi ilin ne kapblas eĉ ĉiuj preĝoj de iliaj pastroj.

La Ĝenerala Konsilantaro:

M.J. Boon, Fred. Bradnick, G.H. Buttery, Caihil,
William Hales, Kolb, Fred. Leßner, G. Milner, Thomas
Mottershead, Charles Murray, Pfänder, Roach, Rühl,
Sadler, Cowell Stepney, Alf. Taylor, W. Townshend¹⁰²

101 «*Political notes on the present situation of France and Paris. By a French Positivist*». Ed. by Edward Spencer Beesly.

102 En la tria angla eldono de 1871 krome estas menciitaj sekvaj membroj de la Ĝenerala Konsilantaro: *Delahaye, A. Herman, Lochner, J.P. Mac Donnell, Ch. Mills, Rochat* kaj *A. Serrailier*.

En franca eldono (<http://mapage.noos.fr/hubert.demory/>) laŭ tiu de la londona de la 30-a de majo 1871, la membroj de la Ĝenerala Konsilantaro aperas jene:

R. Applegarth, Ant. Arnaud, M. J. Boon, Fr. Bradnick, J. G. Buttery, F. Cournet, E. Delahaye, Eugène Dupont, W. Hales, Hurliman, Jules Johannard, Harriet Law, Fr. Lessner, Lochner, Charles Longuet, Marguerite, Constant Martin, Henry Mayo, George Milner, Charles Murray, Pfänder, J. Rodwanowski, John Rouch, Rühl, G. Ranvier, Vitale Regis, Sadler, Cowel Stepney, Alf. Taylor, W. Townshend, Éd. Vaillant, John Weston, F. J. Yarrow.

Aldonoj al la 3-a germana eldono (1891), publikigitaj sub direktado de Engelso

1

«La kolono de kaptitoj haltis en la Avenuo Uhrich¹kaj estis lokita en kvar aŭ kvin vicoj sur la trotuaro, vide al la strato. La generalo Marquis de Galliffet kaj lia stabo deĉevaliĝis kaj inspektis la linion, komencante per la maldekstra alo. La generalo paŝis malrapide rigardante la vicojn; ie kaj tie li haltis, tuŝante viron ĉe la ŝultro aŭ mansignante al li veni el la malantaŭa vico. La tiel selektitaj, plej ofte sen plia konversacio, estis lokitaj meze de la strato, kie ili baldaŭ fariĝis malgranda aparta kolono ... Evidentas, ke ĉe tio estis konsiderinda spaco por eraroj. Rajdanta oficiro atentigis la generalon pri viro kaj virino pro ia misfaro. La virino, ŝetante sin el la vicoj, surgenuiĝis kaj kun etenditaj brakoj emocie asertis sian senkulpecon. La generalo atendis paŭzon kaj tiam diris, tute trankvile kaj senemocie: Sinjorino, mi frekventis ĉiujn teatrojn de Parizo, ne valoras la penon ludi komedion (*il ne vaut pas la peine de jouer la comédie*) ... Dum tiu tago ne estis bone por iu, se li estis noteble pli granda, pli malpura, pli pura, pli maljuna aŭ pli malbela ol liaj apuduloj. Pri viro mi aparte rimarkis, ke li dankis sian urĝan elsaviĝon el tiu ĉi-monda mizerejo certe nur al sia rompita nazo ... Pli ol cent estis tiel selektitaj, plotono da soldatoj komandita por mortpafado, kaj la resto de la kolono formariĝis, dum la aliaj restis tie. Kelkajn minutojn poste komencis malantaŭ ni la pafado kiu – kun mallongaj interrompoj – daŭris pli ol kvaronhoro. Estis la ekzekutado de tiuj urĝe kondamnitaj malfeliĉuloj.» (Pariza korespondanto, «Daily News» de la 8-a de junio.)

Tiu Galliffet, «la prostituisto de sia edzino, tiel fama pro siaj senhontaj ekshibicioj de sia korpo dum la orgioj de la dua imperio», estis dum la milito konata kiel franca *standardportisto Pistolet*.

«La «*Temps*», prudenta kaj tute ne sensaciema gazeto, rakontas makabr-

1 La Avenuo *Uhrich* ricevis unue (1864) la nomon: *avenue de l'Impératrice*, poste (1870-1875): *avenue Uhrich*, 1875: *avenue du Bois de Boulogne*, kaj nomiĝas nuntempe: *avenue Foch*. Pri la generalo *Jean Jacques Alexis Uhrich*, vd informon (franclingvan), enmetitan de la tradukinto kiel finnoton n-ro 3. -vl.

an historion pri duone mortpafitaj kaj antaŭ sia morto enterigitaj homoj. Granda nombro estis enterigita sur la placo ĉe *St-Jacques-la-Boucherie*, kelkaj da ili nur supraĵe kovritaj de tero. Dumtage la strata bruo superonis ĉion, sed en la nokta silento la loĝantoj de la ĉirkaŭaj domoj estis vekitaj de malproksima ĝemado, kaj matene oni vidis streĉitan pugnon elstari el la grundo. Sekve oni ordonis la elfosadon de la kadavroj ... Ke multaj vunditoj estis vive enterigitaj, pri tio mi neniel povas dubi. Pri unu kazo mi povas atesti. Kiam Brunel kun sia amatino estis mortpafita la 24-an de majo en la korto de domo de la placo *Vendôme*, oni lasis ilin kuŝi tie ĝis la posttagmezo de la 27-a. Kiam oni tiam fine venis por forigi la kadavrojn, oni trovis la virinon ankoraŭ viva kaj portis ŝin al sukurejo. Kvankam trafita de kvar kugloj, ŝi estas nun ekster danĝero.» (Pariza korespondanto, «*Evening Standard*».²

2

Sekva letero aperis en la londona «*Times*» de la 13-a de junio³:

Al la redaktisto de la «*Times*»

Sinjoro,

La 6-an de junio 1871 sinjoro Jules Favre lanĉis cirkuleron al ĉiuj eŭropaj potencoj, en kiu li alvokas ilin mortĉasi la Internacian Laboristan Asocion. Kelkaj rimarkoj sufiĉu por karakterizi tiun dokumenton.

En la antaŭparolo de niaj statutoj mem estas menciite, ke la Internacio estis fondita «la 28-an de septembro 1864, en publika kunveno en *St. Martin's Hall, Long Acre*, Londono». Pro kialoj plej bone konataj de li mem, Jules Favre donas la daton 1862.

Por klarigi niajn principojn, li asertas citi «ĝian» (de la Internacio)

-
- 2 «*The Evening Standard*» – Vespera eldono de la gazeto «*The Standard*», aperis en Londono de 1857 ĝis 1905, 1905 alinomita al «*Evening Standard and Times Gazette*».
 - 3 Tiu deklaro de la Ĝenerals Konsilantaro de la Internacio, pri cirkulero de *Jules Favre* de la 6-a de junio, estis verkita de Markso kaj Engelso kaj aperis la 13-an de junio en la londona *Times*. Ĝi estis enprenita en la dua kaj tria angla eldono de «La interna milito de Francujo» kaj en la germanaj eldonoj de 1871, 1876 kaj 1891.

Aldonoj al la 3-a germana eldono (1891), publikigitaj sub direktado de Engelso

«presaĵon de la 25-a de marto 1869». Kaj kion li citas? La presaĵon de societo, kiu ne estas la Internacio. Tiam manovron li praktikis jam, kiam li, ankoraŭ sufiĉe juna advokato, defendis la «*National*», parizan gazeton, kontraŭ la akuzo de Cabet pro kalumnio. Tiam li asertis laŭlegi eltiraĵojn el la flugfolioj de Cabet, dum li laŭlegis frazojn interŝovitajn de li mem. Tiu prestidigatista truko estis tamen malkaŝita antaŭ la plena tribunalo kaj, se Cabet ne indulgintus lin, li estus punita per elpelo el la pariza advokataro. El ĉiuj dokumentoj, kiujn li citis kiel dokumentojn de la Internacio, eĉ ne *unu* apartenis al la Internacio. Tiel li diras:

«La alianco deklaras sin ateisma, diras la Ĝenerala Konsilantaro, konstituita en Londono, en julio 1869.»

La Ĝenerala Konsilantaro neniam faris tian dokumenton. Male, ĝi decidis dokumenton, kiu nuligis la originalajn statutojn de la «Alianco» – *L'Alliance de la Démocratie Socialiste* en Ĝenevo –, kiun citas Jules Favre.

En sia tuta cirkulero, kiu parte pretendas esti direktita ankaŭ kontraŭ la imperio, Jules Favre ripetas nur la policajn fabelojn de la prokuroroj de la imperio, kiuj eĉ antaŭ la tribunaloj de tiu sama imperio dissolvigis en nenion.

Estas konate, ke la Ĝenerala Konsilantaro en siaj du mesaĝoj (de julio kaj septembro 1870) pri la tiama milito denunciis la prusajn planojn de konkerado kontraŭ Francujo. Poste, sinjoro Reitlinger, la privata sekretario de Jules Favre, direktis sin, kompreneble vane, al kelkaj membroj de la Ĝenerala Konsilantaro, por ke la Ĝenerala Konsilantaro aranĝu kontraŭ-bismarkan amasan manifestacion favore al la registaro de la nacia defendo; li petis aparte ke la respubliko ĉe tio estu per nenia vorto menciata. La preparoj por amasa manifestacio okaze de la atendata alveno de Jules Favre en Londono estis komencitaj - certe en plej bona intenco - kontraŭ la volo de la Ĝenerala Konsilantaro, kiu en sia mesaĝo de la 9-a de septembro eksplicite kaj anticipe avertis la parizajn laboristojn kontraŭ Jules Favre kaj liaj kolegoj.

Kion diras Jules Favre, se siavice la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacio dissendus cirkuleron al ĉiuj eŭropaj kabinetoj por aparte atentigi ilin pri la dokumentoj publikigitaj de la forpasinta sinjoro Millière en Parizo?

[salutformulo]

John Hales

Sekretario de la Ĝenerals Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio

256, High Holborn, London, W.C.

12-a de junio 1871

En artikolo pri «la Internacia Asocio kaj ĝiaj celoj», la londona «*Spectator*»⁴, kiel bona denunciisto, citas, inter aliaj trukoĵoj kaj eĉ pli amplekse ol faris Jules Favre, la supran dokumenton de la «Alianco» kiel verkon de la Internacio, kaj tio dek unu tagojn post publikigo de la supra refuto en la «*Times*». Tio ne mirigas. Jam Frederiko la Granda kutimis diri, ke el ĉiuj jesuitoj la protestantaj estas la plej fiaj.

4 «*The Spectator*» – semajngazeto de liberala tendenco, fondita 1828 en Londono, nun konservativa.

Notoj

1

«La interna milito en Francujo» estas unu el la plej gravaj verkoj de la scienca komunismo, en kiu, apogite sur la spertoj de la Pariza Komunumo, la fundamentaj tezoj de la marksa instruo pri klasbatalo, ŝtato, revolucio kaj diktatoreco de la proletaro estis pli disvolvitaj. La teksto estis verkita kiel mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio kaj adresita al ĉiuj membroj en Eŭropo kaj Usono. Jam de la unuaj tagoj de la Pariza Komunumo, Markso kolektis kaj pristudis ĉiujn informojn pri ĝia agado: publikigaĵojn en francaj, anglaj kaj germanaj gazetoj, informaĵojn en leteroj el Parizo, ktp. En la kusido de la Ĝenerala Konsilantaro de la 18-a de aprilo 1871, Markso proponis eldoni mesaĝon al ĉiuj membroj de la Internacio pri «la ĝenerala tendenco de la batalo» en Francujo; la Ĝenerala Konsilantaro taskis Markson pri la redaktado de la mesaĝo. Markso komencis ĝin post la 18-a de aprilo kaj laboris pri ĝi dum la tuta majo. Li verkis unue la unuan kaj la duan konceptojn por la «Interna milito en Francujo». Poste li eklaboris pri la pretigo de la definitiva teksto. La 30-an de majo 1871, du tagojn post la falo de la lasta barikado en Parizo, la Ĝenerala Konsilantaro aperbis la tekston de la mesaĝo antaŭlegitan de Markso.

«La interna milito en Francujo» aperis unue en angla lingvo proksimume la 13-an de junio 1871 en Londono. Tiu 35-paĝa broŝuro estis publikigita en eldonkvanto de 1.000 ekzempleroj. Ĉar la unua eldono estis tre rapide elĉerpita, aperis dua angla eldono en kvanto de 2.000 ekzempleroj, kiuj estis rabatite disvastigitaj inter la laboristoj. En tiu eldono Markso korektis kelkajn preserarojn de la unua eldono; krome, la parto «Aldonoj» estis ampleksigita per dua dokumento. En la listo de la subskriboj de la membroj de la Ĝenerala Konsilantaro fine de la mesaĝo ŝanĝiĝis jeno: estis forstrekita la nomoj de la *trade-union*-istoj Lucraft kaj Odger, kiuj estis esprimintaj sian malakordon pri la mesaĝo en la burĝa gazetaro kaj forlasintaj la Ĝeneralan Konsilantaron; krome estis aldonitaj la nomoj de novaj membroj de la Ĝenerala Konsilantaro. En aŭgusto 1871 aperis la tria angla eldono, en kiu Markso estis ree foriginta kelkajn malprecizaĵojn de la antaŭa eldono.

1871 kaj 1872 «La interna milito en Francujo» estis tradukita al la franca, germana, rusa, itala, hispana kaj nederlanda lingvoj kaj aperis en gazetoj, revuoj kaj broŝure en Eŭropo kaj Usono. La tradukon de la mesaĝo al la germana lingvo faris Engelso; ĝi estis publikigita en la «*Volksstaat*» en la numeroj 52-61 de la 28-a de junio, 1-a, 5-a, 8-a, 12-a, 15-a, 19-a, 22-a,

26-a kaj 29-a de julio 1871; ĝi aperis mallongigite en «*Der Volksbote*» (aŭgusto ĝis oktobro 1871); krome ĝi aperis kiel aparta presaĵo de la «*Volksstaat*» en Lepsiko. Tradukante, Engelso faris kelkajn etajn teksto-ŝanĝojn. Tiu aparta presaĵo de 1871 estas konservita en du versioj, kiuj ete diferencas. 1876, okaze de la kvina datreveno de la Pariza Komunumo, aperis nova germana eldono de la mesaĝo.

1891 Engelso redaktis tiun tradukon denove por la germana datrevena eldono, aperonta por la 20-a datreveno de la Pariza Komunumo, kaj verkis enkondukon por ĝi, en kiu li reliefigis la historian gravecon de la spertoj de la Komunumo kaj de ilia teoria ĝeneraligo fare de Markso en la «interna milito en Francujo». Li faris en ĝi ankaŭ kelkajn menciojn pri la agado de la blankiistoj kaj prudonistoj apartenantaj al la Komunumo. Engelso enprenis en tiun eldonon la du adresojn de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito, verkitajn de Markso, kiuj ankaŭ en la sekvaj eldonoj plej ofte aperis kune kun «La interna milito en Francujo».

En la franca, «La interna milito en Francujo» aperis unuafoje en «*L'Internationale*», Bruselo, de julio ĝis septembro 1871. 1872 la mesaĝo aperis broŝure en franca traduko redaktita de Markso; Markso aldonis multajn ŝanĝojn en la presprovaĵoj kaj nove tradukis multajn teksterojn.

1871 aperis en Zuriko la unua eldono de la «interna milito en Francujo» en la rusa. Ĝi servis kiel bazo por serio da presitaj kaj hektografiaj eldonoj. 1905 la mesaĝo aperis en la rusa sub redaktado de Lenino; tiu traduko baziĝis sur la germana eldono de 1891. Lenino redaktis la tradukon kaj provizis ĝin per la preciza ekonomika kaj politika terminologio, forigis multajn misformiĝojn kaj malprecizaĵojn de la antaŭe aperintaj eldonoj kaj kompletigis la tekston per la teksteroj forstrekitaj de la cara cenzuro. Aparte multajn ŝanĝojn Lenino faris ĉe redaktado de la traduko de la tria ĉapitro. Poste li denove tradukis al la rusa multajn teksterojn el la germanaj eldonoj de 1876 kaj 1891, kiujn li citas en siaj verkoj «Ŝtato kaj revolucio»¹ kaj serio da aliaj verkoj.

Ĉi tie «La interna milito en Francujo» estas prezentata laŭ la lasta de Engelso redaktita eldono de 1891. Ĉiuj gravaj devioj de la germanaj eldonoj de 1871 kaj 1876, kiuj tuŝas la enhavon, estas piednote menciataj.

1 Vd V.I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio. (Librofina librolisto n-ro 50). -vl

2

La «Unua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito» estis verkita de Karlo Markso inter la 19-a kaj 23-a de julio 1870. La 19-an de julio 1870 – dum eksplodo de la germana-franca milito – la Ĝenerala Konsilantaro taskis Markson prepari mesaĝon okaze de tiu milito. La mesaĝo estis akceptita de la subkomitato de la Ĝenerala Konsilantaro la 23-an de julio kaj dum la kunveno de la Ĝenerala Konsilantaro la 26-an de julio 1870 unuanime aprobita. Ĝi aperis unue en la angla lingvo sub la titolo «*The General Council of the International Workingmen's Association on the war*» en la londona vespergazeto «*The Pall Mall Gazette*» de la 28-a de julio 1870 kaj kelkajn tagojn poste kiel flugfolio en eldonkvanto de 1.000 ekzempleroj. Ĝi estis poste presita komplete aŭ per eltiraĵoj en pluraj anglaj gazetoj. La redakto de la gazeto «*The Times*» rifuzis publikigi ĝin.

Ĉar la unua eldono de la mesaĝo estis rapide elĉerpita, tute sen kontentigi la postulon, la Ĝenerala Konsilantaro decidis la 2-an de aŭgusto presadon de kromaj 1.000 ekzempleroj. En septembro 1870 la Unua mesaĝo estis denove eldonita en la angla kune kun la «Dua mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro pri la germana-franca milito»; en tiu eldono, la preseraroj de la unua eldono estis korektitaj de Markso.

La 9-an de aŭgusto, la Ĝenerala Konsilantaro starigis komisionon konsistantan el Markso, Jung, Serrailier kaj Eccarius, kiu estis taskita pri tradukado de la Unua mesaĝo al la germana kaj la franca kaj krome pri ĝia disvastigo.

En la germana, la mesaĝo aperis unuafoje en la centra organo de la Socialdemokrata Laborist-Partio (de *Eisenach*) «*Der Volksstaat*», la 7-an de aŭgusto 1870, en la traduko de Vilhelmo Libkneĥto. Tiu germana teksto estis de Markso prilaborita kaj parte nove tradukita. En tiu nova traduko la mesaĝo estis publikigita en la oficiala organo de la germanaj sekcioj de la Internacio en Svislando «*Der Vorbote*» n-ro 8 en aŭgusto 1870 kaj ankaŭ eldonita kiel flugfolio. 1891, okaze de la dudeka datreveno de la Pariza Komunumo, Engelso publikigis la *Unuan kaj la Duan mesaĝojn de la Ĝenerala Konsilantaro* en la germana eldono de «La interna milito en Francujo», kiu estis en Berlino eldonita de la eldonejo de la dissendejo de la «*Vorwärts*». La tradukon de la Unua kaj Dua mesaĝoj por tiu eldono faris Louise Kautsky sub gvidado de Engelso.

En la franca, la Unua mesaĝo aperis kiel traduko de la komisiono en la organo de la Romanda Federacio de la Internacio «*L'Internationale*», Bruselo, la 7-an de aŭgusto 1870 kaj en «*Le Mirabeau*», Verviers, la 7-an de aŭgusto 1870 kaj krome kiel flugfolio.

En la rusa, la Unua mesaĝo aperis en aŭgusto/septembro 1870 en la revuo «*Narodnoje Delo*», n-ro 6/7, publikigita en Ĝenevo. 1905, la Unua kaj la Dua mesaĝoj estis enprenitaj en la rusa eldono de «La interna milito en Francujo», kiu estis eldonita sub redaktado de Lenino kiel traduko de la germana eldono de 1891.

Tiu ĉi teksto baziĝas sur la germana eldono de 1891. La du citaĵoj el la inaŭgura mesaĝo devias iomete de la marka traduko el la jaro 1864. Devioj de la unua germana eldono de 1870, kiuj tuŝas la enhavon, estas menciataj en piednotoj. La reliefigoj kaj la subskriboj de la membroj de la Ĝenerala Konsilantaro estas prenitaj de la angla flugfolio de 1870. Ĉar la mesaĝo estas konata al la germanaj legantoj sub la titolo kiun donis al ĝi Engelso 1891, ĝi aperas ankaŭ ĉi tie sub tiu titolo.

3

En majo 1870 la registaro de Napoleono la 3-a organizis plebisciton por firmigi siajn ŝanceliĝantajn poziciojn. Sed la voĉdonotaj demandoj estis formulitaj tiel, ke mallaŭdo de la politiko de Napoleono la 3-a signifus samtempe mallaŭdon de ĉiaj demokratiaj reformoj. Malgraŭ tiu demagogia manovro la plebiscito pruvis la kreskon de la opoziciaj fortoj: 1,5 milionoj da voĉoj kontraŭ la registaro, 1,9 milionoj da voĉdonrajtuloj ne partoprenis la voĉdonadon. Dum la preparoj de la plebiscito komenciĝis ampleksa kampanjo de reprezalioj kontraŭ la laborista movado; grandskalaj kalumnioj pri la laboristaj organizaĵoj estis disvastigataj kaj ties celoj deformitaj por timigi la mezajn tavolojn per la «ruĝa danĝero».

La pariza federacio de la Internacio (*Les Sections parisiennes fédérées de l'Internationale*) kaj la federacia ĉambro de la laboristaj unuiĝoj (*Chambre fédérale des Sociétés ouvrières*) en Parizo eldonis la 24-an de aprilo 1870 manifeston en kiu ili senmaskigis tiun demagogian manovron kaj instigis la laboristojn deteni sin de la voĉdonado. Tagon antaŭ la plebiscito, la membroj de la pariza federacio estis arestitaj. La polico kulpigis ilin pro preparo de komploto celanta murdi Napoleonon la 3-an. La registaro uzis la

Notoj

kulpigon por denova persekuto kaj por kalumnia agitado kontraŭ la membroj de la Internacio en tuta Francujo. En tribunala proceso kontraŭ la membroj de la pariza federacio, kiu okazis de la 22-a de junio ĝis la 5-a de julio 1870, la akuzo fiaskiĝis. Malgraŭ tio, pluraj membroj de la Internacio en Francujo estis kondamnitaj de la bonapartisma tribunalo al malliberejo sole pro sia aparteno al la Internacia Laborista Asocio.

La kalumnioj, al kiuj la Internacio estis elmetita en Francujo, kaŭzis amasajn protestojn de la laborista klaso.

La Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique* en Esperanto (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...” (n-ro 10 en la sekva librolisto). Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la repaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de *Jesús Campos Pacheco* kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – **Johano Besada: Eseoj**, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – **[Karlo Markso] Markso hodiaŭ -- Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

8. – **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – **Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949**, elfrancisgis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – **Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

14. – **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de *Jesús Campos Pacheco* kaj Vilhelmo

Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. *François Jullien:* Ĉinscienco en saktrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; *Manfred Szameitat:* Sukcesa, sed ne socialisma; *Ingo Nentwig:* Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; *Barry Sautman:* Protestoj kaj separismo en Tibeto; *Michael Parenti:* La mito de Tibeto; *Enfu Cheng:* Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; *Jian Xinhua:* Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; *Theodor Bergmann:* La socialisma disvolvigo-strategio de la PR Ĉinio; *Rolf Berthold:* Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; *Li Bingyan:* Ĉinio sub influo de la novliberalismo; *Helmut Peters:* Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; *Jean-Louis Rocca:* Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero“; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, *Jörg Goldberg:* La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, *Horst Hensel:* La nomoj de la mono – kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, *Harald Werner:* Notoj pri la psikologio de la krizo, *Sarah Wagenknecht:* Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, *Howard Zinn:* La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, *Noam Chomsky:* Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, *William Blum:* La nepardonebla revolucio, *Michael Parenti:* Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, *Piero Glejeses:* Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, *Ignacio Ramonet:* Miamo, nesto de teroristoj, *Salim Lamrani:* La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, *Leonard Weinglass:* La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, *Wayne Smith:* Trista paĝo en la historio de usona juro, *Saul Landau:* Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, *Michael S. Smith:* Raporto pri du procesoj, *James Petras:* La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, *Jitendra Sharma:* Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, *Ricardo Alarcón de Quesada:* La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, *Gianni Miná:* Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, *Nadine Gordimer:* La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. *Moshe Lewin:* La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; *Hansgeorg Conert:* Bazoj kaj evoluo de la sovetocio; *Robert Steigerwald:* Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, *Joachim Bischoff:* La financkrizo kaj alternativaj, *Andreas Fisahn:* Demokratia stirado de la ekonomio, *Manfred Sohn:* Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, *Luciano C. Martorano:* Socialismo, sociigo, demokratio, *Manfred Lauermann:* La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. *Lucien Sève:* Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, *Werner Seppmann:* Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, *Helga E. Hörz:* Ĉu la hombildo krizas? *Hans-Peter Brenner:* Biopsiĥosocia unuo homo – kognita cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7
25. **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5
26. – **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8
27. – **Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9
28. – **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), *Werner Seppman*: Riskokapitalismo; *Richard Sorg*: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon; *Christina Kaindl*: Subjektiveco en la krizo; *Harald Werner*: La krizo en la ordinara konscio; *Christoph Butterwegge*: Mondekonomiakrazo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9
29. – **Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?** Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2
30. – **Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako**, MAS, 2010, ISBN 9782-918300-20-5
31. – **Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilklo kaj sambo**. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)
32. – **Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo**, Sciencifkcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3
33. – **Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7
34. – **Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1
35. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4
36. – **Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN**
37. – **Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio**, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.
38. – **Karlo Markso: Pri la juda demando**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8
39. – **Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2
40. – **Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino**, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9
41. – **Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. – **Ivan Efremov: La Horo de Bovo.** Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3
43. – **Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES,** elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6
44. – **Karlo Markso: Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0
45. – **Miriam Rodríguez; ALVERA: Desegni la parkon,** elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6
46. – **Kien Afriko en la 21-a jarcento? Le Monde diplomatique en Esperanto,** MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7
47. – **Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0
48. – **Ŝteĝervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3
49. – **Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la Wertkritik.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7
50. – **V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio.** Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4
51. – **Unuiĝintaj Nacioj: Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj.** Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1
52. – **Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo,** komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8
53. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4
54. **Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn,** tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2
55. **Miriam Rodríguez: Profiloj de Suno kaj Luno,** elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5
56. **Frederiko Engelso: Ludoviko Foĵerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-48-9
57. **Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick,** elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN

978-2-918300-49-6

58. José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto), Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. Ekonomia krizo n-ro 4. Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj. Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo”; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciĝo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

63. Lode Van de Velde: Epizodoj, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

64. Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

65. Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

66. Roberto Ŝteĝervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5

69. Kien la klimato? N-ro 2, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)

71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p., ISBN 978-2-918300-64-9

73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietingter: La miskompreno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

75. Georgo Fulberto: „La kapitalo” koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise. Elgerman

-igita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

76. Ivan Efremov: Tais el Ateno. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»”, MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8

78. Eddy Raats: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto. MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0

79. Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo. 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2

80. V. I. Lenin: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo. (populara eseo) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9

81. Yoandry Martínez Rodríguez: Tri en la montaro. Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3

82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton, Kvin esoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9

83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6

84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5

85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo. Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3

86. Franco Kafka: Letero al la patro. Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0

87. Aleksandro Grin: Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7

88. Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4

89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1

90. Roberto Ŝtejgervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-87-8

91. Heinz Dieterich: Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

92. Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francujo 1848 ĝis 1850 (1895), elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 23 p., 2013, ISBN 978-2-918300-89-2

93. Máté Zalka: Doberdo. Romano tradukita el la hungara de János Petik, MAS, 2013, 317 p., ISBN 978-2-918300-90-8

94. Jean-Guy Allard: Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko. Artikoloj tradukitaj de Norberto Díaz Guevara kaj de ceteraj MAS-anoj, MAS, 2013, 445 p., ISBN 978-2-918300-78-6

95. Bartolomeo Laskaso: Raporto pri la detruado de Indio, kun Hans' Magno Encensbergo: Retrorigardo en la estontecon. Tradukitaj el la hispana de Ludoviko Serrano Pérez kaj el la germana de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 107 p., ISBN 978-2-918300-66-3

96. V. Adoratskij: Kio estas marksismo kaj leninismo. El la rusa lingvo tradukis F. Robiček, lingve kontrolis E. Drezén. Reeldono de la verko aperinta ĉe EKRELO laŭ vortrekona skano de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 36 p., ISBN 978-2-918300-92-2

97. Lenino: Pri religio. Du artikoloj. Socialismo kaj religio, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk; **Pri rilato de laborista partio al religio,** trad G. Demidjuk; redaktitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-96-0

98. Instituto Markso-Engelso-Lenino: La instruo de Karlo Markso. El la rusa lingvo tradukis P. Gavrilov, N. Incertov, V. Polakov, E. Ŝvedova. Lingve kontrolis V. Polakov. EKRELO, Amsterdamo, 1933. Reeldono ĉe MAS laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 39 p., ISBN 978-2-918300-95-3

99. Ignacio Ramonet: La eksplodo de la ĵurnalismo. De la amaskomunikiloj al la amaso de komunikiloj. Tradukita de Maria Julia Cárdenas Cápiro kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 104 p., ISBN 978-2-918300-95-3

100. Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio, kun enkonduko de Eric Hobsbawm, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2015, 113 p., ISBN 978-2-918300-91-5

101. Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso de Johano). Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 28 p., ISBN 978-918300-97-7

102. Karlo Radeko: Kapitalisma sklaveco kaj socialisma labor-organizo, EKRELO, Lepsiko, 1931, reeldonita de MAS, laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 43 p., ISBN 987-2-918300-94-6

103. Frederiko Engelso: Pri la loĝejproblemo. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 80 p., ISBN 978-2-918300-98-4

104. Aleksandro Grin: La mondo brilanta. La vojo nenien. Cent verstoj laŭ rivero. El

la rusa tradukis Jurij Finkel. Ilustraĵoj de S. G. Brodskij, MAS, 2014, 434 p., ISBN 978-2-918300-99-1

105. Historio estas farata. Kontribuaĵoj al la materiisma koncepto de historio. Georg Füllberth: La invento de la meztavolo; Lucas Zeise: Pri la homo oeconomicus, pri la ekonomio kaj pri la laboro; Hans-Peter Brenner: La rilato inter homo kaj naturo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. Monda Asembleo Socia (MAS), 2014, 37 p., ISBN 978-2-36960-001-5

106. Thomas Metscher: Lingvo kiel praktika mondkonscio. Rimarkoj pri la marka kaj engelsa lingvokoncepto kaj pri ĝiaj sekvoj; Roberto Štejgervaldo: Tutsimple marksismo (recenzo); Thomas Metscher: Breĥto kaj la alta arto de simpleco. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2014, 46 p., ISBN 978-2-36960-000-8

107. Milito kaj paco. Berto Breĥto: La memoro de la homaro; Andrew Murray: Milito kaj kontraŭstaro al milito; Erhard Crome: Ĉu jarcento pacifika? Bernd Müller: Du strategioj de la ekspansio orienten; Hermann Kopp: Recenzo de la libro de Peter Strutyński pri senpilotaj flugmaŝinoj por batalo (sepavoj); Thomas Metscher: „Malbenita estu la milito”. Politika poezio – pensadoj pri disputata nocio; 15 jaroj NATO-agreso kontraŭ la Federacia Respubliko Jugoslavio; Werner Ruf: La ĝihadisma internacio. Ĉu variaĵo de privata milita entreprenismo?; Andreas Wehr: Pri la aktualeco de la imperiismo-demando. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 82 p., ISBN 978-2-36960-002-2

108. Thomas Metscher: Socialisma avangardo kaj realismo. Pri la estetiko de Dmitri Ŝostakoviĉ. Elgermanigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 40 p., ISBN 978-2-36960-003-9

109. Claude Piron: La bona lingvo, reeldono de Renato Corsetti kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2015,

110: Karlo Markso: La interna milito en Francujo (1871) (La Pariza Komunumo) kun enkonduko de Frederiko Engelso. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano. 2-a, reviziita eldono, MAS, nur reta, 2015, 100 p., enretigita ĉe <http://marxists.org> en la jaro 2015, ISBN 978-2-36960-007-7 (tiu ĉi libro)

La libroj akireblas ĉe Esperantaj libroservoj, ĉiukaze ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Elĉerpitaj libroj estas elŝuteblaj ĉe FEL. Por MAS-anoj ĉiuj libroj de MAS estas senpage elŝuteblaj el la retpaĝo de la asembleo-listo de MAS.

Karlo Markso: La interna milito en Francujo
(1871, La Pariza Komunumo)
elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
2-a, reviziita eldono, nur reta
Monda Asembleo Socia (MAS)
2015
ISBN 978-2-36960-007-7

Enpaĝigita de MAS per Libre Office 3.4.3 kaj litertiparo Liberation Serif 10
kaj 9 pt sub Mandriva Linukso 2012
Enretigita ĉe <http://marxists.org> en la jaro 2015